# VORTOJ

DE

# Kamarado E. Lanti

B.S.

Sennacieca Asocio Tutmonda

Sidejo : 23, Rue Boyer, Paris (XX)

Administrejo : Colmstr. 1, Leipzig O-27 (Germanio)

# VORTOJ

de Kamarado E. Lanti

## DE LA SAMA AŬTORO

**For la Neŭtralismon!** (1922, tri eldonoj).

**La Laborista Esperantismo** (1928).

**Kandid** (« Candide », de Volter), traduko (1929).

**Naciismo** (1930).

EN FRANCA LINGVO :

**Où en est la question de la langue internationale?** (1919, elĉerpita).

**La Langue Internationale** (1925, du eldonoj).

EN PREPARO :

**Internaciismo.**

**Sennaciismo.**

# VORTOJ

DE

# Kamarado E. Lanti

KUN ANTAŬPAROLO

DE

L. BANMER

19 31

*SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA*

*ELDONA FAKO KOOPERATIVA / LEIPZIG*

*Ie ne pretens aultre fruict, en agissant, que d'agir, et n'y attache longues suittes et propositions : chaque action faict particulièrement son ieu; porte s'il peut.*

MIĤAELO MONTEJN.

(MICHEL DE MONTAIGNE, 1533-1592.)

sper 1586 I

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

I-19641

Al mia tre bona amiko
Fro Schmidt ni donacas
ĉi tiun libron.
Ida Rosenthal
George Saville
22/4/31

# ANTAŬPAROLO

En mian propran kaptilon mi kvazaŭ falis. Ja, iniciatinte entreprenon, mi nun staras ŝanceliĝe antaŭ nefacila tasko, nome prezenti ĉi tiujn « *Vortojn* » de K-do Lanti. Ne !... tion mi ne faros ! mi preferas prezenti la aŭtoron mem ; pri liaj paroloj... la legantoj juĝos.

Pri la artikoloj verkitaj antaŭ pluraj jaroj, mi nur rimarkigu, ke ili enhenas ankoraŭ sian tutan valoron, k kelkaj el la plej malnovaj eĉ restas tute aktualaj. Ni represis ankaŭ kelkajn artikolojn ne tre malnovajn, por ke la legantoj povu konstati la vere mirindan unuecon en la penso de Lanti. Mi do kredas, ke tio pli bone ol alio ajn pravigas ĉi tiun represon en libra formo.

Mi tamen konfesu, ke tio ne estas la ĉefa instigo en nia faro. Lastatempe Lanti estis kritikata laŭ maniero, kiu ŝajnis al mi k al multaj K-doj tute ne inda. La novaj SAT-anoj, kiuj legos ĉi kritikojn, povus havi opinion tute eraran, pri Lanti k liaj ideoj. Analizante soci-politikajn problemojn kiel mondlingvano, kiel SAT-ano, li ja kelkfoje alvenis al konkludoj, kiuj ne tute koincidas kun tiuj de politikaj organizoj. Ĉu li pravas ? Ĉu li malpravas ? Pri tio ne temas ĉi tie. Certe neniam k neniel Lanti intencis trudi siajn « herezaĵojn » kiel oficialaĵojn en SAT. Kaj mi estas certa, ke se troviĝus iu ajn SAT-ano, admiranto

de Lanti, por proponi tion, li mem plej energie kontraŭstarus. « Mi antaŭvidas la tagon, kiam mi devos kontraŭbatali fanatikajn sennaciistojn », li jam kelkfoje diris. Cetere, mi havas la firman konvinkon, ke inter tiuj, kiuj nuntempe batalas kontraŭ Lanti, kelkiuj tre konscie prezentas ian karikaturon de liaj ideoj, anstataŭ lojale ilin kritiki.

☆ ☆

Jam de pli ol dek jaroj mi kunlaboras pri SAT-aferoj plej intime kun Lanti. En 1919, post la militĉeso, la Parizaj Laboristaj Esperantistoj kunvenis por priparoli la rekomencon de poresperanta propagando. Tiam la neŭtrala movado dormis. Kion fari? Kiu estas preta penadi? Kiu kapablas agi utile? Temis reaperigi *Le Travailleur Espérantiste*. Kiu redaktos ĝin? — Falis sur la militkampo fervoraj k kompetentaj K-doj, kiel Blangarin, Remon (Raymond), k. a. — Neniu el la kunvenantoj sin proponas por plenumi tiun taskon. Ies voĉo jen demandas : « Ĉu vi legis la ĵus aperintan broŝuron *La Langue Internationale* (La Lingvo Internacia) de E. Adam (1)? — Eble tiu K-do povos redakti nian gazeton? Freŝe bakita esperantisto li ja estas, tamen li almenaŭ kapablas redakti en franca lingvo, k ĉar *Le Travailleur Espérantiste* devas esti grandparte en nacia lingvo, do... »

Demandite, Lanti respondis : « Nenian sperton mi havas pri redakto de gazeto. Plie, mi ne scias ĉu mi estas esperantisto aŭ idisto. Nun mi ja vizitas idan kurson, k povas esti, ke mi aliĝos al la ida movado. Mi sentas min nur fervora adepto de internacia lingvo... sed estas al mi tute egale ĉu ido, ĉu esperanto, ĉu alia simila lingvo. »

En la supre menciita broŝuro ja Lanti proponas, ke la demandon pri elekto de esperanto aŭ de ido oni solvu

(1) Adam estas la laŭleĝa nomo de Lanti.

« praktike » per... ĵetkubetoj ! — Tiu trajto sufiĉe karakterizas la manieron, la paradoksemon de Lanti. Sed verdire tiu propono pri solvo de grava problemo entuziasmigis neniun el la malnovaj esperantistoj. Ŝajne, tiu longbarbulo, tiu jam griziĝanta nova mondlingvano estis de ili taksata nur kiel strangulo, eble malseriozulo... — Kaj mi (esperantisto depost 1906, sed, ĉar ĝis tiam izolita en mia provinco, ne partopreninte aktive la esperanto-movadon, k tial do libera je kutimoj k rutino) tuj pense simpatiis kun tiu neordinarulo, kies decidvolo tiom kontrastis kun la hezito, iom komprenebla, de la ceteraj ĉeestantoj.

Sed kia ajn li estu, la demando estis, ke neniu malnovulo pretis preni sur sin la redaktadon de la gazeto ; k sekve ni insistis, ke Lanti akceptu. Kaj li, kvazaŭ por akrigi la pikon de siaj unuaj paroloj, antaŭmetis jenan kondiĉon : « En la unua numero de *Le Travailleur Espérantiste* devas esti deklaro, ke ni estas unue revoluciuloj k nur due esperantistoj aŭ idistoj ». — La pilolo estis amara, k nur dolore digestebla. Sed kion fari ? — Post ŝanceliĝo, unuj kontraŭvole, aliaj nevole, ni konsentis allasi la gazeton en la manojn de tiu nekonata, originala, necedema « esperantisto ».

Kun timo k senpacienco ni atendis la aperon de la unua numero de nia gazeto. Kion ni trovos en ĝi ? Ĉu poridan artikolon ? — Granda estis nia surprizo k ĝojo, kiam ni legis belegan leteron de Romen Rolan (Romain Rolland), en kiu la fama verkisto pledas por esperanto. Komprenebl trovîĝis ankaŭ en tiu numero la terura « Deklaro ». Ĝi vekis indignon ĉe multaj K-doj... Plie la tiutempe aperanta gazeto *Le Monde Espérantiste* tamburis alarmon, dirante, ke idisto enŝteliĝis en la esperantaj vicoj por saboti nian aferon, ktp., ktp. Ĉe siaj unuaj paŝoj en la esperanta movado Lanti trovis nur malaprobojn k kritikojn, — kaj pli poste li estis akre atakata de la idistoj ! Mi aŭdis eĉ kelkiuj el ili aserti, ke ido estus nepre venk-

onta, se tiu freŝa forto ne aliĝus al esperanto. Malgraŭ diversspeca kontraŭstaro, li obstine sin dediĉis al la tasko, kiun li akceptis k kiu fariĝis kvazaŭ lia vivcelo.

La sekvo jam apartenas al la Historio. Ĉiuj malnovaj SAT-anoj pli-malpli scias, kian rolon ludis Lanti en nia movado. Mi celis nur montri en kiaj cirkonstancoj mi konatiĝis kun la aŭtoro de ĉi tiuj « *Vortoj* ».

Do jam de dek jaroj ne pasis unu semajno dum kiu mi ne rilatis kun Lanti. Li eble ne tro koleros, se mi diras, ke li estas nek gratulema, nek flatema homo : mi spertis tion... senbedaŭre ! Kaj mi spertis ankaŭ, ke li estas same severa kontraŭ sin mem, k malŝatas la laŭdojn... eĉ pravigitajn. Kiu vizitas lin, tiu sin preparu por aŭdi riproĉojn, ofte bruajn, aŭ por ricevi ian taskon. Al dek personoj li facile komisius laboron por nia afero, rezervante al si la « leonparton » el... tiu laboro. Neniam li lasis min senfara (por SAT) ; li nek petis, nek postulis, sed post ĉiu vizito, mi revenis hejmen kun nova farotaĵo. Mi konfesas, ke, sen li, tiuj dek jaroj el mia vivo estus malplenaj, sencelaj kiel la antaŭaj. Multfoje mia laciĝo estis kiel lia, ekstrema, sed ne gravas tio, ĉar nur dank' al li mi kontribuis iomete, laŭ mia poveto, al konstruado de io pozitiva k utila.

☆ ☆

Ni pliproksimiĝu por lin vidi pli detale, k nombradi liajn ecojn, bonajn k malbonajn. Ĝenerale, kiam li renkontas novulon, Lanti aspektas kvazaŭ li ne scius kion diri, sed rapide retrovas sian ekvilibron k komencas komplimenti... ironie. Por iuj K-doj tia renkontiĝo estas malplaĉa, k kiu vidis lin nur unufojon, tiu ne certe simpatias al li. Jes, li ŝatas moki, sed ne malŝatas la mokojn pri siaj mallertoj k mankoj. Ĉu kolerema ? Ne kolerema, sed... eksplodema, ĝis perdo de memrego. Tiu interna perturbo blovas tra lian fizionomion, — lia gestado fulmas, — lia lango nodiĝas,

mismoviĝas, — sed atentu! ne kredu, ke jen estas la psikologia momento por lin svenige frapi; atentu! tiu fazo de la ludo estas, male, por vi la plej danĝera; ĝuste kiam lia kolero atingas sian kulminon, tiam fariĝas plej trafaj, plej potencaj liaj juĝkapablo, argumentado k batalrimedoj, — k ĉio estas ĵetata en plej perfekta ordo al la vizaĝo de lia antagonisto. Kaj sub tiu lavango, oni ne scias kien rifuĝi; kien ajn vi kaŝiĝu, kion ajn vi diru, kiel ajn vi ataku, la batalo ne finiĝos sen domaĝo por vi.

Ĉu tia humoro estas konstanta ĉe Lanti? Certe ne, sed lia kvieto ne longe daŭros se, dum la diskutado, vi eldiras stultaĵojn pri grava problemo. Nu! ĉu nur paroli pri bagateloj, pri sensignifaj aferoj? Jen, vi do provu, k vi tuj vidos kiel li malatentas pri vi, kvazaŭ vi sidus ĉe la antipodo, k kiel baldaŭa k malvarma estos la adiaŭo.

Ankaŭ tre amuza estas la maniero laŭ kiu Lanti mispaŝigas k kaptas supraĵulon, kiu pretendas scii ĉion. La roloj baldaŭ interŝanĝiĝas k, konfuzite, la naivulo sidas ĝentile kiel lernanto k aŭskultas la lecionon humile.

Kiam en diskutado, buŝa aŭ skriba, li luktas kontraŭ fortulo, ruzulo, li uzas alian taktikon; rapide li pesas la armilojn liajn, observas momente lian metodon, serĉas lian tiklan punkton, palpante tie k tie, foruzas lian forton k nervaron senĉese per trompaj atakoj, eĉ, laŭnecese, ŝajnigas sin mallerta; k jen subite la kontraŭulo sterniĝas vundita sur la tapiŝo. Nun, kiu alia volas lukti?...

Ĉu Lanti estas monduma? Jes, se la reguloj mondumaj koincidas kun liaj emoj k principoj; fakte tiu koincido ne oftas! — Ĉe via hejmo, ne invitu lin sidiĝi sur seĝon..., ĉar lia prefera sinteno por ripozi estas : postaĵo ĉe planko, genuoj ĉe mentono, manoj kunigitaj antaŭ la kruroj. — Ne atendu de li komplimentojn banalajn aŭ kondolencojn, ĉar li juĝas tion senutila. Ne mortu, ĉar vi ne ĝuos la plezuron « senti » lin post via ĉerko : li ja ne povas kompreni, ke, en la nuna epoko, postvivas ankoraŭ tiaj religiaĉaj moroj

antikvaj. Kaj multfoje mi aŭdis lin diri, ke post la morto, la korpo fariĝas danĝera putraĵo urĝe balaenda, urĝe transportenda al bruligejo senceremonie kiel kuirejaj ruboj. Sur la strato li malatentas funebran sekvantaron, kvazaŭ ĝi estus veturilaro de vojpurigistoj ; k tiu nerespekto estas ĉe li tre natura, nevanta, senafekta.

Kaj mokema rideto aperas sur liaj lipoj, kiam li preterpasas monumenton al mortinta famulo. — Kaj, ĉu konfesinde? li eĉ ne konsentis ĉeesti la entombigon de siaj gepatroj...

Lanti ŝatas marŝadi, ekskursi se tempo restas ; k sur la kamparo, li ĝuas infanan plezuron saltante trans fosojn, riveretojn, fadenbarilojn, obstaklojn, ktp. Treege vigla, spite lia aĝo (52 jaroj). En plena aero, kontraste al lia humorostato ĉe la skribotablo, li estas tre gaja, eĉ petolema, ridegas brue, plengorĝe, moviĝe, k ridigas per rakontoj kiuj konigas, ke li estas iel disĉiplo de Rabele (Rabelais).

Kiagrade instruita li estas ? Kian diplomon ? Nenian ! Tamen per sia obstino, persisto, laboremo k eksterordinaraj komprenpovo k prudento (kiu najbaras pace kun kurioza intuicio !), k ankaŭ dank' al sia fenomena memororgano, li povis kompletigi sian konhavon ĝis tia grado, ke... veraj diplomitoj universitataj dubas ankoraŭ pri lia modesta deveno. Lastatempe, Prof. Groĵan-Mopen (Grosjean-Maupin), en sia recenzo pri *Naciismo* (*Sennaciulo* n-o 305/6) skribas, ke « Lanti montras en ĉi tiu verko ne nur vere sciencan, tre alte ŝatindan objektivemon, sed ankaŭ egan k maloftan klarecon ĉe la koncepto k komprenigo ». Tiom da scienca metodo ĉe iu, kiu tiom malmulte, tiom mal-skolastike la sciencon studis ! ĉu ne ĝuste pro tio ?

Se oni demandus al mi : « Kia estas la filozofio de Lanti ? » profunda estus mia embaraso por respondi. Eble li mem ne scias ! Estas vere, ke mi tre ofte vidis sur lia skribo-tablo verkojn de Niĉe (Nietzsche), sed kredeble estus eraro konkludi el tio, ke li estas niĉeano. Neniam

mi demandis lin pri tio, tial ke tre verŝajne mi ricevus nur mokan, sarkasman respondon, aŭ aŭdus rabelesan difinon pri filozofio. Sed ne necesas demandi lin por konvinkiĝi, ke li estas kore k spirite ligita al sia klaso, al la proletaro. Mi emas pensi, ke la *simpla saĝo* konsistigas la tutan filozofion de Lanti k ke nur tian li agnoskas kiel vere valoran.

Almenaŭ certa tio, ke li emas herezumi. Kiam li estis kompartiano, mi aŭdis lin pli forte kritiki la de tiu Partio gvidadon ol dekiam li ĉesis esti partiano. Kaj ĉu ne estis stranga partiano, stranga civitano tiu, kiu neniam partoprenis balotojn por elekti deputitojn aŭ urbkonsilantojn? Estas ja fakto, ke li, ŝtatinstruisto, neniam klopodis por uzi sian voĉdonrajton. Li tamen jam rakontis, ke iun fojon, li iris al la urbdomo tiucele, sed ĉar li devis atendi eble duonhoron, tio superis la limon de lia pacienco; li do revenis hejmen k neniam plu provis akiri la rajton meti voĉdonilon en keston.

Mi citas tiun anekdoton, tial ke ĝi estas karakteriza. Sed oni ne konkludu el tio, ke la aŭtoro de ĉi tiuj « *Vortoj* » estas malseriozulo. Kiam li diras « jes », tiu vorto fakte estas plen-jesa. Plej granda ĉagreno ĉe Lanti kredeble estas ne povi plenumi promeson libere faritan. Lanti havas ĝuste la spiritostaton, kiu taŭgas por gvidi nian movadon: li certe povas rilati tute senpartiece al la diversaj tendencoj, kiuj kelkfoje kunpuŝiĝas en SAT. Sed li eluzas ĉian okazon por elmontri la strangan, nekonsekvencan starmanieron de tiuj gvidantoj de partioj aŭ organizoj laboristaj, kiuj ne estas esperantistoj. Li estas profunde konvinkita, ke ĉiuj tiuj homoj iel perfidas la klasajn interesojn de l' Proletaro. Perdinte sian fidon al anarkistaj gvidantoj, pro ilia sinteno dum la mondmilito, Lanti, kiu lernis esperanton ĉe la fronto, decidis sin doni plene al la esperanta afero, kio ne signifas, ke li fremdas al ĉio, kio ne rilatas al esperanto, tute ne! — Lanti legas, pliĝuste studas multege da revuoj k verkoj ekonomi-politikaj de ĉiuj socialismaj tendencoj, k ankaŭ

historiajn, filozofiajn k eĉ sciencajn verkojn. Tion li ja faras senhalte de pli ol dek jaroj, k estas iafoje tre mirige konstati, ke homo tiel skeptikema povas tamen esti tiom agema k laborema por afero tiom sendanka k donanta neniom da materia profito. Lia sciavido estas nesatigebla.

☆ ☆

La eldono de ĉi tiu volumo povis okazi dank' al la helpo de 15 K-doj el 9 landoj, kiuj pruntedonis senprocente al SAT la necesan monon. Mi elektis ilin hazarde k interrilatis kun ili letere. Se mi publikigus alvokon en *Sennaciulo*, estas tute certe, ke multe pli granda nombro estus partopreninta la entreprenon. Al tiuj, kiujn mi senigis je tiu plezuro, mi petas senkulpigon.

☆ ☆

La aŭtoro revizis la lingvon, neniel ŝanĝante la sencon de la skribaĵoj. Tio estis nepre necesa, ĉefe ĉe la fruaj artikoloj, kiam Lanti ne estis ankoraŭ la majstra stilisto, kia li fariĝis, kiel atestas la laŭdaj recenzoj pri lia traduko de *Kandid*. Ni opinias, ke ĉi tiu libro estos ne nur dankesprimo de ĉiuj K-doj, kiuj konscias pri la gravo de la rolo de Lanti en nia movado, sed ankaŭ tre bona legolibro por tiuj, kiuj deziras havi modelajn tekstojn. Pri la elekto de la artikoloj, eble ne ĉiuj K-doj konsentos ! Ni agis eble iom arbitre, sed, praktike, estis tute neeble aliel procedi.

Kelkaj K-doj insistis, por ke ni ne tro forlasu el la skribaĵoj de Lanti. Bedaŭrinde estis neeble kontentigi ilin tiurilate. La amplekso de la libro ja povus esti almenaŭ trifoje pli granda.

L. BANMER.

# VORTOJ de K-do E. LANTI

---

# MONDLINGVO

---

## Nia Pozicio

Antaŭ dudeko da jaroj, la lingvistoj ankoraŭ malkonsentis pri la eblo daŭre starigi artefaritan lingvon. Hodiaŭ ili devas agnoski la faktojn : Depost 34 jaroj esperanto vivas k normale daŭrigas sian evoluadon, tute same kiel natura lingvo. Proporcie kiel ĝia uzado disvastiĝas en ĉiuj fakoj de l' vivo : scienco, arto, tekniko ktp., ĝi fleksiĝas k pliriĉiĝas je novaj vortoj k formoj. La kreaĵo de Zamenhof estas nun mirinda lingvo, kapabla traduki ĉiujn nuancojn de la homa penso.

La formulo estas trovita. Kiu ajn konas la strukturon de esperanto, tiu povas, se por tio li havas emon k tempon, naski idojn de esperanto. S-ro de Sosur (Saussure), kiu ŝajne havas pasion por tia ludo, naskis almenaŭ dekduon da ili ekde 1908. Kaj mi scias, ke pluraj amatoraj lingvistoj posedas en siaj tirkestoj mirindajn projektojn ; nur maljusta sorto malhelpis, ke ili trafu en presejon...

☆ ☆

Teorie la problemo estas do solvita k ŝajnas, ke hodiaŭ ni ekiras al praktikaj efektivigoj. La

III-a Internacio starigis Studkomisionon, kies tasko estas raporti antaŭ la proksima internacia Kongreso.

Kia devas esti nia sinteno antaŭ tiu iniciato?

En 1919, en la unua postmilita n-ro de *Esperantista Laboristo,* ni faris tre kategorian deklaron, kiun hodiaŭ ni konfirmas : *unue revolucianoj, poste esperantistoj*. Konsekvence, ni akceptas la disciplinon de niaj klasaj organizoj. La Studkomisiono decidu, k ni akceptos ĝian decidon, kia ajn ĝi estu!...

Estas evidente, ke ni antaŭmetas la kondiĉon, ke la *fakta ordonpovo,* kiun disponas la III-a Internacio, devos fari ĉiujn necesajn aranĝojn por ke la decido de la Studkomisiono ne restu malviva surpaperaĵo. Ni ne povus akcepti la decidon de Komisiono, ne havanta la necesan povon por doni leĝoforton al siaj rezolucioj. La sperto avertas nin pri la senpoveco de morala aŭtoritato, kia ajn granda ĝi estas, por trudi siajn decidojn.

La aranĝoj farendaj devas enteni la *devigan instruadon* de la alprenota lingvo en ĉiuj lernejoj el la landoj, kie la Proletaro jam konkeris la regadon. Ĉie alie, la organoj de la diversaj sekcioj de la Internacio ricevu la instrukcion fari aktivan propagandon por tiu lingvo. Kaj ĉiuj propagandistoj estu devigataj ĝin lerni en difinota tempodaŭro, se ili volas ne esti malkvalifikataj por okupi siajn postenojn, ktp., ks.

☆ ☆

Kia estas nia pozicio antaŭ tiuj, kiuj propagandas surogatojn de esperanto?

La vidpunkto de la skismanoj estus defendebla, se ili povus demonstri :

1) Ke esperanto ne estas *kontentiga* solvo pri la demando ;

2) Ke ido, esperantido, aŭ iu ajn projekto morgaŭ naskiĝonta, estas la *ununura* k *definitiva* solvo.

1') Nu, la 13 internaciaj kongresoj de esperanto, la 70 gazetoj nun aperantaj, pruvas pli ol necese, ke esperanto kontentige solvis la problemon pri lingvo internacia.

2') Por refuti tiun punkton, sufiĉas diri, ke la lingvistoj ne interkonsentas pri la kvalitoj de la diversaj projektoj : Jespersen, el Kopenhago, diras jes ; sed Brandt, el Moskvo, diras ne. La unua pledas por ido, la dua por esperanto. Kaj kiam niaj idistaj K-doj asertas, ke ilia lingvo estas la « scienca » solvo de l' problemo, ni ne povas ne rideti, pensante, ke preskaŭ ĉiuj decidoj de ilia Akademio estas alprenitaj je la *plimulto* de la voĉdonantoj. Kelkfoje eĉ tiu plimulto estis nur unu- aŭ duvoĉa.

En scienca fako, demando restas nesolvita tiom longe, kiom ĝi ne akiras la *unuanimecon* de la fakuloj. Unu sola povas esti prava kontraŭ ĉiuj aliaj. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas memori la nomon de Galileo.

En la nuna stato de la demando, la solvo de la problemo pri lingvo internacia ne estas pure scienca. Ni devas, bedaŭrinde, resti sur la kampo de la empiria metodo. Tion saĝe k modeste faras la esperantistoj per la enkonduko de neologismoj, kiujn akceptas aŭ forpuŝus la uzado. Esperanto tia, kia oni ĝin parolas k skribas hodiaŭ, konsiderinde pliriĉiĝis depost 30 jaroj. Necesas esti blindigita de partieco por ne agnoski tion ; k estas argumenti mallojale, kiam oni kritikas nian lingvon per citado de arĥaismoj kiel ekzemploj.

Ĉar la lingvistoj ne sukcesas interkonsenti, ni lasas al la uzado la zorgon decidi pri dubaj punktoj. Ĝi estas la internacia popolo, kiu prilaboras ĉiutage sian lingvan interkomprenilon.

« Pri lingvaj demandoj, la decidoj ne dependas de gramatikistoj, sed de la homoj, kiuj utiligas la lingvon. La problemo prezentiĝos sub reala aspekto nur kiam Ŝtatoj aŭ, se Ŝtatoj mankas, aro da in-

ternaciaj organizoj (ekzemple sindikatoj) decidos utiligi praktike artefaritan idiomon. »

Tia estas la opinio de unu el la plej eminentaj reprezentantoj de la lingvoscienco. S-ro A. Meje (Meillet) ja diris tion al ni en 1920 per letero, kiun ni publikigis en *Esperantista Laboristo*.

Konsente kun la klera profesoro ĉe la Franca Kolegio [1], konsente kun tio, kion skribis s-ro Kutura (Couturat) en sia majstra *Historio pri Universala Lingvo*, konsente kun Zamenhof mem, ni opinias, ke nur *fakta regopovo* praktike povas solvi la problemon.

Oni do ĉesu paroli pri scienco, kiam povas temi nur pri disciplino k ekpraktikado! Ni klopodu alprenigi la ilon. Per uzado, la estontaj generacioj bone scipovos ĝin poluri k tutperfektigi.

(I-1922.)

# Tri semajnojn en Rusio [2]

## Ĉe la sidejo de Komintern

— Kiom da tempo vi intencas resti ĉi-tie? demandis min K-do Dorjo (Doriot), la sekretario de *Internacia Junularo Komunista*, Franco, kiun mi havis okazon renkonti ĉe la hotelo « Lux ».

(1) France : Collège de France.

(2) Ĉi tio estas ekstrakto el longa raporto pri vojaĝo, kiun en 1922 faris la aŭtoro al Moskvo, por enketi pri la laboroj de iu studkomisiono, kiu fakte estis nur intrigo, lerte aranĝita de idistoj. Tiun vojaĝon li devis fari, tial ke la Moskvaj komunistaj esperantistoj entreprenis nenion por senmaskigi la intrigon.

La tuta raportaro cetere indas esti represata, sed ni devas limigi la amplekson de la libro k pro tio elprenis nur tion, kio interesas esperantistojn. — *Kompilanto.*

— Proksimume tri semajnojn.

— Nu, vi prudente agos, ne prokrastante pri viaj klopodoj. Oni ne kutimas rapidi ĉi-tie. Plie, neniam estas eble scii, kiam oni povos forveturi...

Mi do decidis tuj iri al la sidejo de *Komintern*. Dorjo indikis al mi la vojon, faris desegnon sur paperpeco, k, provizumite per tiu plano, mi iris.

Sen tro granda peno mi trafis la lokon. Sur placo, ne malproksime de l' Kremlo, staras granda konstruo sur kies fasado oni povas legi kvarlingve la faman frazon : « Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu ».

Mi aliris la enirejon. Tie du deĵorantaj soldatoj malpermesis, ke mi eniru. Unu eldiris kelke da vortoj de mi nekomprenataj k gestis al apuda pordo. Mi iris tien, eniris k ekvidis sinjorinojn, sidantajn antaŭ giĉetoj. Mute mi montris mian legitimaĵon, skribis la nomon de la K-do, kiun mi deziris viziti, k ricevis slipon kun kiu mi reiris al la soldatoj. Tiam ili permesis, ke mi eniru. En tiu okazo nur gestoj utilis kiel interkomprenilo.

La de mi vizitoto forestis. Dum unu horo mi sidis en antaŭĉambro, k fine fraŭlino germanlingve komprenigis min, ke mi revenu je la dua posttagmeze. Mi do foriris. Survoje al la hotelo mi havis ŝancon renkonti denove Dorjo, kiu venis ankaŭ viziti la sidejon. Klariginte pri mia maltrafo li konsentis akompani min k prezenti al K-do Rakoŝi, la sekretario de *Ekzekutiva Komitato* de *Komintern*.

Ne tre akceptema estis Rakoŝi. Li alparolis min jene :

— Ha, vi estas K-do Lanti ! Vian mandaton mi vidis ; ĝi ne valoras por ni. Vian organizon ni ne konas. Ĉu ĝi estas komunista ? Ĉu vi konas ĉi tie esperantistajn komunistojn ? Cetere ni ne povas okupiĝi pri esperanto. Ni havas tro da aliaj prizorgendaj taskoj, multe pli gravaj k urĝaj. Mi ne komprenas, ke vi venis ĉi-tien el Parizo pro tia motivo. Vi elturniĝu kiel vi povos. *Komintern* ne povas pagi por turistoj...

Iom bolis mia sango. Kaj sektone mi respondis al Rakoŝi :

— Nu, ĉu do vi supozas, ke mi intencis gastigi min de *Komintern?* Neniel. Mi kutimas kontraŭe elspezi *por* la komunismo k tute ne vivas *per* la komunismo. Vi malpravas fari tian supozon koncerne min. Mi pagos el mia propra poŝo por mia ĉi tiea restado. Sed regulan mandaton mi havas k nepre devas plenumi la al mi konfiditan mision.

Se la mondlingva afero estas por vi bagatelaĵo, nu, mi prave-malprave, kiel internaciisto, konsideras ĝin gravega. Homo kiel Romen Rolan ankaŭ asertas, ke la internaciistoj estas tute malpravaj malatentante tiun aferon...

— Ho, R. Rolan, literaturisto, ne komunisto, intermetis Rakoŝi kun malŝatema rideto.

— Se pri tiu temo ankaŭ valoras nur opinio de komunistoj, mi do citu al vi la nomon de Henriko Barbus, kiu, kvankam literaturisto, estas komunisto. Li ankaŭ opinias, ke internacia lingvo estas nepre necesa por ke vivu vera Internacio, ne Internacio el poliglotaj ĉefoj.

— Ĉu vere H. Barbus interesiĝas pri tiu demando? iom mire demandis Rakoŝi.

Tiam mi prezentis al li ekzempleron de la lernolibro eldonita de *Federacio de revoluciaj esperantistoj franclingvaj,* por kiu Barbus verkis antaŭparolon. Rakoŝi trarigardis la libron kaj diris :

— Bonvolu sidiĝi.

De tiu momento la tono de nia interparolado iom dolĉiĝis. Mi klarigis pri nia movado, montris la cirkuleron de l' franca ministro Berar, kiu malpermesas la instruadon de esperanto en la publikaj lernejoj... Post dudekminuta interparolado, Rakoŝi konfesis, ke eble nia agado povos utili la komunismon, sed konkludis, ke nun *Komintern* ne povas okupiĝi pri la demando.

Tiam mi respondis, ke tute ne estas mia intenco tedi la komunistajn gvidantojn per antaŭtempaj pos-

tuloj. Tia ne estas mia misio. Mi nur venis por esplori la laborojn de la *Studkomisiono por alpreno de helpa lingvo en la III-a Internacio,* kiu estis starigata dum la II-a Kongreso. Mi devas ekscii ĉu la komunistoj povas prave konsideri tiun entreprenon kiel seriozan k indan je atento de ĉiuj komunistaj mondlingvanoj. Kaj mi aldonis, ke kvankam mi estas esperantisto, mi estas preta propagandi k instrui iun ajn lingvon oficiale alprenitan de *Komintern.*

Aŭdante la vortojn : « laboroj de la studkomisiono », Rakoŝi ridetis k tiam diris kion mi jam resume raportis en la oktobra n-ro de *Sennacieca Revuo.* Li aldonis, ke neniu rajtas sin apogi sur la aŭtoritato de *Komintern* por propagandi iun ajn internacian lingvon.

Restis al mi nur peti oficialan ateston pri tiu deklaro por esti plenuminta mian mision. Senhezite Rakoŝi liveris al mi la dokumenton, kies orginalan franclingvan tekston niaj legantoj jam konas (1) ...

---

(1) « Ekzekutiva Komitato de l' Komunista Internacio.
« N-ro 1455.

« Moskvo, 14 aŭgusto 1922.

« K-do E. Lanti, delegito de la esperanta organizo « SAT », « kun aprobo de l' Internacia Sekretariejo de l' Komunista « Partio Franca, veninte Moskvon, celante enketi pri la laboroj « de la *Studa komisiono por alpreno de helpa lingvo en la « III-a Internacio,* estas oficiale informata, ke tiu komisiono « estas jam likvidita k ke la Komunista Internacio alprenis « nenian decidon pri adopto ĉu de esperanto, ĉu de ido.

« Sekretario de E. K. de K. I.
RAKOŜI. »

Ni represas tiun tekston ne nur tial ke ĝi havas gravan valoron k signifon, sed ankaŭ pro tio, ke iu « historiisto » pri mondlingvo, en verko antaŭ ne tre longe aperinta, opiniis utile por si prisilenti tiun fakton, kiu efektive iel vangofrapas lin. — *Kompil.*

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

## ...Vivantigi Esperanton

En la priesperanta raporto akceptita de la *Ligo de Nacioj* oni povas legi pri milionoj da lernolibroj jam disvenditaj en la mondo.

Nu, ni komparu la nombron de veraj praktikantoj de esperanto kun tiu de lernolibroaĉetintoj. Nur abonantoj de esperante redaktataj gazetoj indas esti konsiderataj kiel praktikantoj de la lingvo. Sciante, ke la plej legataj eliras apenaŭ dekmilekzemplere, oni tuj povas ekvidi, kiom sensignifa estas la rezulto de la ĝisnuna propagando.

Kiel klarigi tiun bedaŭrindan konstaton ?

Multaj personoj lernis esperanton nur pro modo, pro ia dandismo. Neniam ili konsciis pri la gravo de la mondlingva afero. Forpasis la modo, aŭ pro ia kaŭzo ili plu ne okupiĝis pri la afero.

La plejmulto el la aĉetintoj de lernolibroj ne ĝisfunde lernis la lingvon. — « Ĝi estas tiel facile lernebla ! » diras la troigemuloj, — k pro tio ne trovas ian ĝuon en legado de esperantaj tekstoj. Tiuj baldaŭ ĉesis interesiĝi pri la movado.

Internaciistoj lernis esperanton, ĉar ili opiniis, ke internacia lingvo estas internaciigilo. Sed ne trovante okazon apliki praktike sian scion, ili ankaŭ forlasis niajn vicojn.

La ridinda, fireligieca spirito, kiu antaŭmilite ĉiam prezidis en esperantaj manifestacioj, forpelis kelkajn revoluciulojn, kiuj ne volis partopreni en movado aspektanta kiel kvazaŭa « Salvarmeo ».

Aliaj kaŭzoj ekzistas, kiuj ankaŭ povus respondi al la ĉi-supre starigita demando.

Kia ajn estas la tialoj, kiuj malhelpis la enplantiĝon de esperanto en la vivo, oni ne povas malatenti la fakton, ke, malgraŭ disvendado de milionoj da lernolibroj, la nombro de veraj praktikantoj estas ankoraŭ tre malgranda.

Tamen, nur praktikantoj de lingvo igas ĝin vivanta : Latinon ĉiutage k devige lernas milionoj da studentoj en la tuta mondo. Spite tio latino restas nur mortinta lingvo, tial ke ĝi ne estas uzata en la praktiko.

Ni do unue devas plene konscii pri la nepra neceso de ofta uzado de esperanto, por eliri, almenaŭ spirite, el la kadro de nia nacio, — cele al tutmonda kulturo. Ni devas ĝisfunde lernadi nian lingvon por ĝui ĝian spiriton k ĝin vivantigi per novaj esprimmanieroj.

Uzi esperanton, ne farante gramatikajn erarojn estas nur akcesoraĵo. Kio gravas, tio estas encerbigi, enmensigi la geniecon de la racia esprimilo, kiun kreis Zamenhof.

Kaj precipe ĉiuj SAT-anoj devas lerte penadi por ke nia organizo ebligu al ĉiuj materialan utiligadon de esperanto.

La ĝisnuna preskaŭ nur varba propagando similis la mitologian barelon de la Danaidinoj. Oni varbis, varbadis, sed la varbitoj nur transpasis la senfundan esperantan movadon.

Mi esperas, ke fine ĉiuj seriozuloj atentos pri la faktoj ; komprenos, ke nia afero estos solida nur kiam la aĉetintoj de gramatikoj ne forlasos esperanton post kelka tempo, sed enviciĝos en SAT por utiligi sian lernan akiraĵon.

Al ĉiuj varbitoj ni komprenigu, ke ili kuntrenas naciecan heredaĵon, kiun necesas forĵeti per kiel eble plej ofta uzado de sennacieca lingvo kun ĉiulandaj samcelanoj. Esperanto estu en niaj manoj trafa edukilo, kiu igos nin indaj mondcivitanoj.

Tiele ĝi fariĝos vere vivanta lingvo, kiu kreos mondkulturon, sennaciecan spiriton, — k helpos al la ruinigo de la landlimoj ; al la forigo de la haladza patriotismo mortiga.

(XII-1922.)

## Signo pri maturiĝo de klaso

Iu karakterizo pri kadukiĝo de klaso estas la fakto, ke tiu klaso ne plu kapablas plej efike utiligi, adaptigi la sciencajn k teknikajn eltrovojn por sia propra prospero k memdefendo.

Kio karakterizas la maturiĝon de klaso, aspiranta al liberiĝo k al mastruma rolo en la socio, estas ĝuste la fakto, ke tiu klaso scipovas pli bone ol la kadukiĝanta uzi ĉiujn progresilojn.

Se oni konsentas pri tiuj du asertoj, oni povas sin demandi, vidante kiel la burĝaro k la proletaro aplikas esperanton, ĉu la unua estas baldaŭ pereonta k ĉu la dua estas klaso tuj kapabla mastrumi la socion.

Ni atentu la faktojn. Antaŭ nelonge okazis internacia konferenco por la apliko de esperanto en la scienca k komerca fakoj. Ni konstatas, ke *266* komercaj ĉambroj, foiroj k similaj institucioj el *32* landoj estis reprezentataj : el la raporto de l' delegito de la Frankfurta Foiro, ni vidas, ke tiu institucio uzis esperanton tiome, ke nia lingvo okupas la *kvaran* lokon inter la lingvoj uzataj.

Nun ni turnu la okulojn al niaj laboristaj organizoj. Ĉu ni povas konstati la saman emon k kapablon utiligi esperanton ? Bedaŭrinde, ne. Konsekvence, ĉiaj ajn iluzioj estu for. Nenio estas pli danĝera ol blinda entuziasmo, kiu ne vidas la realon. Kaj reale estas, ke la internaciaj institucioj de la burĝa klaso scipovas nuntempe utiligi pli bone la progresilon esperanto ol la internaciaj organizoj laboristaj.

Plie estas konstatebla fakto, ke multaj laboristaj gvidantoj ankoraŭ nun opinias, ke la laboristoj ne devas perdi tempon en la mondlingva movado. Komercaj ĉambroj k burĝaj registaroj morale helpas, eĉ mone subvencias la neŭtralan esperantan

movadon. Nu, ĉe niaj plej altaj instancoj ni trovas nur skeptikon k eĉ mokojn pli malpli kaŝitajn.

Ĉu ni devas malkuraĝiĝi pro tio ? Certe ne. Ni ne forgesu, ke nia pure proleta movado esperantista estas ankoraŭ tre juna. Ĝis nun ni ne povis sufiĉe grandskale montri la praktikeblon de la mondlingvo k tiele altiri la seriozan atenton de la laboristaj gvidantoj al nia afero.

Hodiaŭ sufiĉu la konvinko, ke ni antaŭeniras en la bona direkto. Necesas nur ne halti por ke, post pli malpli longa tempo, ni povu postuli, anstataŭ almozpeti, ĉe la laborista gvidantaro, kiel okazas nuntempe.

SAT montris al ni la ĝustan vojon.

Antaŭen !...

(9-VII-1925.)

## Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo

Diri, ke esperanto estas facile ellernebla, estas gravega eraro. Mi asertas, ke ĝi estas pli malfacila ol iu ajn alia lingvo.

— Paradokso !... Absurdo !...

— Eble, sed almenaŭ bonvolu atente pripensi jenon : unu el la ĉefaj trajtoj de l' artefarita lingvo estas ĝia *logikeco*. Sed en preskaŭ ĉiuj niaj faroj ni agas nelogike. Ni obeas kutimojn, tradicion, morojn, leĝojn, kiuj havas nenion komunan kun logiko.

Tiu nelogikeco reflektiĝas en la naciaj *naturaj* lingvoj, kiujn ni jam akiris senlerne ĉe la brusto de nia patrino. Tute nature ni uzas nelogikajn esprimmanierojn. Kaj se ni lernas fremdan nacian lingvon, ni trovas en ĝi similajn nelogikaĵojn, kiel tiajn ekzistantajn en nia gepatra. Tial nia spirito troviĝas kvazaŭ en konata regiono k alkutimiĝas.

Sed esperanto devigas nin senĉese obei logikon, se ni volas paroli korekte k ne nur pli malpli kompreneble. Tia penado al stila logikeco en esperanto estas kontraŭnatura, malfacila k sekve neniam absolute sukcesa.

Neniam mi, vi, ni ĉiuj, kapablos tute perfekte uzadi esperanton. Kapablus fari tion nur ĝisostaj sennaciuloj, t. e. homoj nun ne ekzistantaj.

Ni do konsciu pri niaj mankoj. Estas la unua kondiĉo atentenda, se ni volas almenaŭ progresi sur la vojo al nia mensa sennaciecigo.

Konsekvence, ne diru al viaj lernantoj, ke nia lingvo estas facile ellernebla. Diru prefere, ke ĝia daŭra, senĉesa lernado estas nepre necesa helpilo por nia mensa liberiĝo, por nia propra memkulturo. Diru, ke oni tre facile k rapide povas interkompreniĝi per esperanto, sed ke necesas multaj jaroj nur por ekvidi, ke nuntempe neniu homo funde scipovas la artefaritan lingvon.

Esperanto, la sennacieca lingvo, estas ankoraŭ nun en vindo. Ĝi firme k *nature* povas malvolviĝi nur kiam ekzistos sennacieca popolo.

Malproksima la celo. Sed ne laciĝos la pioniroj.

(10-VI-1926.)

## De la deziro al la efektivigo...

Eĉ marksismo-lernanto scias, ke la produktofortojn de la socio malvolvas la kapitalismo. Ĝi konstruigas fervojojn, grandegajn ŝipojn k flugmaŝinojn; ĝi funciigas poŝton k telegrafon; ĝi eĉ estas devigata doni al proletoj elementan instruon, por ke ili kapablu kompreni ordonojn de inĝenieroj aŭ ofici en kancelarioj. Unuvorte, la kapitalismo estas devigata krei ian kulturon.

Ĉe tia konstato, ĉu oni logike povas aserti, ke

la kapitalismo ne kapablas starigi en la mondo internacian lingvon?

Sendube la internaj kontraŭdiroj de la kapitalisma sociordo ĉiam minacas pereigi milite la civilizon. « La Kapitalismo portas en si la militon, kiel nubaro portas fulmon » (Ĵores). Tion devas plenkonscii la Proletaro k sin organizi por esti preta aliigi la nepre venontan militon en revolucion, por kapti en siajn manojn la regpovon k tiel savi la civilizon per starigo de sociordo sen klasoj k sen landlimoj.

Sed estas ankaŭ historia fakto, ke la militoj tendencas fariĝi pli k pli maloftaj, pli k pli ampleksaj — k pli k pli detruaj. Eble pasos multe da jaroj antaŭ ol okazos alia *mondmilito*. La lasta ŝancelis la fundamentojn de la kapitalismo en Eŭropo. Sed, ĉu oni do ne konstatas nuntempe, ke la kapitalismo reakiras ian ekvilibron? Grandaj sennaciecaj trustoj eĉ provas pli malpli sukcese ordigi, raciigi la produktadon. Fakuloj devas konfesi, ke la ĉefaj kapitalistaj ŝtatoj plifortigis lastatempe sian ekonomian potencon. « Sen ia dubo », deklaris antaŭnelonge Buĥarin, « la kapitalistaj fortoj sur la kontinento pligrandiĝis lastatempe; la situacio de la kapitalismo ekonomie k politike plifortiĝis... »

Se tiel estas, ni devas el tiu konstato tiri logikan konsekvencon : la burĝa esperanta movado havas grundon por labori; ĝi ne estas baldaŭ mortonta, kiel asertas kelkaj K-doj. Ne morgaŭ la laborista movado devos preni en siajn manojn la tutan esperantan aferon...

Se la kapitalismo *principe* kapablas starigi internacian lingvon, ni kompreneble ne devas tion kontraŭstari. Reakcia estus tia sintenado. Ni ja ne kontraŭstaras la starigon de poŝtoficejoj k radiostacioj kapitalistaj. Ni simple devas nin organizi por utiligi por niaj celoj la lingvan ilon, kiel ni utiligas la poŝton k telegrafon.

Ĉu tio signifas, ke la laboristaj esperantistoj devas partopreni la neŭtralan movadon? Certe ne. Kiam laboristo per sia mono k energio subtenas la burĝan movadon, li agas same stulte, kiel tiu, kiu laborus *senpage* por funkciigi kapitalistan poŝtoficejon.

Sed estus same malsaĝe starigi la frontunuecon de la laborista esperanta movado *kontraŭ* la neŭtralan.

Estas necese kompreni, ke nia interhelpa, kulturcela movado ne devas iel ajn esti komparata k kvazaŭigata al iu ajn politika movado. Ni ne devas imiti blinde k senpripense aliajn organizojn, kies taskoj tute malsamas tiujn de SAT. Ni prefere penadu akordigi nian agadon kun la realaj bezonoj de la Laboristaro, rilate tutmondan interligiĝon. Ni ne trudu al nia movado taskojn, kiujn neŭtraluloj povas nuntempe ankoraŭ plenumi.

Se la kapitalistaro, precipe la eŭropa, volas sur ĉiu kampo enkonduki raciigon, ĝi devos nepre ankaŭ alpreni esperanton por lingve raciigi la interrilatojn.

La kapitalisma raciigo laŭnature tendencas fariĝi je la malprofito de la laboristoj, se ili ne rezistas energie per la forto de siaj organizoj. Por pli bone k sukcese kontraŭstari al la kapitalisma ekspluatado, la Laboristaro devas sin organizi mondskale. Kaj por tion fari kiel eble plej facile k celkonforme, ĝi devas ankaŭ raciigi sian organizan laboron per forigo de la lingvaj baroj.

SAT montras la vojon, ĝi liveras la bonan ekzemplon per sia celkonforma organiziteco. Ĉu tia tasko ne sufiĉas por okupi niajn laborfortojn? Dum ekzistas ankoraŭ sur la kvin sesonoj de l' tero la kapitalista regsistemo, ĉu estus saĝe en la laborista esperanta movado jam revi pri la gvidado de la tuta esperanta afero?

Laŭ mi sufiĉas starigi la demandojn, por ke tuj vidiĝu la ĝusta respondo. Ĉiu klaskonscia esper-

antista laboristo sopiras al la suprenleviĝo de sia klaso. Sed necesas ĝuste taksi la nuntempan situacion, k ne kredi, ke nia deziro pri baldaŭa forfalo de l' kapitalismo sufiĉas, por ke ĝi efektiviĝu. Ekde la deziro al la efektiviĝo ekzistas iafoje longa vojo. Nia ĉefa zorgo ne devas esti la gvidado de la tuta esperanta movado. Ni prefere klopodu laŭ la plej bona maniero uzi la ilojn, kiujn kreas la kapitalismo, por nia klasbatalo kontraŭ tiu sama kapitalismo.

(5-I-1928.)

## For la idemon!

Ni ĉiuj scias, kiom la idista entrepreno malhelpis la esperantistan movadon. Plenmano da malspritaj fanatikuloj, aplombe parolantaj je la nomo de pseŭdo-scienco, ofte sukcesis atingi, ke homoj jam konvinkitaj pri neceso de tutmonda interkomprenilo k pri viveblo de artefarita lingvo, tamen lernis nek esperanton, nek idon.

Nun la idista movado likvidiĝas. Kelkaj idistoj tute forlasis la batalon, aliaj aliĝis al nova projekto de lingvo k ceteraj, pli saĝaj, simple eniras la esperantajn vicojn.

La batalo inter esperanto k ido daŭris dum 21 jaroj k finiĝis per plena malvenko de ido.

Sed oni erarus, opiniante, ke la malbona influo de ido ne plu efikas sur nian movadon. En la interna vivo de nia lingvo sentiĝas ankoraŭ la pedanta logikemo enportita de idemuloj. Mi mem pente konfesas, ke dum kelka tempo mi forte estis influata de la idistaj kritikoj. Por obei ŝajnan logikon, oni tro ofte emas plipezigi nian simplan k flekseblan lingvon.

Zamenhof tre klare skribis : « Eksonis la sonoriloj en la granda blanka *konstruo* k multaj knabinoj sin montris en la ĝardeno... » (Fabeloj de Andersen, pĝ. 56). Sed hodiaŭ niaj idemuloj skribas *konstruaĵo*, pretekste, ke tio estas pli logika. Eble, sed *konstruitaĵo* entenus ankoraŭ pli da logikeco!...

Multajn similajn ekzemplojn mi povus citi por montri, ke la ŝajna logiko de idistoj k idemuloj malboninfluas sur la internan vivon de esperanto.

Viva lingvo devas obei la leĝojn de la vivo. Kaj tiuj leĝoj havas nenion komunan kun logikaj principoj aplikeblaj nur rilate abstraktojn. La vivo obeas la leĝon de minimuma peno. Tial la ordinara homo senkonscie ĉiam tendencas uzi por sin komprenigi nur la minimumon da lingvo-elementoj.

Estas bone konate, ke scienculoj ne parolas la saman lingvon kiel ordinaruloj. Kio estas necesa en sciencaj verkoj, tio aspektas pedanta en la ĉiutaga uzado de nia lingvo.

La idista fuŝentrepreno fiaskis. Restas al ni tute senigi je la pedanta idemo, kiu enŝteliĝis en niaj vicoj... (1).

(5-VII-1928.)

(1) Supraĵe pensanta leganto povus eble vidi ian kontraŭdiron inter ĉi tiu artikolo k tiu kun la titolo : *Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo* (Vd. pĝ. 23). Oni devas ne forgesi, ke la aŭtoro emas iafoje paradoksumi ; tion li certe faris en la ĵus nomita artikolo. Tamen kontraŭdiro fakte ne ekzistas. Tie estas aludite al la gramatika k vortfarada malregulecoj k al la idiotismoj ekzistantaj en la naciaj lingvoj ; ĉi tie oni devas kompreni, ke la natura logiko postulas la uzon de nur minimumo da lingveroj. — *Kompil.*

## Malgranda kaŭzo, granda efiko

« Sablero enkroĉiĝis en la uretero de Kromŭel [1] (Cromwell), k jen pro tio la sorto de l' mondo aliiĝis. » Per tia figuro la fama pensulo Paskal celis montri, ke malgrandaj kaŭzoj povas havi grandajn efikojn.

Esperanto estas per si mem io tute ne grava. Sed ni supozu, ke jam antaŭ 40 jaroj ĉiuj gvidantoj de laboristaj partioj, ĉiuj internaciistoj k pacistoj lernus, propagandus k praktikadus tiun racie artefaritan lingvon. Tiaokaze, ĉu oni prave povus aserti, ke la historia procezo irus la saman vojon ?

Kiu partoprenis SAT-kongreson, kiu dum jaroj interrilatis senpere kun K-doj el plej diversaj mondpartoj, kiu sentis sin forte ligita al movado, kie oni ignoras la landlimojn, kie oni parolas saman lingvon, tiu certe jam konvinkiĝis, ke estus tute ne ebla la patriotisma febro, kiu frenezigis en 1914 la spiritojn de milionoj da laboristoj-internaciistoj k kaŭzis tiom da mortigoj k ruinoj.

Nia sennacieca lingvo estas per si mem kvazaŭ sensignifa sablero. Tamen ĝi ankaŭ povus aliigi la sorton de l' homaro, se ĝi ŝoviĝus en la ĝustan lokon, t. e. en la cerbojn de la laboristoj. Esperanto estas nur ilo, kiun oni povas bon- aŭ malbonuzi. Sed ĝi tamen estas nepre necesa al la klaso, kies historia misio estas unuecigi k sekve pacigi la mondon.

Tion ni jam multfoje diris ; sed ripetado tamen estas necesa. Tro da K-doj ja ne sufiĉe konscias pri la utilo k gravo de nia tasko. Tro da SAT-anoj eĉ konsideras sian esperantan laboron kiel akcesoraĵon ; tro da ili elspezas siajn monon k energion en bagatelaj servoj k sensignifaj taskoj...

---

(1) Kromŭel mortis de rena ŝtonmalsano.

Mi ne plu memoras, kiu famulo diris, ke « estas facile plenumi sian devon, sed ĝin koni estas malfacile... »

Nur tiu estas vera SAT-ano, kiu ekkonis, ke la esperanta afero indas, ke oni dediĉu al ĝi sian tutan liberan tempon, sian tutan energion, — sian vivon...

(19-VII-1928.)

## Kiuj estas la saĝaj?

— Mi tre simpatias vian movadon k plene konsentas, ke esperanto estas necesa por la laborista klaso; sed tia lingvo fakte povos utili nur kiam ĝia instruado estos deviga en la lernejoj de ĉiuj landoj...

— !!!???...

— Ne ekscitiĝu; mi parolas al vi kiel homo, kiu havas sperton en laboristaj aferoj...

Tiel parolis eminenta gvidanto de la laborista movado. Kaj ĉiu el ni bone scias, ke tia rezonmaniero estas tipa ĉe la nuraj « simpatiantoj » al nia lingvo.

Simpatio estas ja bela afero! Ĉiu ajn alparolito respondas, ke li simpatias la pacon, ke li malbenas la militon, — kiu kaŭzas tiom da suferoj, da ruinoj ktp. Patose dum horoj povas paroli pri tiu temo « eminentaj » personoj. Sed demandu, ĉu por eviti militon ili konsentus malaperon de « sia » patrio, ĝian kunfandiĝon en pli grandan unuon. Tiam ili rigardos vin kun abomeno, kiel bruligindan herezulon al kiu eĉ ne decas respondi.

Oni vorte volas la pacon, sed fakte oni preparas la militon; oni volas enkonduki esperanton en la lernejoj, sed por tion atingi oni nenion faras. Oni

eĉ kvazaŭ kompateme rigardas al la esperantistoj, kiuj elspezas tempon k energion por ellerni k instrui lingvon, — kiu povos utili nur kiam ĝi estos devige instruata en ĉiuj lernejoj... Ni estas fantaziuloj k la « simpatiantoj » al esperanto estas prudentuloj, kiuj okupiĝas nur pri seriozaj praktikaj aferoj. Ili opinias sin la saĝaj — kaj nin la malsaĝaj.

Tiaj saĝuloj fakte estas mistikuloj. Ili kredas, ke iun belan tagon mirakle esperanto estos instruata en la lernejoj ; mirakle la instruistoj el tiuj lernejoj ekkapablos instrui la lingvon ; mirakle homoj scipovos ĝin flue paroli ; mirakle estiĝos verkistoj, kapablaj doni al la artefaritaĵo animon, senton k imitindan tradicion...

Ĉe tia konstato ni devas pli k pli forte konvinkiĝi, ke estas ni la saĝaj, ĉar ni racie faras pozitivan laboron, ĉar ni konstruas k ne nur planas pri mirakle starigotaj konstruoj...

(6-IX-1928.)

## Pri la Biblio

Eble vi diros — almenaŭ pensos — ke mi deflankiĝas, perfidemas, unuvorte « revizas (1) ». Aŭdu tamen mian konfeson : mi legas la de Zamenhof tradukitan Biblion.

— Ha ! ĉu vere ? ĉu tio estas klasbatala legaĵo ?...

— Mi legas la Biblion por lerni... esperanton. Kaj ĉe tia legado mi konstatas, ke Zamenhof mem lernis sian lingvon ĝis la lasta spiro. Estas klare, ke la genia aŭtoro emis pli k pli forigi la katenojn, per kiuj teoriemuloj, ŝajn-logikemuloj volis — ankoraŭ volas — malliberigi esperanton. Estas al mi

(1) Alude al riproĉoj adresitaj de opoziciuloj al la aŭtoro. — *Kompil.*

klare, ke la Majstro emis pli k pli senbalastigi sian stilon, forlasante neutilajn sufiksojn. Jen ekzemplo:

« Kaj faru la altaron el akacia ligno, havanta la *longon* de kvin ulnoj k la *larĝon* de kvin ulnoj; kvarangula estu la altaro; k ĝia *alto* estu tri ulnoj. »

Kiel oni vidas, la sufikso *ec* estas forlasita, sen ia domaĝo por la klaro. Same Zamenhof tre ofte forlasis la sufikson *aĵ* kaj diras: *riĉo, havo, kovro, dono, plano, akiro* k. s. en kazoj, kiam oni kutimas balaste diri *riĉ-aĵ-o hav-aĵ-o* ktp.

Kompreneble, la aŭtoro de nia lingvo uzas tiujn sufiksojn, kiam li opinias, ke ili estas necesaj por eviti erarkomprenon; sed estas rimarkeble, ke lia sola regulo estas atingi per kiel eble malplej da vortelementoj perfektan kompreneblon.

Ni sukcesis preskaŭ tute detrui la fuŝan agadon de la idistoj en niaj laboristaj rondoj. Bedaŭrinde, en la vivo de esperanto ankoraŭ forte sentiĝas la ida logikemo, kiu celis fari el la artefarita lingvo ian mekanikaĵon.

Ni devas penadi imiti Zamenhof k tute liberiĝi el la emo ŝarĝi nian interkomprenilon per forĵetinda balasto.

For la idemon el niaj vicoj!

☆ ☆

Mi legas la Biblion por lerni esperanton; sed tia legado donas al mi alian instruon. La « Sankta Libro » enhavas partojn, kiuj estas tre maldecaj, aspektas preskaŭ pornografie. Bagatelo. Sed la tuto estas tiom infanece stulta, ke mi volonte rekomendas ties legadon al homoj, kiuj volas akiri la firman konvinkon, ke la religioj sin bazas sur fabeloj porinfanaj. Tamen milionoj da homoj rigardas la Biblion kiel dian parolon; milionoj kon-

servas sian kredon, ne dank' al, sed malgraŭ la Biblio!...

La homo estas stranga besto: en ĝia cerbo baraktas iomete da racio kun multege da kredo k superstiĉo. Kaj oni grave erarus opiniante, ke nur eklezianoj estas sub influo de senbazaj kredoj k superstiĉoj...

(28-III-1929.)

## Se Lenin estus esperantisto

K-do Umo asertas, ke la mondlingva movado ne progresas rapide, tial ke esperanto ne estas sufiĉe perfekta lingvo. Liadire se oni akceptus la reformetojn, kiujn li proponas aŭ aplikas mem, ni vidus nian aferon progresi rapide.

K-do Jeo emfazas, ke se SAT akceptus la programon de lia partio, ĉi lasta fariĝus simpatia al nia lingvo k certe akceptus ĝin.

Ambaŭ K-doj estas tre sinceraj, konvinkitaj k pretas defendi sian vidpunkton ĝis mortkondamniĝo — ekskluzive.

Kaj ekzistas multaj aliaj K-doj, kiuj kredas, ke sufiĉus alpreni la de ili proponitan rimedon aŭ taktikon por baldaŭ atingi la « celon en gloro ».

Mi estas tiaulo, kiu ne kredas je baldaŭa efektiviĝo de niaj deziroj. Sed ne estas malutile esplorети pri la kaŭzoj de tiu malrapida progreso. Laŭ mi, la ĉefa kaŭzo estas, ke ĝenerale la esperantistoj mem ne sufiĉe konscias pri la gravo de la ilo, kiun ili uzas. Estus eĉ pli ĝuste diri, rilate al kelkaj: per kiu ili kvazaŭ ludas. Ja, por granda nombro da esperantistoj la partopreno en nia movado estas ia ludo, ia modo, kiujn ili forlasas, tuj kiam logas ilin alia modo.

Por konscii la gravon de la esperanta afero,

necesas kompreni la grandan rolon, kiun ludas la tekniko, la artefaritaĵo en la evoluo de l' homaro; necesas kompreni, ke la artefarita lingvo estas ia teknikilo, kies manipulado k aplikado postulas tute apartajn zorgojn, por sin trudi al la granda publiko.

Tia ilo ne povas akiri ĝeneralan akcepton, se precipe mallertuloj ĝin uzadas. Sed ni supozu, ke Tolstoj, R. Rolan, H. Barbus, M. Gorki k. a. famaj verkistoj, anstataŭ diri kelke da bombastaj frazoj por esperanto, ĝin ellernus k per ĝi verkus; ni supozu, ke Ĵores, Bebel, Lenin k. a. influhavaj gvidantoj parolus en nia lingvo dum internaciaj kongresoj; ni supozu..., — la leganto mem daŭrigu la supozon. Nu, ĉu oni ne povas prave pensi, ke tiam nia movado antaŭenirus grandpaŝe? Mi kredas, ke se Lenin estus esperantisto, nun la tuta klerularo el Sovetio, la tuta komunistaro en la mondo parolus esperante. Kaj kiu kontraŭdiros, se mi asertos, ke tiam la unueco de penso k agado, la unueco de volo estus multe pli fortaj ol fakte ili estas nuntempe en proletaj vicoj?

Necesas forte konvinkiĝi, ke la esperanta afero ne estas io akcesora, al kiu sufiĉas dediĉi kelkajn horojn de tempo al tempo por esti konscia mondlingvano.

Teknikiloj ja revoluciigas la mondon. Sed ne sufiĉas inventi ilin; ne sufiĉas laŭdadi ilin, necesas plie lertaj teknikistoj por funkciigi ilin bone.

La SAT-anoj fariĝu bonaj teknikistoj! Ili uzadu zorge, ame la lingvan ilon, kiun ili akiris; ili lertiĝadu, neniam forgesante, ke ilia laboro por k peresperanta estas revolucia laboro en la profunda senco de l' vorto.

(13-VI-1929.)

## Pri stilo

Jenan leteron mi ricevis :

« Kun granda intereso k vera ĝuo mi legis *Kandid* en via modela traduko. Ankaŭ mi legis diversajn recenzojn tre favorajn k aparte mi notis, ke oni laŭdas vin pro tio, ke vi kuraĝis senbalastigi la lingvon je senutilaj sufiksoj. Estas certe, ke tia senbalastigo faras la stilon pli malpeza. Venis al mi en la kapon la ideo eltrovi la principojn, kiuj gvidis vin. Mi serĉis sensukcese. Ĉu do vi ne konsentos konigi ilin al la legantoj de *Sennaciulo* ? Aŭ ĉu la sekreton vi volas gardi ? »

Nia korespondanto trovu do ĉi tie respondon : Novajn principojn mi ne eltrovis, sed simple penis pli malpli severe apliki tiujn, jam delonge (1913) starigitajn de la Akademio ; sekve kuŝas en la afero neniu sekreto. Jen la principoj :

« *a) Principo de neceso :* En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn k finiĝojn necesajn por elvoki klare k plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

« *b) Principo de sufiĉo :* Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone k nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila k nenecesa. »

La malfacilo kuŝas nur en la apliko de tiuj du tre saĝaj principoj. La gvidantoj de niaj lingvaj institucioj devus klarigi ilin detale per multaj ekzemploj ; bedaŭrinde, miascie, tion ili ne faris k eĉ en la praktiko ili mem plej ofte ne aplikas la duan principon.

Por klarigi mian komprenon pri la apliko de tiu principo, ni konsideru, ekzemple, la sufikson *ec*.

Ĝenerale mi « elĵetas » tiun sufikson ĉe radikoj *adjektivaj*. Tiaj radikoj enhavas en si jam abstraktan sencon, sekve la aldono de *ec* tiakaze estas simpla balasto, pleonasmo. Cetere, oni povas rimarki, ke Zamenhof mem k. a. plej bonaj aŭtoroj tute hazarde, senkritike uzas aŭ ne uzas la sufikson *ec*. Jen oni legas « eblo », jen « ebleco » ; jen « neceso », jen « neceseco » k. s.

Mi jam rimarkigis ĉi tie [1], ke Zamenhof en *La Biblio* senkompate « elĵetis » *ec* ĉe *alt', grand', larĝ'*. Tiuj radikoj ja estas adjektivaj k sekve entenas jam en si *ec*-an, abstraktan sencon.

Oni povus verki detalan disertaĵon pri la demando : Kiel aplikas la verkistoj la du ĉi supre cititajn principojn ? Estus facile montri, ke ili estas senĉese malobeataj, fuŝe aplikataj de tiuj, kiujn oni kutimas nomi niaj plej bonaj aŭtoroj.

Verdire kulpas en tio la senkonscia ligiteco al la nacia gepatra lingvo. La fuŝantoj de la spirito de esperanto — k la aŭtoro mem ne malofte — simple estas senkonsciaj naciemuloj en la uzado de la lingvo ; iafoje ili aplikas tute senbezone sufiksojn, tial ke per tio esperanto pliproksimiĝas al la nacia lingvo.

Kaj tio okazas ne nur pri sufiksoj, sed ankaŭ en prefero por longaj, pezaj formoj kiel *ĉiamaniere, kiamaniere, neniamaniere, tiamaniere*, anstataŭ la simplaj *ĉiel, kiel, neniel, tiel* k. s. vortoj el la genie elpensita tabelo de la korelativaj vortoj. La unuaj formoj estas internaciecaj, la duaj — sennaciecaj.

Vi nun iomete konas la regulojn, kiujn mi obeas en la uzado de nia lingvo. Sed vi devas tamen kompreni, kè en la vivo de lingvo interpuŝiĝas diversaj principoj : analogio, eŭfonio, logiko, reguleco ktp. Estas neeble difini tute precizajn k

---

[1] Komparu pĝ. 32.

absolutajn regulojn. Cetere, ne ĉiam pleonasmo estas foriginda ; necesas iafoje insisti por doni pli da esprimforto al iu vorto ; okazas, ke ia logika mallonga formo estas malbonsona...

Ni memoru la saĝajn konsilojn de la aŭtoro de nia lingvo ; li ja ĉiam rekomendis, ke oni ne devas ĝin kateni per tro severaj reguloj. Sed estas por mi klare, ke la plej simplaj formoj venkos, ke la plej klara stilo sin trudos k fariĝos klasika. Kiu penas atenti tiujn postulojn de la vivo de lingvo, kiu penas kiel eble plej senbalastigi sian stilon, tiu iras en la ĝusta direkto.

(5-XII-1929)

## Ĉu kreo aŭ nur iniciato ?

Oni ne malofte babiladis pri la demando, ĉu Zamenhof « kreis » aŭ nur « iniciatis » esperanton. Li mem deklaris : « Mi ne volas esti *kreinto* de l' lingvo, mi volas nur esti *iniciatoro* ».

Ni komprenu ĝuste la signifon de la vortoj : « Mi ne volas... mi volas nur ». Cetere, Zamenhof diris aliokaze, ke « *kreado* (substreko nia) de plena en ĉiuj rilatoj taŭga k vivpova lingvo postulas specialan talenton k inspiron ».

Ĉu ne estas eble eliri el tiuj ŝajnaj kontraŭdiroj ? Certe jes ! Sufiĉas por tio kompreni, ke ĉiam la vortoj havas sian plenan k precizan signifon nur en kontakto kun la kunteksto k plie, ke oni devas scii, en kiu tempo, en kiuj cirkonstancoj ili estis eldirataj. Kompreneble tian esploron mi ne povas fari en la kadro de ĉi tiu artikoleto.

Mi tamen asertas, ke Zamenhof fakte « kreis »... la *fundamenton* de nia lingvo ; li donis al ĝi spiriton, animon — pli ĝuste, vivpovon. Sed prave oni ankaŭ povas argumenti, ke li estis nur ĝia

iniciatinto. Estas ja evidente, ke esperanto evoluas, pliriĉiĝas, plifirmiĝas kun sia ĉiutaga, ĉiufaka aplikado.

Homo, vivanta en antaŭfiksitaj kondiĉoj, rezultantaj el multe da heredaj, historiaj k ekonomiaj faktoroj, homo el karno k sango — Zamenhof! — enkorpigis la ecojn necesajn por lingvon « krei », « artefari », « naski » — kiel al vi plaĉos! — Jes, homo, *individuo,* ne kolektivo, ne komitato.

Sed la « kreita », « artefarita » aŭ « naskita » lingvo estis ĉe la komenco kvazaŭ malforta infano, ŝanceliĝema sur siaj kruroj ; ĝi bezonis nutron, zorgon, edukadon k spacon por akiri la necesan forton k konkeri la mondon. Tion povis al ĝi donadi nur *kolektivo.* Sekve oni ankaŭ povas aserti, ke la nunan esperanton kreis — kreas! — kolektiva kunlaborado.

Se Zamenhof vivus en malgranda insulo, perdita en Oceano k havanta neniujn rilatojn kun la ekstera mondo, li certe ne « kreus » esperanton. Sed tio ne signifas, ke nia lingvo povus ekzisti sen « kreinto », nur per la mirakla forto de la kvazaŭ diigitaj « produktaj fortoj » [1]. Kiuj asertas, ke nia artefarita lingvo (ne temas pri natura idiomo) rezultas de « socia produktado » aŭ de io simila, tiuj iel parencas mense kun s-ro Merĉnt (Merchant), la prezidanto de la *Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado,* kiu lastatempe skribis, « ke Esperanto estas unu el la plej grandaj benoj iam donacitaj de la Bona Dio al la homaro, pere de la genio de homo ».

---

(1) Oni ne miru . i mia insisto tiurilate. La demando ja estas tre grava : temas forte konvinki niajn K-dojn, ke iliaj volo, persisto k sindonemo kondiĉas grandparte la sukceson de nia movado. Ni ne devas blinde malatenti la fakton, ke la grandega plimulto da esperantistoj tute ne komprenas la veran socian, historian signifon de artefarita lingvo k pro tio tre diletante rilatas al nia afero.

Ĉiama problemo : Ĉu la medio faras la homon k ĉu li restas absoluta sklavo de la medio? Tro unuflanka elmeto de l'demando. La homo estas parto de la medio — k ĝia plej aktiva parto. Li transformas la medion, adaptas ĝin al si k sekve okazas, ke la transformiĝo atingas tioman gradon, ke la vivkondiĉoj, la produktaj fortoj fariĝas tute malsamaj; tial ili reefikas sur la transforminton mem. Senĉesa luktado k ekvilibro de kontraŭaj inter si fortoj!

Homo artefaris esperanton; homoj, miloj da homoj aplikas ĝin k per tio arte aliigas la medion, faciligante la interrilatojn, kreante novan spiritostaton, eĉ novan ideologion...

Tamen restas multnombraj revoluciuloj, internaciistoj tiom sklave adaptiĝintaj al la medio, tiom rutinemaj sur tiu kampo, ke ili tute ne atentas la mondlingvan movadon. Se hazarde, okaze, ili paroletas pri « kunfandiĝo de nacioj », tiam ili prezentas al si ankaŭ kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj en unu solan — *naturan*.

Bonan ŝancon!...

Dume ni senlace aplikadu nian herezan, artefaritan esperanton.

(19-XII-1929.)



# ORGANIZADO

## " Liberiga Stelo [1] " al la Verdruĝuloj

### Celo kaj rimedoj

Jam esperanto larĝe disvastiĝis tra la mondo. En ĉiu regiono nun troviĝas samidealanoj, povantaj samlingve interkompreniĝi. Pro tio ili deziras kunigi siajn fortojn por labori pli efike al la realigado de sia idealo.

« Unuiĝo faras forton ». Jen ofte aŭditaj vortoj! Por unuiĝi estas necese interkonsenti : 1e) pri la celo ; 2e) pri la rimedoj uzotaj por ties atingo.

Ĉiuj internaciistoj, pacistoj, homaramantoj celas forigi el la mondo la militon k krei harmonian staton. — Eĉ plej furiozaj militistoj deklaras, ke ili militadas por pacigi k ordigi la mondon. Ne mankas do interkonsentantoj pri la unua punkto. Sed pri la dua la opinioj estas plej diversaj k eĉ ofte kontraŭaj.

« Liberiga Stelo » deziras klarigi, k, se eble, pravigi sian propran vidpunkton meze de la opinidiverso.

---

(1) SAT ekzistis jam embrie sub tiu nomo antaŭ ĝia fondiĝo en Praha. Ĉi tiu artikolo povas esti konsiderata kiel la *manifesto*, kiu direktis nian movadon ĉe ĝia naskiĝo. — *Kompil.*

Unue, ĝi deklaras, ke, en sociologiaj tezoj, neniu kapablas demonstri, kia estas la plej bona el la rimedoj uzotaj por pacigi la mondon. Nur la praktika provado povas aŭ ne pravigi iun ajn tezon.

Jam la historia eksperimento instruis al ni : 1e) ke la ofte citita k aplikita proverbo *si vis pacem para bellum* neniam donis al la mondo daŭran k efektivan pacon ; 2e) ke la *dogmaj* religioj, eĉ havantaj altan etikon, estis senpovaj por interfratigi la homojn. — Militojn eĉ okazigis plurfoje la fanatiko de la kredantaro.

Konsiderinte tiajn faktojn, « Liberiga Stelo » forpuŝas el sia mezo militistojn k dogmajn religiulojn. Ĝi opinias, ke por pacigi la mondon estas unue necese naskigi en ĝi **juston.** Justo devas regi la rilatojn inter la individuoj ; justo devas prezidi ĉe la rilatoj inter iuj ajn homgrupiĝoj, ĉu teritoriaj, ĉu profesiaj, ĉu alispecaj.

Dedukte, « Liberiga Stelo » kondamnas la senjustan principon de la kapitalista sistemo vortigebla jene : *kiu havas monon, tiu manĝas.* Tiel oni povas vidi personojn, kiuj nenion utilan faras k tamen abundege konsumas, tial ke ili havas monon !

« Liberiga Stelo » estas *kontraŭkapitalisma.*

Al tia senjusta principo ĝi kontraŭmetas la jenan : *nur tiu* (sana) *manĝas, kiu laboras.* Tiu lasta postulato estas la bazo mem de la socialismo, aŭ komunismo.

Do, « Liberiga Stelo » estas *socialisma.*

Ĝi tute diferenciĝas je la nure pacismaj asocioj, kiuj ne celas unue starigi juston inter la homoj k kontentiĝas per vanaj paroloj prediki pacon al la popoloj. La pacistoj estas eble bonkoraj homoj, sed ili fermas la okulojn por ne vidi la verajn militkaŭzojn. La milito latente ekzistas ĉiam inter ekspluatantoj k ekspluatatoj. Veran pacon povas nur havi socia ordo bazita sur justo, egalo, aŭ, se oni preferas, sur ekvivalento. Maljusto estante ĉe

la fundamento de la nuna socia sistemo, estas do tute logike, ke maljusto ankaŭ regu la rilatojn inter la homaj grupiĝoj, ĉu naciaj, ĉu ŝtataj, k okazigu militojn. Tial la nure pacisma movado estas tute iluziplena k pro tio povas eĉ esti danĝera.

## Nia pozicio

Dirinte tion por montri nian komprenon pri la sociaj fenomenoj, temas nun difini la pozicion de « Liberiga Stelo » rilate al la diversaj organizoj, kiuj havas similan koncepton k batalas por renversi la kapitalistan ordon.

Kiel ni jam diris, neniu povas havi absolutan certon pri la plej trafaj rimedoj uzotaj. Konsekvence, ĉar nia tasko ne estas senpere batali kontraŭ la materiaj fortoj de la nuna socio, ni ne intencas elekti inter la diversaj partioj, organizoj aŭ tendencoj.

« Liberiga Stelo » alvokas la sincerulojn, bonvolulojn el ĉiuj samcelaj partioj.

## Nia tasko

Kia do estos la tasko de la « liberigstelanoj » ?

Ĝi estos batali kontraŭ la spiritaj, moralaj fortoj, kiuj subtenas la senjustan, ĥaosan reĝimon kapitalisman. La tasko de « Liberiga Stelo » estos zorgi pri la kreado de spiritstato, kiu harmonios kun la estonta socio — kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj k ŝtataj landlimoj ne plu ekzistos.

La ideala socio ne devenos tute preta el la Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Oni anstataŭas bone ion, nur metante je ĝia loko alion pli perfektan. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitano, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapojn k korojn.

Ni ne devas malatenti la teruran sperton de la mondmilito. Ĉu do la spektaklo travivita, ekzemple, en Parizo k Berlino, komence de aŭgusto 1914, ne estas instrua? Kial la patriota febro estis tiom forta, tiom akra, ke eĉ la plimulto el la t. n. internaciistoj entuziasmege kantaĉis militemajn kantojn? Nur unu respondo estas akceptinda : tiuj individuoj ne sufiĉe estis antaŭe penintaj forigi el si mem la naciece malamindan edukadon enlandan.

Oni jam riproĉis al « Liberiga Stelo », ke ĝi « fermas la okulojn k obstine ne volas vidi tion, kio ekzistas : la nacioj! »

Ne, tute ne, ni ne fermas la okulojn. Kontraŭe, estas pro tio, ke ni tiel malfermokule k enfunden rigardadis la malbonfaron de la nacioj, ke ni deziras krei organismon, kies esenca celo estos produkti antidoton kontraŭ la nacieco. Estas vere, ke « nacio » kaj « naciemo » ne havas tute saman signifon. Nu, ĉu tamen oni povas nei, ke naciismo eliras tute nature el nacio, kiel veneno el la gorĝo de vipuro, kiel fanatiko el la dogmaj religioj, kiel ŝovinismo el patriotismo?

## Samlingveco

La demando estas jena : ĉu la nacioj estas la lasta grado de la evoluo ĉe la homaj socioj? Ĉu do, kiam unu sola lingvo estos parolata de ĉiuj en la mondo, oni devos tamen ankoraŭ konservi la nunan formon por la rilatoj inter la homgrupiĝoj? Kiu kuraĝus respondi jese?

Ni opinias, ke la estontaj organizoj estos profesiaj aŭ fakaj k *tutmondaj*, ne « internaciaj ». La nacio en tiu estonta tempo estos rigardata proksimume kiel estas nune la provincoj en la nacioj.

Pro tiuj konsideroj, ŝajnas al ni, esperantistoj, nepre necese tuj komenci la starigon de organizo, funkcianta kiel estos plej eble laŭ la direkto montrita al ni de la historia evoluado ĉe la socioj. Oni

trafe agas — eĉ senbrue — kiam oni klopodas laŭdirekte al la estonto. Sed kiuj marŝas ne gvidate de la liberiga stelo montranta la estonton, tiuj samloke paŝadas k senkonscie malhelpas la antaŭeniradon.

Tial ke ekzistas nuntempe nacioj k ŝtatoj, ni bone scias, ke la naciaj societoj estas necesaj por difinite *malampleksaj celoj*. « Liberiga Stelo » ne intencas do malhelpi la fondon de naciaj organizoj aŭ detrui la ekzistantajn. Sed, ĉar ni estas *samlingvanoj*, ni volas tuj profiti tiun fakton por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio. Pro tio ke la naciaj asocioj estas nun necesaj, de tio ne sekvas, ke ili devas esti la *ĉelo* de tutmonda asocio de samlingvanoj. Ni deziras, de nun, krei sennaciecan popolon. Ni volas, ke ĝi senprokraste kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- k agadkapablo.

## Unueco-Diverso

Malgraŭ ĉiaj obstakloj la homaro marŝas al *unueco*. Ĉu oni devas timi, ke tiu unueco estos unutona, samkolora ? Tute ne ! La etnikaj, klimataj fortoj daŭrigos agi sur la individuojn k malhelpos unutonecon. La indiĝenoj ĉiam konservos siajn originalecojn.

Timo pri ebla unutoneco, eĉ se ĝi estus pravigita, ne povas cetere forgesigi al ni la nune realan malbonon : la nacioj elirigas el siaj poroj venenigan naciemon, kiu estas grava baro al la dezirinda universaleco.

## Praktikeco

— Vi dronas en la nuboj, diros sendube kritikemaj skeptikuloj. Neniam vi sukcesos grupigi grandnombran anaron per tia malproksima celo.

— Ni volas esti kvazaŭ ennube idealistaj, respondos ni, k samtempe tre praktikaj. Sed ni atentas,

ke nia agado estu orientata de alta celo por ke, pretekstante praktikemon, ni ne vadu en la marĉoj el nuntempaĵoj.

Tial ke oni emas pensi pri sia propra propagando, en sia propra medio, oni tuj reprezentas al si grupon en sia urbo, federacion de grupoj en sia nacio k federacion de nacioj en iu internacio!

Tio ŝajnas al ni arkaisma k ne konforma al nia celo.

Ni kontraŭe vidas **centron** — ĉiam alilokiĝeblan — al kiu *rekte, senpere,* direktiĝos la viva fluido; centron, kiu konservos la *unuecon* de la organismo.

En vivanta organismo la viva forto ne restas senmova; ĝi disrevenas al la malproksimaj ĉeloj, tiele, ke senĉesa kontakto ekzistas inter la koro k la diversaj aliaj organoj.

Tia rondfluo estas la leĝo mem de ĉiuj vivantaj organismoj. Se ni deziras krei vivpovan organizon, ni devas imiti tian leĝon.

## Provizoreco de la Statutoj

Ni ne volas pridiskuti la jam publikigitan statuton — ĝi estas provizora.

Ni nur alportis kelke da ŝtonoj por la fundamento de la konstruotaĵo kaj larĝtrajte desegnis la planon. Restas al ĉiuj, kiuj bezonas konstruon, aldoni alian materialon, korekti aŭ aprobi la planon. Pri la definitivaj formoj ni decidos, proksiman jaron, en Praha.

En Esperantio la antaŭenemuloj ne povas resti pli longe sen domo. Ĝi estu firme bazita, fortike konstruita, aeroplena k enirebla nur al vere indaj mondcivitanoj!

Al la laboro!

(XI-1920.)

## Ĉu internacia aŭ sennacieca organiziĝo ?

En 1914 ekzistis socialista *Internacio*.

Ĉe la fino de la internaciaj kongresoj estis kutimo ĥore kanti la « Internacion ».

Milito eksplodis... Tuj la socialistoj forgesis tiun liberigan kanton k ekkantaĉis la « Marseillaise », « Deutschland über alles » aŭ aliajn similajn patriotajn himnojn.

Ni iru Berlin'on, kriadis Francoj ; ni iru Paris'on, laŭtdiradis Germanoj. Ni batalu por la kulturo !... Ni batalu por la rajto k libero !...

Tiel, irante al buĉejo, blekas ŝafoj...

La patriotista febro estis tiel granda, ke eĉ anarkistoj, kontraŭmilitistoj k aliaj ...istoj — precipe la maljunaj — gloris la « liberigan militon » k instigis al « ĝisfinvenka » buĉado...

Nun estas kvazaŭa repaciĝo. Temas pri restarigo de nova Internacio. Ĉu revivigi la II-an ? Ĉu aliĝi la III-an, Moskvan ?

Ankaŭ esperantistoj volas starigi ruĝverdan Internacion.

Nu, ni pripensu iom la aferon.

Internacio supozas naciojn. Malbona afero.

— Tamen, nacioj ekzistas.

— Jes, ja, malfeliĉe ; malsanoj, epidemioj ankaŭ ekzistas. Ĉu estas saĝe konservi tiajn malbonaĵojn por sanigi la homaron ? Kontraŭe, ilin penos forigi, neniigi, zorgema kuracisto.

Nacioj ekzistas precipe pro la diverslingveco de l' popoloj. Esperanto donas al la homaro eblon forigi tiun lingvan naciecon. Ĉu do ni, kiel la aliaj ...istoj neesperantistaj, devos sammaniere imagi organiziĝon de ĉiulandaj samcelanoj ?

Mi ne kredas. Ni devas agi kvazaŭ ne ekzistus nacioj. Ni devas ilin koni nur por pli rapidigi neniiĝon ilian. Ni devas naskigi sennaciecan senton ;

meti en la koron de ĉiu homo econ homan, ne naciecan. Kiam, en Esperantio, oni parolas pri Anglo, Franco aŭ Germano, tio devas samsignifi kiel en Francio, ekzemple, oni parolas pri Normando aŭ iu ajn alia provincano.

Unue esperantistoj, homoj ; due Britoj, Italoj aŭ Ĉinoj...

Jen kelkaj pripensindaj ideoj, kiujn mi proponas al diskuto de ĉiuj.

(IV-1920.)

## Je la lumo de la sperto

Ekrigardante nian postmilitan movadon retrospektive, ni konstatas, ke kelkaj famuloj favore rekomendis esperanton. Memorige mi citu kelke da nomoj : la nobla pacisto *Romen Rolan,* la scienculo *Karlo Riŝe* (Richet), la revoluciulo-verkistoj *Henriko Barbus* k *M. Gorki,* la poeto *Eduin Markm* (Edwin Markham), la saĝulo *Han Riner,* la aŭtoritata lingvisto *A. Meje* (Meillet) k aliaj.

Grävaj organizoj voĉdonis deziresprimojn por esperanto, k eĉ kelkaj, kiel la *Internacio de l' Militintoj* k la *Edukista Internacio,* per kongresaj decidoj alprenis ĝin kiel sian oficialan lingvon.

Nu, kia estas la rezulto de tiuj aproboj k decidoj ? Ni bedaŭrinde povas konstati, ke ĝi estas preskaŭ nula.

Grandan esperon ni havis rilate la sintenadon de Sovet-Rusio pri nia afero. Kaj jen, lastatempe ni eksciis, ke la rusa Registaro seninteresiĝas pri nia propagando, eĉ likvidas la poresperantajn organizojn, kiuj de nun estos nur privataj entreprenoj.

La *Studa Komisiono por alpreno de helpa lingvo ĉe la III-a Internacio* jam ne donas viv-

signon. Ĝi ne atentas la ricevon de dokumentoj k eĉ ne respondas al informpetoj. De tiu flanko ni ankaŭ ne atendu gravan rezulton, se ni ne volas senreviĝi.

Kaj la famuloj, kiuj rekomendis esperanton, ĉu mem ili lernis ĝin ? Eble ili lernetis, sed certo estas, ke praktike ili ne uzas nian lingvon. Pro tio iliaj aproboj k instigoj estas nur duonvaloraj, ĉar la ekzemplo ne apogas la konsilon. Estas tamen nedubeble, ke se iu talenta verkisto penus por funde scipovi esperanton k verkus per ĝi, nia afero antaŭenmarŝus grandpaŝe.

Tion ni ne esperu : la literaturistoj konsideras sian tempon tro multekosta por dediĉi iom da ĝi al funda lernado de nia lingvo. La politikistoj estas tro okupataj ĉe solvo (?!) de ĉiutagaj problemoj por interesiĝi pri nia afero.

La sukceso povas veni nur de malsupre. Estas nia modesta tasko penetrigi en la vivon la uzadon de internacia lingvo.

☆ ☆

Ni ekrigardu alian flankon de la problemo : la kursojn. Ĉu la rezulto estas tie kontentiga ? Multloke instruistoj plendas pro malsukceso. En « Kroniko » ofte estas sciigate pri malfermo de kursoj kun multenombra lernantaro. Sed plej ofte oni silentas pri la fermo por ne konfesi fiaskon. Estas do necese, ke ni atentu ankaŭ pri tiu fakto por orienti nian propagandon.

Oni tro klaĉadis, ke esperanto estas « tiel facile lernebla ! », ke oni povas encerbigi ĝin en « kelkaj semajnoj » da lernado. Tio estas malvera. Kaj la laboristoj tiele trompitaj forlasas la kurson je la unuaj malfaciloj. Sufiĉu diri la veron : esperanto estas multe pli facile akirebla ol iu ajn nacia lingvo.

Ni precipe insistu al la varbotoj pri la nepra

neceso de komuna, sennacieca lingvo por la vivo de Internacio. Ni ne laciĝu montri la nekonsekvencon de la t. n. internaciistoj, kiuj ne konscias pri la gravo de nia propagando. Ni demonstru, ke ili konstruas sur sablo, dum ni starigas nian konstruon sur roko; ke ili komencas meti la tegmenton en malplenon dum ni pacience masonas fundamenton. Ni konigu al la amaso, ke niaj ĉefoj estas preskaŭ ĉiuj pli malpli plurlingvanoj, pro tio ricevas delegitecon al la internaciaj kongresoj k tute ne estas interesataj, ke oni malaperigu la lingvajn malfacilojn. Ni klarigu pri la grandega valoro de internaciaj rilatoj por naskigi ĉe nia koro veran, sinceran senton de amikeco al tutmondaj Kamaradoj. Ni senlace ripetu : kiu ne havas amikojn en ĉiuj landoj, tiu ne rajtas sin konsideri kiel indan internaciiston.

Pli trafe : komprenigu ni, ke estas jam tempo por celi al universalismo, al sennaciismo ; ke la esperantisto-revoluciuloj komencis krei la ĉelon de tiucela organismo : nian SAT. Ni montru ankaŭ per nia nekompromisemo kun la burĝaj esperantistoj, ke ni estas la plej konsekvencaj el la revoluciuloj.

☆ ☆

Sed antaŭ ol almiliti la internaciistojn, kiuj ne sufiĉe atentas pri nia propagando, estas unue necese, ke la esperantistoj mem plene konsciu pri la gravo de la mondlingva problemo. Estas urĝega tasko formalaperigi el niaj rondoj ĉian neseriozon, ĉian emon al blufo k trograndigo ; unuvorte ĉion hereditan el la burĝa movado.

En niaj rondoj estu ne nur verdstelportantoj, sed veraj praktikantoj de la lingvo. Ĉar estas konstatebla fakto, ke multaj ne penas sufiĉe ellerni la lingvon, ni devas instigi ilin per ia konkuremo. La aniĝo al SAT povos esti instigilo. Ĉiu deziranta

aniĝi devus pruvi, ke fakte li uzas esperanton. Kompreneble ni ne povas postuli, ke aniĝdeziranto perfektege estru la lingvon. Cetere estas en ĝi tro da punktoj pri kiuj niaj «eminentuloj» ne interkonsentas. Ili eĉ ofte riproĉas unuj la aliajn, pri nekorekta uzo de esperanto. Eĉ Zamenhof estas kulpigita pri gravaj eraroj, troviĝantaj en lia verkaro. Sufiĉas postuli, ke ĉiu estu kapabla bone komprenigi sin. Kiam oni scios, ke por fariĝi «Satano» estas unue necese scipovi esperanton, tio estigos en la kursoj tre efikan instigon por la ellernado.

Oni bonvolu ne konkludi el miaj premisoj, ke mi estas iel pesimista. Tute ne. Mi nur celas atentigi la Kamaradaron pri danĝero de iluzioj k pri forfaligendaj baroj; pri neceso de longdaŭra, sistema, metoda k zorge antaŭpreparita klopodado por varbi la indiferentulojn k silentigi la kontraŭulojn. Ni kvazaŭ transirante grandan arbaron el rutino k antaŭjuĝoj, devas iri malrapide, sed kuraĝe dishaki, por fari lumon k forpeli la nigrajn bestojn embuskataj en densejoj.

La propagandistoj estas ja pacaj batalantoj, tamen batalantoj. Ili do devas agi kun plej scienceca strategio k plej zorga antaŭpreparo. Kiam oni ekiras militon nur entuziasmigite k ne preparite, tiam malvenko okazas.

La batalo por trudi esperanton al la Internaciistaro apenaŭ komenciĝis. Ni antaŭeniru celrigardante, kun la plena konscio, ke la objekto por kiu ni batalas estas nobla k inda je ĉiaj oferoj.

(III-1922.)

## Publika letero al Romen Rolan

Kara Romen Rolan!

Vi jam scias per mia respondo al via publika letero, presita en *Le Journal du Peuple* (Ĵurnalo de l' Popolo), en kiaj cirkonstancoj, sub kiaj influoj estis balote aprobata la artikolo III-a, enmetenda en la Statuto de SAT, artikolo, kiun akre vi malaprobas. Vi scias, ke tiu kongresa voĉdono havas nur valoron de propono, sed neniel de definitiva decido, ĉar ŝanĝo en la Statuto de nia organizo povas nur okazi per ĝenerala voĉdono de ĉiuj membroj. Hodiaŭ mi do tute ne intencas denove klarigi la motivojn, kiuj instigis la K-dojn el Dresden proponi tiun artikolon.

Se mi nur dezirus trovi viaflanke aprobon por mia persona sintenado, rilate tiun aferon, mi povus preteksti, ke ankaŭ mi ne aprobis la proponon, kiam en Parizo ni ĝin pridiskutis ĉe kunsido de l'*Centra Komitato*. Mi diris, ke ĝi estas maloportuna, senefika, almenaŭ antaŭtempa. Sed vi riproĉus, se mi serĉus aprobon alie ol en mia propra konscienco. Mi do malkaŝe diru, ke la *intencon* de la Dresdenanoj mi plene aprobas. — Kaj se la maltrafa artikolo estos definitive akceptita, nu, mi obeos...

Ni alvenis je la tre grava punkto diskutinda. Ĉu oni devas aŭ ne obei decidon, kiun oni ne aprobas? Ĉu oni devas eksiĝi el organizo se la plimulto ne akceptis onian propran vidpunkton? Ĉu oni povas konsenti kun via diro, ke vi ne « allasas ian ajn *malpermeson?* »

Mi ne intencas funde pritrakti tiujn demandojn en tiu ĉi malampleksa skribaĵo. Cetere mi scias, ke de kiam ekzistas homoj — pensantaj homoj, kiel diris La Brujer, — oni sensolve diskutas tiun

temon. Lastatempe ĝi estigis amikan interdiskuton inter vi k Henriko Barbus. Mi do konas la ambaŭflankajn argumentojn ; k mi devas konfesi, ke ankoraŭ nun pri kelkaj punktoj mi forte ŝanceliĝas pri elekto inter la du tezoj.

Ne necesas tamen longe meditadi por konvinkiĝi, ke ne povas ekzisti du individuoj absolute samopiniantaj pri ĉio. Ne ekzistas identaj homoj. Pro tempaj k lokaj kaŭzoj ĉiu el ni estas malsame decidigata. Kiam iu aliĝas organizon, li do jam devas scii, ke iafoje li devos malatenti siajn personajn preferojn k submetiĝi al tiuj esprimitaj de la plimulto.

Vi volas lasi al ĉiu plenan liberon ; vi malaprobas ĉiun malpermeson. Tio certe estas laŭdinda, tre loga k neniel danĝera... — se la tero estus loĝata nur de homoj kiel vi, Romen Rolan, kiel Han Riner aŭ Tolstoj ; loĝata de saĝuloj, kapablaj trovi en si mem la veron, la ĝustan vojon ; kapablaj per si mem ŝanĝi la direkton, se ili ekkonscias pri la vojerariĝo.

Nu, vi rigardu ĉirkaŭ vi. Kiom da viaj samtempuloj kapablas vivi senleĝe, en absoluta libero? Tre malgranda nombro, bedaŭrinde.

En 1916 vi diris al via amiko P. J. Juv : « *oni ne povas, sen malutilo liveri la tutan veron. Neniam oni povas diri la tutan veron — tutan* **sian** *veron. La mondo ne povas ĝin elteni...* » Ĉu prave oni ne povas opinii same pri allaso de plena libero al la popolamaso ?...

Jes ja, la aŭtoritato estas iafoje senefika, ofte malbona. Ĝi ankaŭ malbonigas tiujn, kiuj ĝin aplikas. Estas konstatebla fakto. Sed ĉu oni prave povas aserti, kiel la anarkianoj, kiel mi mem *kredis* ĝis mia tridekkvara jaraĝo, ke sufiĉus fordetrui la ŝtaton, forstreki ĉiun ajn leĝon por malaperigi la malbonon el la mondo ? Mi venis al opinio alia.

Certe, por mi ankaŭ, plena, senlima libero restas

la plej ŝatata, la plej alcelinda idealo. Mi eĉ opinias, ke estas bone, ke spirituloj kiel vi retiriĝu el la socia interpuŝiĝo k izole superstaru sur la suproj. Kiel aglo kun akra rigardo, kiu per fortikaj flugiloj transflugas abismojn, vi povas tute ne atenti pri la surteraj kaptiloj, en kiujn falas la malfortuloj, kiaj ni estas. Vi signas al ni la celon ; k tio estas necesega. Sed ni devas transpaŝi marĉojn. En mallumo iafoje ni palpe iradas, atentante pri insidaj logaĵoj ; ni devas trovi apogon unu ĉe la alia, k por tio ni bezonas organizon. — Kaj ĉiu ajn organizo bezonas regulojn, disciplinon, — sekve « malpermesojn » ankaŭ kelkafoje.

Kiam mi petis, ke vi bonvolu apogi nian kongreson per via honorata, mondfama nomo, neniel mi supozis, ke tio iel ajn devigos vin aprobi k akcepti respondecon pri la decidoj tie alprenotaj. Mi deziris nur, ke vi subtenu nian malforton en nia ĉiutaga batalo por universala lingvo. La faktoj montras, ke vi ne perdis la tempon, ke vi ne misuzis vian influpovon, konsentante « pruntedoni vian nomon ». La artikolo, kiun vi verkis okaze de nia kongreso, jam tradukite aperis en deko da ĵurnaloj. Ĉu tio ne estas grandampleksa propagando ?

Nu, ĉu vi opinias, ke ekzistas alia esperanta organizo preta disvastigi vian opinion pri esperanto ? Tiaokaze vi erarus. Vian koncepton pri la mondlingva problemo povas propagandi nur sennaciuloj kiel ni. La aliaj esperantistoj silentas aŭ malaprobas vian vidpunkton. Vole nevole vi do restos kun ni. Kaj mi ne dubas, ke, se vi estus pli objektive informita pri la t. n. neŭtrala esperanta movado, vi tute konsentus kun mi. Ĝi putras pro dandismo, vanto, malseriozo. Tie oni certe ne konscias pri la gravo de Universala Lingvo. Esperanto estas nur preteksto por ekskursadi, amuziĝi, flirti...

La sperto montris, ke laboristoj akiras en tiu medio nur la malbonajn ecojn de burĝeco. — Tiun

terminon mi uzas laŭ la Flobera difino [1]. En la broŝuro « For la neŭtralismon ! » estas jam notite : « Kontakte de la burĝoj la esperantistaj revolucianoj tendencas al dandismo, al emo pri nomkonigado k aliaj fiburĝecoj. Estas vere amuze — aŭ plorinde — konstati, ke la t. n. laboristaj grupoj neniam forgesas, en raportoj senditaj al la redakcioj de esperantaj ĵurnaloj, meti la nomojn de la prezidanto, subprezidanto, kasisto, subkasisto, ktp., ktp. Kredeble en la koro de ĉiu « laboristo » dorme kuŝas burĝa spirito... »

Mi estas firme konvinkita, ke nur miskompreno k nesufiĉa informiteco pri nia movado igis vin skribi : « Pretendi malvastigi esperanton je revolucia grupo estas perfidi esperanton k ne esti inda je ĝi ».

Neniam tia stranga penso venis en la cerbon de iu ajn el ni. Kaj kiel pruvo, mi ankoraŭ faru citon el la ĉi supre menciita broŝuro, kiu estis kvazaŭ la gvidilo por nia SAT-entrepreno :

« Kiam esperanto sukcesas en burĝaj rondoj mi kompreneble ĝojas. Konvinkita mi estas, ke Universala Lingvo entenas econ revoluciigan. Samkiel ĉio scienca : Internaciismo estus nur revo, se ne ekzistus fervojoj, telegrafo, aviadiloj, ktp. ; vole nevole la scienculoj laboras al la tutmonda revolucio... »

Sed por propagandi esperanton en la burĝan klason, kiel vi prave konsilas, *estus necese silenti pri la motivoj, kiuj instigas nin disvastigi k praktiki nian lingvon. Ĉu vi konsilas al ni tian sintenon?*

SAT entenas elementojn el plej diversaj partioj k tendencoj. Ŝajnas, ke tiu simpla fakto pruvas sufiĉan toleremon k larĝspiritecon. Ĉu vere vi opinias, ke ni plie devas kaŝi nian ruĝan flagon por

---

[1] « Burĝo estas iu, kiu pensas malnoble. »

ariĝi sub la nure verdan — kun finegocistoj, mensogemaj episkopoj, naciemaj generaloj k aliaj altranguloj? Mi ne kredas. Tial mi rapidu fini ĉi tiun leteron dirante nur:

Kara Romen Roland, vi vivas sur la monto k havas nur ĝeneralan, nedetalan bildon pri nia vivo sur la ebenaĵo, en marĉoj, kie ni pene paŝadas. Estu ne tro postulema al ni, kiuj havas nur bonvolon k kuraĝon. Daŭrigu majstre gvidsigni al ni la vojon al la suproj. Pro tio estu dankata k kredu je la certigo pri nia sincera admiro.

(XI-1922.)

## Neŭtralismo — Neŭtraluloj

« La veraĵoj vivas k mortas; eternaj ili ne estas », diras *Henriko Ibsen* en sia dramo: « La Malamiko de l' Popolo ». Veron entenas tiu paradoksa diro — kiam el matematika kampo oni ĝin transportas en la vivon, kie ĉio estas en senĉesa modifiĝo. Konsekvence, kiu volas orientadi iun ajn movadon, tiu devas ĉiam prikonsideri la faktojn en ilia rilato kun la direkto sekvenda.

En la komenca periodo de la poresperanta propagando estis nepre necese, ke ĉiaj esperantistoj kvazaŭ faske kuniĝu por montri al la rutinema k skeptika publiko, ke artefarita lingvo plene taŭgas por tutmonda interkompreniĝo. Pravaj estis la pastroj k framasonoj, la anarkistoj k policistoj, kiuj *neŭtrale* kuniĝis por enfaktigi sian komunan ideon. Tia sintenado estis la tiutempa veraĵo.

Nuntempe jam estas farita la pruvo, ke esperanto plene taŭgas por skriba k buŝa interrilatado inter plej diversdevenaj personoj. Hodiaŭ nur neinformitoj povas ankoraŭ dubi pri tio, kion eĉ famaj lingvistoj devis konfesi.

Temas nun penetrigi en la vivon la uzadon de esperanto. Ĉu do por tiu tasko ankoraŭ taŭgas la malnova organiz-principo de la esperantistoj ? Ne, senhezite mi respondas. La praktika utiligado de nia lingvo povas esti nur fakeca : komercistoj uzu esperanton por siaj negocaj profitoj ; policistoj por policaj celoj k same revoluciuloj por revoluciaj interesoj. Tio estas tute natura k logika. Kaj se tia agadmetodo estos ĝenerale k inteligente farata, nedubeble la tuta esperanta movado ricevos fortan antaŭenpuŝon.

Tamen iuj esperantistoj ĉagrenas, kiam ili konstatas, ke la « kara lingvo » estas uzata por kontraŭbatali ilian propran idealon. Patriotoj plendas, ke « sennaciuloj » uzas esperanton cele al spirita sennaciigo de la homoj. — Kiom abomeninde ! Aliparte revoluciuloj koleras, vidante, ke per internacia lingvo oni predikas konservativismon k tradiciismon.

Tiu spiritstato devenas de malĝusta kompreno, rilate la signifon de esperanto.

Pretekste neŭtralismon kreiĝis speciala spiritstato. Enirinte Esperantion la t. n. neŭtralaj esperantistoj opinias, ke oni devas rezigni je ĉia politika, religia aŭ filozofia tendencoj. Inter tiuj « samideanoj » naskiĝis ia lingva patriotismo, — kiu, kiel ĉiu ajn patriotismo, tendencas al ia « sankta unuiĝo ». Tie riĉuloj k malriĉuloj vivas pace, ĉar la lastaj konsentas duonmalsati por grasigi la unuajn. Tio ne estas simpla metaforo. Sufiĉas observi tion, kio okazas en la t. n. neŭtralaj grupoj por plene konvinkiĝi, ke tio estas fakto. Tie ĉiu esperantisto, ĉu revoluciulo, ĉu « bona patrioto », pagas kotizon. Ĉu por propagandi senescepte en ĉiuj medioj ? Tute ne. La propagandiloj estas tiele verkataj, ke ili estas varbpovaj nur en konservativaj rondoj. Sekve la propagando en revoluciaj medioj malsanas dum ĝi sufiĉe bonfartas alie.

Plie la neŭtraluloj bojkotas per silento ĉion,

kio povus kompromiti esperanton en la okuloj de konservativuloj. Ekzemple, ĉiuj neŭtralaj gazetoj silentis pri la majstra artikolo de *R. Rolan*, publikigita en *Sennacieca Revuo*. Sed se iu oficialulo, iu episkopo aŭ simila « eminentulo » elparolis kelke da vortoj favoraj al nia lingvo, tiaokaze ĉiuj neŭtralaj gazetoj bruadas.

El tio ĉu ni ne pravas, konkludante, ke tiaj neŭtraluloj fakte estas nur hipokritaj partianoj ?

Pri tia ŝajna neŭtralismo mi jam de longe kriis laŭte : ĝi estu for ! Hodiaŭ mi diras, ke nur ni, SAT-anoj, estas k povas esti sinceraj neŭtraluloj. Ni tiaj estas, tial ke ni konsideras esperanton kiel ilon, kiun iu ajn uzu por siaj apartaj celoj. Plie ni estas firme konvinkitaj, ke tia ilo kunportas mortigpovon kontraŭ la nure naciajn kulturojn.

En batalo oni ĝojas, vidante la kontraŭulojn fari malprudentaĵon. Tial ni ĝojas, kiam ni vidas naciistojn propagandi esperanton. Ni sincere deziras al ilia propagando plenan sukceson.

Samkiel la provincaj dialektoj estas neniigitaj, kiel kulturlingvoj, same okazos pri la naciaj lingvoj, kiam esperanto estos ĝenerale uzata sur la tutmondo. Formalaperos la nacia patriotismo, samkiel malaperis la triba k provinca patriotismoj. Al tiu malaperigado ni konscie laboradas, k nenial ni volus malhelpi tiujn, kiuj senkonscie laboras kun ni. Pro tio ni do povas sincere esti neŭtralaj.

Forpasis la tempo, kiam estis necese, ke ĉiaj esperantistoj unuiĝu. Hodiaŭ, kiuj rekomendegas tiun unuiĝon, tiuj estas ĉu blindaj adorantoj de mortinta veraĵo, ĉu estremaj personoj dezirantaj ordoni al grandnombra ŝafaro.

For, for la malnoviĝintan neŭtralismon ! Vivu la hodiaŭa, la vera, la SAT-aneca !

(III-1923.)

## " Ho malfidemulo!... "

Kun ĉagrena mieno alparolis min antaŭnelonge iu K-do. Aŭdinte pri la kaŭzo de lia ĉagreno, mi provis kvietigi lian dubeman animon. Tial ke la motivoj de tiu malfidemo povas eble efiki ĉe aliaj, mi raportas ĉi-tie nian interparoladon.

— Jen, vidu, via « naiva » sennaciismo donas al kontraŭuloj de esperanto pretekston por ataki SAT-on...

— Klarigu, mi petas, vian riproĉeman diron...

— Ĉu do en Kasel vi ne legis la afiŝojn, sur kiuj estas presitaj frazoj de *Leo Trocki* (1)? Ĉu do vi opinias, ke ne estas domaĝe por nia afero, ke tia famulo k aŭtoritatulo malaprobis la celon de SAT?

— Nu, ĉu vere tio estas la kaŭzo de via ĉagreno? Kvietiĝu!... *Trocki* malaprobis neekzistaĵon; li atakis fantomon...

— Ĉu tamen?...

— ... Momenton. Mi klarigu, ke estas pli ĝuste diri, ke *Trocki* mistrafis ekzistantan utopiaĵon. Li direktis atakon tien, kie ne kuŝas la celitaĵo. Li devus sin turni ne al la SAT-anoj, sed al la esperantaj pacistoj, homaranoj k. s. utopiistoj; *Trocki* atakis ĝuste kion SAT mem kontraŭbatalas depost sia stariĝo.

« ... *Sekto el strangaj homoj, klopodantaj por forigo de rasa k nacia malamo per esperantismo...* », parolis *Trocki*. Nu, ĝuste la samon primokas la verketo « For la Neŭtralismon! » Tie estas dirite : « ... Esperanto ne estas la *celo* de nia agado, sed nur *rimedo* por atingi nian celon...

---

(1) Pli poste oni eksciis, ke tiuj frazoj ne estis de *Trocki*, sed de *Zinovjev* k plie, ke ili estis falsitaj de la idistoj. — *Kompil.*

Esperanto malhelpos la militon! Ne, tute ne, se ĝi estas uzata de militokazigantoj... Esperanto estas *bezona*, sed ne *sufiĉa* rimedo por liberigi la homojn... »

— Povas esti, ke *Trocki* mistrafis, tamen ŝajnas al mi, ke la vorto « sennacieco » ebligas al niaj kontraŭuloj montri nian movadon kiel utopian k sekteman...

— Fulmotondro! ĉu do vi opinias, ke tiaj kontraŭuloj ne trovus alian *pretekston* por ataki nian Asocion? Ili ĉagrenas k koleras, konstatante ĝian kreskadon, k tial ili estas pretekstotrovemaj...

— Ili ja trovus ian ajn motivon por ataki nian bone prosperantan movadon. Sed, parolante sincere, mi havas alian kaŭzon por esti ĉagrena.

— Mi aŭskultas vin...

— Jen, mi estas komunisto, k tial ke nia Asocio ne estas pure komunista, mi timas, ke iun tagon mia Partio ordonos al mi eksiĝi el SAT.

— Mirige!... Vi estas — ne koleru, mi petas, — stranga komunisto... Ŝajnas, ke vi ne komprenis la esencon, la spiriton de l' marksismo. Aliel vi ne povus dubi, ke la direktideo de SAT estas tute ortodoksa je la komunista vidpunkto. Ĉu do *Komintern* ne rekomendas al siaj membroj, ke ili eniru en sindikatoj kaj kooperativoj, unuvorte en la rondoj, kie troviĝas *prolet-elementoj*. *Komintern* tute ne rekomendas la starigon de sindikatoj el pure komunistaj elementoj. Cetere, ĉu do la marksismo ne instruas, ke la socialismo povos efektiviĝi nur kiam la *laborista klaso* estos kulture k teknike maturiĝinta. Ĉu... sed mi opinias, ke sufiĉas nur altiri vian atenton al ĉi tiu flanko de l' problemo por ke vi mem trovu ĉiujn bonajn argumentojn por pravigi la pozicion de SAT je la komunista vidpunkto — samkiel je la vidpunkto de la anarkistoj partoprenantaj la sindikatan laboron...

— Oni tamen ne povas identigi SAT-on je sindikato...

— Kompreneble oni ne povas. Mi nur starigis komparon por plifaciligi la komprenon de l' problemo.

Kia ĝi estas? Ni rigardu la realaĵon; ni konsideru la faktojn. Kion ni vidas? En la esperanta movado, ekzistanta jam de tridek jaroj, estas multaj laboristoj sub gvidado de pastroj, negocistoj, generaloj k similuloj. Farinte tian konstaton, kia devas esti la tasko de klaskonscia esperantisto? Por marksisto ne povas esti iu ajn hezito: li devas arigi tiujn laboristojn en Asocion, kies bazprincipo estos la *klaseco,* ne la *partieco.* Aliel agi estus ĝuste fali en la sektismon, kiun prave kontraŭbatalas *Trocki.* Tian ekzemplon je sektismo liveras al ni la kelkaj fanatikuloj, kiuj blufe parolas je la nomo de *Kifintern* (1). SAT starigante kiel sian taskon: « *utiligi praktike la internacian lingvon esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda* », solvis la problemon en tute marksista spirito, laŭ tute ortodoksa maniero.

— Vi estas eble prava, tamen ŝajnas al mi, ke la sektora organizsistemo de SAT estas malfacile defendebla je komunista vidpunkto...

— Se nia organizo celus plenumi la taskojn de sindikato aŭ de politika partio, via rimarko ja estus tute trafa. Sed la tasko de SAT estas tute alia: ĝi estas — k povas esti — nur kultura, eduka, laboristserva. Plie ĝiaj membroj fordetruis inter si la lingvajn barojn, tial sekve estus niaflanke tute malsaĝe, tute ne celkonforme imitaĉi organizojn, kies taskoj k konsisto estas tute diferencaj.

Nia Statuto diras ĉe la punkto *b*: « *Kiel eble plej bone k digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro.* » SAT difinis al si tian taskon, tial ke estas spertite, ĉiutage sperteble por akrevida observanto, ke en la organizoj, kiuj

---

(1) *Komunista ido-federuro internaciona.*

sin titolas internaciaj, regas senkonscia naciemo. Kaj eĉ en Rusio, kie politike triumfis la revolucio, naciaj problemoj estas malfacile solveblaj pro la ekzisto de forta naciema sento ĉe la amasoj. Eĉ en la tiea komunista Partio okazas kelkfoje inter Rusoj k Poloj konfliktetoj, kiujn estigas nur nacia sento.

Por *ĉiel* labori al la sufokado de tia naciemo, ni volis, ke la gvidantoj de SAT ne povu paroli je la nomo de iu ajn nacio, ne reprezentu iun ajn naciecon. Konsekvence je ĝia eduka tasko SAT devas do *kiel* k *kiam eble* ignori la naciojn. Tial la sektorsistemo logike sin trudas.

— Ĉu tamen tia sektorsistemo ne ŝajnas tro artefarita, « nenatura » ? Mi timas, ke oni konsideru nin kiel fantaziulojn.

— Bela argumento en la buŝo de esperantisto ! Ĉu do esperanto ankaŭ ne estas io artefarita, nenatura ? Ĉu do la esperantistoj ne estas ankoraŭ konsiderataj de superrealistoj kiel fantaziuloj ? Mi ripetas, ke la tasko de SAT estas kultura. Ni volas kulturi ĉe niaj membroj « fortikan senton de homeca solidaro ». Nu, la homeco vidiĝas ĝuste per tio, ke, male je la bestoj, la homoj adaptas la naturon al siaj bezonoj k ne sin adaptas al la kruda naturo. La naciema sento estas *io natura*, kion revolucio ne detruas. Tial estas nia kultura tasko elŝiri tiun senton, kiel terkulturisto elŝiras lolon en sia tritika kampo. La tritiko estas io kulturita, artefarita, dum la lolo estas io tute natura. Ni volas kulturi en ni la *homecon* k fordetrui la naciecon — samkiel la kamparano kulturas la tritikon k elŝiras lolon.

Sur la spirita kampo tia estas la kultura tasko de SAT, kiu posedas por plenumi ĝin la necesan ilon, esperanton. Tian taskon ne tiel trafe k sukcese povas plenumi organizoj samcelaj, sed konsistantaj el nesamlingvanoj. Tial nia organizo havas mision, kiun ĝi devas plenumi malgraŭ ĉiaj ajn atakoj k miskomprenoj...

— Mi ja scias, ke multe da niaj partiaj gvid-

antoj konsideras la esperantistojn kiel fantaziulojn. Kaj tamen mi plene konscias, ke ni faras tre praktikan laboron, disvastigante nian lingvon. Sed mi povas malfacile konvinkiĝi, ke la sektorsistemo de SAT povus esti aplikata en la funkciado de la estonta socio, eĉ kiam ne plu ekzistos lingvaj k aliaj baroj. Tial mi opinias, ke tia sistemo estas arbitra k nedefendebla.

— Mi povus respondi al vi, ke ne tiel oni devas prezenti la problemon. Ni starigis tiun sistemon *nur* por malhelpi, ke la gvidantoj de SAT reprezentu iun naciecon. En nia penso, ne alian rolon ni difinis al la sektorsistemo, k kompreneble estas facile al nelojalaj kontraŭuloj montri sub karikatura formo tian sistemon, difinante al ĝi rolon de ni ne difinitan.

Sed mi volas montri al vi, ke la *principo* de sennacieco estas tute konforma al la historia malvolviĝo de la homa socio, konsiderata je marksista vidpunkto. Ni prikonsideru la ekonomiajn fortojn, kiuj agas por ŝanĝi la tutan sociordon. Ĉu la ferminaĵo, la karbo k. a. krudaj materioj estas interdividitaj laŭ nacieca principo?

— Kompreneble, ne.

— Ĉu tiaj materioj ne estas la plej gravaj agiloj en la funkciado de l' Socio?

— Nekontraŭdireble...

— Sekve la baroj, kiuj malhelpas la normalan funkciadon de la ekonomiaj fortoj estas ĝuste naciecaj. Normala, scienca aranĝo de tiuj fortoj ignoras la naciojn. Estas do tute logike, ke ni antaŭvidu la estontan sociordon, starigatan laŭ sen-nacieca plano k ne laŭ inter-nacieca. Ĉar ni ankaŭ antaŭvidas la ĝeneralan uzadon de esperanto sur la tuta planedo, aperas klare k tute logike, ke la organiz-principo *sennacieca* estas tute konforma al la estonta sociordo. Mi kompreneble parolas pri la *principo*, ne pri la nuna aplikado nia, kiu havas tute difinite limigitan rolon.

Penante fortiri sin de la rutina vojo, estas facile pruvi, ke SAT — starante sur spirita kampo, difininte al si edukan taskon, — sekvas vojon ne utopian, sed male tute konforman al la historia malvolviĝo de l' Socio...

— Viaj klarigoj iomete refirmigas mian konvinkon, sed antaŭ ol adiaŭi vin mi volas demandi : kial do jam vi ne liveris tiajn klarigojn al la SAT-anaro ?

— Ho, kara malfidemulo, ĉu do vi ne scias, ke la semanto devas elekti la plej taŭgan tempon por semi la bonan grenon ?

Via dubema spiritstato signas, ke tiu tempo alvenis... Ĝis revido !...

(XI-1923.)

## Rutinemo

Troviĝas en iu urbo laboristaj esperantistoj. Deziras ili esperanton propagandi k instruadi. Tiucela grupiĝo okazas. Por propagandi bezonas la grupo propagandilojn ; por instruadi, instruilojn. Sed propraforte ne povas la grupo eldoni la necesajn ilojn. Kuniĝo de fortoj montriĝas necesa. Naskiĝas nacilingva por-esperanta organizo.

Sed baldaŭ la sperto montras, ke tute nesufiĉa estas la por-esperanta varbado. Kiam la lernantoj finis kurson, necesas ilin reteni k ligi al la esperanta movado. Aliel preskaŭ vana estus la farita laboro. Tion pruvas la granda nombro da personoj lernintaj esperanton k kiuj tamen neniom profitas je sia lernakiraĵo k neniom helpas la antaŭeniron de nia afero.

Por ligi la ellernintojn al la movado ne ekzistas pli bona rimedo ol instigi ilin al tuja aplikado de

la lingvo. Estas evidente, ke oni ne lernas esperanton por interparoli kun siaj gepatraj samlingvanoj. Necesas transpaŝi la landlimojn por interrilati kun eksterlandanoj. Necesas gazeto esperantlingva, literaturo, adresaro : unuvorte aparato, ebliganta la praktikan utiligadon de la lingvo.

Tial naskiĝis SAT.

Ĉu taŭga ĝi estas ? Faktoj respondu : SAT naskis du presorganojn : semajnan k monatan ; ĝi jam pliriĉigis nian literaturon je kelkaj valoraj verkoj ; ĝi eldonas ĉiujare Jarlibron kun adresaro de la membroj ; ĝi jam faris multajn servojn, kies tutcito ne estas necesa por pravigi la tezon.

Do, ekzistas la bezonata aparato k ĝi funkcias. Ne tiom amplekse kiom dezirinde, sed pri tio respondeca ne estas la aparato mem, sed ties uzantoj k ĉefe kiuj ne volas ĝin uzi.

Sed pekhava estas la SAT-aparato : ĝi sisteme penas ignori la nacilingvajn por-esperantajn asociojn. Granda la peko. Nepardonebla eraro. Nerespektema sinteno. Ĉu do la sindikatoj, la kooperativoj, la politikaj partioj ne estas *internacie* kunligitaj ? Kial la esperantistoj ne imitus ?

Ja efektive, kial ? Kial aeroplanoj flugas en la aero, dum aŭtomobiloj ruliĝas surtere ? Esperantistoj tutmondaj samlingvanoj estas, ili ne devas simie apliki la organizsistemon de nesamlingvanoj.

— Vi ne konvinkos nin. Fondu ni esperantistan internacion. Ni ja povas trudi al aeroplanoj, ke ili sekvu serpentumajn vojojn surterajn.

Tiele parolas rutinemuloj. Vivu tradicio, rutino k ĉia samspeca sanktaĵo. La organiz-sistemo de SAT estas ja malbona ; ĝi estas diable sataneca.

For !... for !...

(2-VII-1925.)

## Ĉu unue SAT-anoj?

— Unue mi estas SAT-ano, due partiano, diras iu.

— Unue mi estas partiano, due SAT-ano, respondas aliu.

Kaj inter ambaŭ okazas iafoje vigla disputo. La unua riproĉas al la dua lian malzorgon pri la esperanta afero, k la dua rebatas, ke multe pli urĝas la partilaboro.

La interdisputo kompreneble ne kondukas al praktika konkludo, tial ke maltrafe starigata estas kutime la demando. Povas ja okazi, ke ambaŭ disputantoj estas same pravaj.

Mi prenu konkretan ekzemplon.

Temas partopreni manifestacion, kies sukceso aŭ fiasko povas havi gravan sekvon por la tuta laboristaro. Nu, ĝuste je tiuj tago k horo okazas la kutima esperanta kunveno.

Kion devas fari klaskonscia SAT-ano?

Sen ia ŝanceliĝo, li devas nepre foresti la esperantan kunvenon. Tiaokaze, li devas esti *unue* partiano (aŭ sindikatano ktp.) k partopreni la manifestacion.

Sed aliokaze temas propagandi por esperanto k por SAT. Kaj tio okazas ĝuste la tagon, kiam kunvenas *kutime* la partianoj.

Kion faru klaskonscia esperantisto?

Senhezite li malestu la partian kunvenon; li estu tiam *unue* SAT-ano.

Mi klarigu.

Klaskonscia esperantista laboristo, sekve SAT-ano, havas la firman konvinkon, ke la partiaj k sindikataj gvidantoj malzorgas la interesojn de la proletaro, ne okupiĝante pri solvo al la mondlingva problemo. Li opinias, ke la laboristaro povas emancipiĝi nur se ĝi estas tutmonde organizita, k ke

plie tiu organiziteco povas esti trafa k efika nur se inter la membroj ekzistas lingva komuneco.

Sekve, en ordinaraj okazoj, klaskonscia esperantisto logike devas esti *unue* SAT-ano.

Sed, eksterordinare, se temas, ekzemple, defendi sian organizon kontraŭ faŝista bandaĉo, ni tiam estu unue partianoj aŭ sindikatanoj — due SAT-anoj.

Abstrakto k metafiziko estu for el niaj vicoj!

Ni ne forgesu, ke la vivo ne adaptiĝas al principoj, eĉ se ili estas tute ĝustaj, sed ke temas adapti la principojn al la vivo.

— Ĉu unue SAT-anoj?

— Tio dependas de la tempo, de la loko, de la cirkonstancoj. Almenaŭ ni estu ĉiam, ĉie, ĉiel klasbatalantoj, firme konvinkitaj, ke la SAT-laboro nepre necesas por ebligi la finfinan emancipiĝon de l' tutmonda proletaro.

(12-XI-1925.)

## La signifo de niaj Kongresoj

La sepan fojon, SAT-anoj el plej diversaj mondpartoj baldaŭ renkontiĝos por diskuti pri la ĝeneralaj interesoj de la tutmonda laborista esperanta movado.

Ĉu tiuj K-doj venos kiel delegitoj? Ne. Ili reprezentos nur sin mem.

Ĉu tio ne estas bedaŭrinda? Eble. Kvankam oni povas logike argumenti, ke fakte estas neeble reprezenti aliulojn.

Do, ĉeestos la kongreson nur K-doj sufiĉe monhavaj k ĝuantaj libertempon.

Sekve, ĉu decus, ke tiaj kongresanoj decidu je la nomo de la tuta SAT-anaro? Estas memkompreneble, ke ne.

Tamen ĉu ne konvenas, ke ili havu la rajton kontroli la administran mastrumadon de SAT? Ĉu ne estas tute bone k trafe, ke K-doj el diversaj regionoj povu demandi, esplori, ĉu tute normale k honeste funkcias la SAT-aparato?

Necesas, ke ĉiuj SAT-anoj havu la konvinkon, ke iliaj kotizoj, iliaj mondonacoj estas bone utiligataj, ke tute forestas parazitoj k profitemuloj el la gvidantaro kaj oficistaro de SAT.

Kontrolado ja estas necesa. Kaj evidentiĝas, ke tute ne gravas, ĉu ĝi estas farata de K-doj el Tokio, el Londono aŭ el Ĉikago. Niaj kongresoj ebligas tian kontroladon k tio estas nemalgrava.

La ĉiujara renkontiĝo de K-doj el multaj diversaj regionoj ebligas ankaŭ interŝanĝadon de ideoj, komparon de spertoj rilate al la propagando, instruado k aplikado de nia lingvo.

Niaj kongresoj havas plie tre grandan propagandan efikon. Ili ja liveras treege bonan okazon por diskonigi esperanton tra la tutmonda laborista movado. Ĉiujare ni invitas la plej gravajn laboristajn organizojn sendi delegitojn, por ke ili proprokule vidu la forton de nia movado; por ke ili per propraj oreloj aŭdu kiel bele sonas esperanto, kiel flue ĝin parolas simplaj laboristoj.

Tio ankaŭ estas grava k donas signifon al niaj kongresoj.

Oni ja povas bedaŭri, ke ne el ĉiu grava urbo povas veni K-do por ĉeesti la kongreson. Sed ne utilas bedaŭri k ĉagreni pro tio, kion oni tuj ŝanĝi ne povas.

Venos sendube la tempo, kiam, el plej malproksimaj lokoj, povos kongresanoj veturi per flugmaŝinoj tre rapide k malmultkoste. Dume ni devas atenti la nunan staton k tamen ebligi, ke SAT ne estu nura eŭropa organizo. Niaj orientaj k ceteraj malproksimloĝantaj anoj rajtas ankaŭ iarimede influi k kontroli la mastrumadon de nia Asocio. Oni ja povas bedaŭri, ke ĉiurilate niaj kongresoj ne estas

decidrajtaj, sed estus laŭ mi multe pli bedaŭrinde, se SAT povus esti kulpigata je eŭropisma regemo.

La SAT-kongresoj estas decidrajtaj pri kelkaj aferoj; ili ebligas kontroladon; ili havas grandan propagandan efikon; ili ebligas renkontiĝon k konatiĝon de multaj K-doj el diversaj regionoj; ili do havas grandan signifon k utilon.

La organizantoj ne bedaŭru sian penon, la partoprenantoj sian tempon kaj monon. — La nepartoprenantoj ne tro ĉagrenu, ĉar ili havas la certon, ke nenio *principe* grava povas esti findecidita sen konsento per ĝenerala voĉdonado.

(13-VIII-1927.)

## Superpartieco

Se ni varbas al SAT senpartianon, li baldaŭ celas, ofte senkonscie, fari el nia organizo ian partion. Li provas trudi al ĝi taskojn, kiujn plenumi povas nur politikaj aŭ sindikataj organizoj...

Se partiano aliĝas, li simile celas, ke SAT akceptu k subtenu la politikon de lia propra partio. Kiel ĉiu scias, en ĉiuj partioj okazas bataloj inter diversaj tendencoj, k nia varbito emas eĉ enŝovi en SAT la vidpunkton de la tendenco, al kiu li apartenas en sia partio!...

Ĉiu observemulo ja povas fari tiajn konstatojn.

Por ke nia Asocio povu normale malvolviĝi, bone funkcii, k ludi sian propran rolon, nepre necesas, ke la supre menciita spiritostato malaperu el niaj vicoj. La SAT-anoj devas kompreni, ke nia peresperanta tutmonda organizo estas neniel komparinda kun politika partio; ke ĝi ne povas ludi rolon de sindikato; ke ĝi sekve devas havi tute apartajn taskojn; ke ĝia celo devas havi propran karakteron.

Estas vero, ke SAT celas utili al ĉiuj laboristaj organizoj klasbatalaj senescepte. Kiel do ĝi povas tion fari? Kiel anoj de diversaj inter si batalantaj organizoj povas kunlabori en sama asocio? Unuavide tio ŝajnas neebla. Kaj fakte ĝi estus tia, se la membroj havus eraran komprenon pri la celo k taskoj de laborista esperanta organizo tutmonda.

Ni celas utiligi praktike esperanton. Kion signifas tio? Tio signifas, ke per nia lingvo ni volas interrilati kun samcelanoj el ĉiuj landoj.

Kiel povas tio utili al mia partio, al mia sindikato? eble demandos iu. Facila estas la respondo: Ĉu do via organizo ne celas kunligi internacie la laboristojn? Ĉu vi mem ne konvinkiĝis, ke via propra emancipiĝo dependas de la emancipiĝo de ĉiuj laboristoj en la mondo? Se vi estas ministo, ekzemple, ĉu vi jam ne spertis, ke la labor- k viv-kondiĉoj de viaj sammetianoj en aliaj mondpartoj influas sur viajn proprajn? Certe jes. Sekve vi havas intereson ekkoni pri tiuj kondiĉoj. Kaj se per esperanto vi ricevos ĝustajn informojn, vi konigos ilin al la estraro de via sindikato. Tion farante, vi ne nur praktike utiligos esperanton por la servo de via sindikato, sed plie vi pruvos per faktoj, ke simplaj laboristoj povas senpere interrilati laŭ tutmonda skalo; ke estas eble forigi jam nun la lingvajn barojn; ke la laboristaj organizoj povus ŝpari tempon k monon per la alpreno k praktikado de esperanto.

En iu politika Internacio oni preparas internacian kongreson. Gravaj demandoj kuŝas en la tagordo. Temas decidi pri nova orientiĝo de la tuta organizo. Akraj polemikoj okazas en ĉiulandaj partioj inter la diversaj tendencoj. Por akceptigi siajn tezojn, gvidantoj citas erarajn faktojn aŭ prisilentas ion gravan. Ili havas en la manoj la tradukaparaton de la partio; ili sekve povas konigi nur la faktojn, kiuj apogas ilian vidpunkton. Sed per esperanto vi estas ligita kun samtendencanoj

en aliaj landoj ; de ili vi povas ricevi informojn ; vi tiel povas kontroli la dirojn de viaj gvidantoj aŭ tendenckontraŭuloj. Ĉu do tio ne estus praktika utiligado de esperanto por via partio ?

Mi povus citi diversajn aliajn ekzemplojn. Tiuj sufiĉas por montri, kiel esperanto povas esti utiligata de ĉiu SAT-ano por siaj apartaj celoj, ĉu partiaj, ĉu sindikataj, ĉu kooperativaj, ktp.

Estas memevidente, ke esperanto per si mem tute ne sufiĉas. Nia lingvo estas kvazaŭ telefonaparato, kiu bezonas esti fadenligita kun similaj aparatoj por povi utile funkcii. En la apliko de esperanto, SAT ludas la rolon de la fadenaro en telefonio. Per sia Jarlibro, per siaj presorganoj ĝi ebligas la interrilatiĝon, la interkonatiĝon sur tutmonda skalo inter sampartianoj, sammetianoj aŭ samtendencanoj.

Sed, se oni enkondukus en la SAT-rondoj, en la SAT-organoj disputojn k polemikojn, ĉu tio signifus meti esperanton je la servo de l' Proletaro ? Tute ne. Tio signifus nur konfuzon, miskomprenon pri la rolo, kiun povas nuntempe ludi nia lingvo ; tio signifus plie la baldaŭan disfalon de SAT en malgrandajn, sensignifajn sektojn...

La SAT-aparato ebligas al anarkistoj, al komunistoj, al socialistoj, al senpartiuloj, al sindikatanoj, al ĉiuj ajn laboristoj, kiuj batalas kontraŭ la kapitalista sociordo, interrilatiĝi, interkonatiĝi k ricevi informojn, kiujn ili povas utiligi polemike ekster SAT kontraŭ malsamtendencanoj, malsampartianoj.

La SAT-organoj ankaŭ ebligas objektivan, seninsultan diskutadon pri ĉiuj teorioj, pri ĉiuj vidpunktoj. Per la komparo de diversaj ideoj k tezoj ĉiuj SAT-anoj povas tiri profiton por sia meminstruiĝo. Kiuj neniam aŭdas alian vidpunkton, ol tiun, kiu estas defendata en la organoj de ilia partio, tiuj riskas fariĝi kredemuloj, similaj al religiuloj. Liberpensantaj homoj devas gardi sin kontraŭ

ĉia fanatiko. Kaj tio estas ebla, nur se ili kutimas de tempo al tempo enspiri alian aeron ol tiun, kiun ili enspiras en sia propra partio, en sia propra korporacio.

En la politiko, en la bataloj de la laborista movado regas pasio. Tio estas neevitebla. Sed la pasio ne ĉiam devas regi la spiritojn. Necesas kelkfoje, ke ili penu pensi objektive, racie. SAT povas esti tiu loko, kie forestas pasio, kie regas Racio. Homoj, kiuj uzas racie elpensitan lingvon ; homoj, kies agado celas detrui la rutinon, la tradiciojn, tiaj homoj povas per tio stari sur pli alta ŝtupo ol aliaj. La SAT-anoj povas, devas fariĝi la « plej perfektaj el la t. n. internaciistoj », estas dirite en la Statuto. Ĉu ni ĉiuj bone komprenas la profundan k larĝan signifon de tia postulo ? Estas dube. Necesas unue por tio, ke ĉiu firme konvinkiĝu pri la gravo k seriozo de nia movado. Ni ne esperu la savon de ia ajn mesio. Ne la gvidantoj de laboristaj organizoj malaperigos la lingvajn barojn. Ili ne havas intereson en tio. Tute male : la pli malpli poliglotaj gvidantoj havas ĉefe intereson konservi sian postenon. Esperanto ne povas nun helpi al ili en tio.

« La emancipiĝo de la Laboristaro rezultos el la agado de la laboristoj mem », estas prave dirite en fama manifesto. Same la lingvaj baroj disfalos nur per la agado de la esperantistoj mem. Tial necesas, ke apud la aliaj laboristaj organizoj SAT ekzistu memstare ; ĝi devas konscie ludi sian propran historian rolon, havi sian propran taktikon, k eĉ iarilate sian propran ideologion.

Tio devas k povas okazi senkonflikte kun la aliaj laboristaj organizoj. Superpartieco ja ne signifas kontraŭpartiecon.

(9-VI-1928.)

## Vivu la neŭtralismo !

Oni jam atentigis min pri neceso ne tro paradoksi en miaj diroj.

Tute prave !

Sed la vivo, la faktoj ne malofte paradoksas. Kaj ni devas atenti la vivon, la faktojn...

Sendube la plej « ortodoksaj » marksistoj konsentos, se mi asertas, ke la socia vivo estas sinsekvo el kontraŭdiroj. Ne ekzistas absolutaj veroj, krom eble en la abstrakta, matematika kampo. Veroj ĉiam rilatas al tempo, loko, forto, cirkonstancoj, ktp.

Sed sufiĉe da ĉirkaŭfrazoj ! Mi simple intencas krii : Vivu la neŭtralismo ! Jen cinika konfeso pri « revizemo » [1].

Bonvolu tamen ne tro rapide finjuĝi pri tiu mia « krimo » [1]...

Vero estas, ke en la landoj, kie regas blanka teroro, nia SAT-movado ne povas malvolviĝi normale. Tie *Sennaciulo* k aliaj SAT-eldonaĵoj ne povas eniri libere. Sufiĉas esti posedanto de membrokarto de nia Asocio por esti suspektata, arestata, malliberigata.

Nu, ĉu do ni simple notu la fakton k rezignu ? Estus tute maltrafa oportunismo ! Kie SAT estas malpermesata, kie niaj anoj ne povas kolektiĝi sub nian ruĝan flagon, tie ili devas ŝirmi sin per la nure verda ; ili devas partopreni la neŭtralan, burĝan, eĉ faŝistan esperantan movadon...

Ne gravas, se laboristo ricevas esperantan instruon de pastro, de faŝisto. Esperanto estas ilo, — ilo nepre necesa por la emancipo de nia klaso. Oni do ne timu ricevi ĝin de malamikaj manoj.

---

[1] Aludo al riproĉoj faritaj ĉe la Lajpciga Kongreso. — *Kompil.*

La ĉefaĵo estas posedi la ilon k scipovi lerte ĝin uzadi. Aliiĝos la cirkonstancoj en la blankaj landoj; venos certe la tago, kiam estos eble utiligi malkaŝe la akiritan k bone akrigitan ilon por niaj klasaj celoj.

Kiuj ne komprenas tion, kiuj krias : « For la neŭtralismon ! » en la terorlandoj, tiuj, en plej bona okazo, estas blindaj fanatikuloj, aŭ simple provokistoj...

La vera kuraĝo ne konsistas el fanfaronaĵoj ; vera heroo ne oferas senbezone sian vivon ; male li ŝirmas zorge sian bruston por batali venke, kiam la cirkonstancoj fariĝos favoraj.

La vera kuraĝo ankaŭ estas diri la veron, eĉ kiam tio povas domaĝi al la verdiranto...

Sed, kompreneble, ju pli la cirkonstancoj devigas nin rezigni provizore niajn principojn en la blankaj landoj, despli ni devas rigore apliki ilin tie, kie regas ankoraŭ la burĝa demokratio.

Vivu la neŭtralismo ! tie, kie nia obeinda, sed ne obeebla agitvorto : « For la neŭtralismon ! » riskas detrui tute la esperantan vivon...

(25-VIII-1929.)



# EDUKADO

## Nia ĉefa tasko

Ni kutimiĝu al eksternacia
sent-, pens- k agadkapablo.

Kvazaŭ obsede mi ripetas tiun frazon. Koncize ĝi entenas la tutan celon de SAT, k nia organizo sukcesos k plenumos sian taskon proporcie kun la penetriĝo de tiu ideo en la cerbon de la Kamaradoj. Ĝi devas fariĝi nia morala direktilo, nia kriterio pri taŭgeco de niaj klopodoj k pravo de niaj decidoj.

*Eksternacia sentkapablo :* Ni unue sentkapablas pri ni mem, poste k laŭvice pri niaj familianoj, samurbanoj k samlandanoj.

Koncerne la plejmulton el la homoj tie finiĝas ilia sentkapablo. Kial? Malofte ni havas okazon esti tuŝataj de influoj venantaj el eksterlando. Tial nia menso estas ĉefe rezultaĵo el naciaj inspiroj ĉiuspecaj.

Homoj bonkoraj koncerne siajn familianojn k samnacianojn, fariĝas, dum krizaj aŭ militaj tempoj, plej kruelaj koncerne eksterlandanojn. Patrioto povas esti en sia lando tre pacema homo. Eksplodas milito, li fariĝas sangavida mortigemulo. Li ĝojas eksciante pri malfeliĉegoj okazintaj en « malamika » lando. Lia kompato por la suferoj de siaj samna-

cianoj, nur multobligas sian malamon al la « malamiko ». Nur nacie li estas sentkapabla. Ĉefa tasko nia estu do pliampleksigi nian sentkapablon.

*Eksternacia penskapablo* : Nunepoke la popoloj estas ĉiulande pli malpli regataj laŭ demokrata sistemo. La vera potenco kuŝas en la manoj de tiuj, kiuj posedas rimedojn por formi la opiniojn. Ĉar la gazetaro k eldonindustrio estas en la manoj de kapitalistoj, ĉi-lastaj estas do la solaj potenculoj. Ili regas la pensojn de la popolamaso, kapablante klaĉadi milionekzemplere plej egajn mensogojn k silenti pri plej sciindaj aferoj.

La persona profito de tiuj potenculoj identiĝas kun tiu de la ŝtato — fakte ili estas mem la ŝtato ; konsekvence ili formas la opiniojn laŭ nacia celo ; ili kreas nacieman spiriton.

Malgraŭ rapidveturiloj, senfadena telegrafo k aliaj modernaj translandlimaj kulturiloj, la popoloj estas tamen ĉirkaŭataj de nevideblaj baroj starigataj de lertaj manoj.

Estas do necesega tasko utiligi nian supernacian organismon por interrilati kiel eble plej ofte k intime kun ĉiulandaj Kamaradoj. Nur tiel ni povos imunigi nin kontraŭ la abomena naciismo-patriotismo.

Por esti supernacie penskapablaj ni bezonas gazeton pli k pli valoran k ampleksan, pli k pli ofte aperantan. Urĝas ankaŭ eldoni literaturon konceptitan laŭ sennacieca, vere humana spirito.

Jam ni projektis la verkadon de socialisma-komunisma antologio tutmonda. Eble pli urĝas eldoni porinfanan historilibron. Niaj infanoj devas lerni pri la vivo de la vere eminentaj homoj, kies genio k grandkoreco ne povis esti entenataj en la kadro de iu ajn nacio. Ĉiuj noblaj sennaciemuloj devas esti konataj k honorataj anstataŭ reĝoj, militistoj k senskrupulaj ŝtatistoj.

Parolante pri eksternacia penskapablo, tio si-

gnifas, ke la fonto de niaj informoj devas esti vere sennaciece objektiva.

*Eksternacia agadkapablo* : Per tiu lasta esprimo mi komprenas ĉion, kio koncernas vojaĝojn, forkurojn dum militaj tempoj, interŝanĝon de infanoj, ktp.

Kiel vivantan ekzemplon mi nur citu la eldonon de nia gazeto : la eldonejo estas en Francio k la presejo en Germanio. Nia konstanta kunlaborado kun Kamaradoj *Riĥter* k *Lerĥner* ebligas la ĉiumonatan eliron de *Sennacieca Revuo* en 16-20 paĝa amplekso. Tio certe estas atentinda rezultaĵo — ne parolante pri la morala flanko, pri tiu eblo pli bone interkonatiĝi per tiu kunlaborado.

Estas vere, ke negocistoj povas ankaŭ trovi profiton en similaj interrilatoj. Sed la diferenco estas en tio, ke negocisto celas personan profiton dum ni estas nur instigataj de idealaj motivoj. Interrilatoj sen idealo, samkiel idealo sen interrilatoj estas ambaŭokaze nesufiĉaj por alproksimigi la popolojn.

Kreante k kreskigante superŝtatan, supernacian organismon, ni ebligas la aliigon de niaj mensoj. Ni faras el esperanto potencan kulturilon. Ni disetendas nian agadkampon ĝis la ekstremoj de Satanio. Unuvorte ni faras *pozitivan* laboron.

Sendube la profesiaj revoluciuloj daŭrigos ankoraŭ longe ne tre atenti pri internacia lingvo. Barakte ili klopodos ŝanĝi la socian ordon de supre per dekretoj k leĝoj, ofte neaplikeblaj. Ili taksos nin kiel fantaziulojn, kiuj misuzas sian energion...

Sed ni forte konsciu, ke kutimigante nin al eksternacia agado ni estas la plej certaj revoluciuloj, ĉar ni portas revolucion en niajn spiritojn ; ĉar ni jam embrie funkciigas societon kiel estas esperinde, ke funkcios la tutmonda socio.

(V-1922.)

## Ĉu ni obeu tradicion aŭ racion?

Mortis homo. Kion signifas tio?

Tio signifas, ke vivulo... ĉesis vivi; ke ĝia korpo fariĝis malbonodora kadavro. Tio signifas, ke proksimume sesdek kilogramoj da karno ekputras.

Ĉe tiu tute banala fenomeno, kiel kondutas ordinare la homoj, kiuj sin konsideras kleraj k saĝaj?

Jen, ili tiun putrantan kadavron vestas, ornamas k metas zorgeme en specialan keston, nomitan ĉerko k faritan el bona, iafoje multkosta ligno. La interno de la ĉerko estas plie garnita per veluro, kvazaŭ la kadavro povas ĝui ties molon k mildon.

Kiam la sesdekkilograma kvanto da putranta materio estas tiel dorlote aranĝita, alvenas speciala veturilo, pompe k burleske dekorita, sur kiun oni metas la ĉerkon.

Grandnombre ankaŭ alvenas personoj, nigre vestitaj, por akompani la mortinton al ĝia « lasta loĝejo ». Tiel la tuta funebrantaro trairas stratojn k bulvardojn. Preterpasantoj demetas la ĉapelon; aliaj krucsignas.

Fine la veturilo alvenas iun specialan lokon, kiun oni nomas tombejo, k kie estas zorge masonita tomba kelo, en kiun oni deponas la kadavron, por ke ĝi « pace ripozu ».

Kaj ĉiujare, almenaŭ unu fojon, je la tago de la sanktulara festo, personoj vizitas la tombon k alportas florojn.

Floroj al mortinto!... Kvankam ĉiu bone scias, ke kadavro ne havas flarkapablon k do ne povas ĝui odoron.

Tamen tion faras personoj, kiuj sin opinias saĝaj k eble senantaŭjuĝaj. Ateistoj k dikreduloj same « honoras » putraĵon!...

Dume oni malatentas vivulojn, kiuj mizeras, suferas, difektiĝas.

Kompreneble, kiam mortas simpla laboristo, lia kadavro ne estas tiom zorge dorlotata. Sed sur lian tombon oni tamen deponas almenaŭ malkaran kronon. Tio montras, ke ĉe la laboristaro kiel ĉe la burĝaro regas tiurilate la sama spiritostato.

Egiptaj faraonoj konstruigis vastajn piramidojn, kies nura celo estis kulti al ilia kadavro. Miloj k miloj da sklavoj ŝvitis, penadis dum multaj jaroj por konstrui tiujn gigantajn monumentojn, kiuj kvazaŭ spitas al la eterno.

Nu, la spiritostato de la nuntempuloj ne multe diferencas je tiu de la antikvaj Egiptoj. Same sensence oni daŭrigas kulti al putranta materio. Anstataŭ dediĉi energion k tempon por plibonigi la sorton de la vivuloj, oni prizorgas kadavrojn, oni konstruas funebrajn monumentojn k maŭzoleojn. Oni obeas la miljaran tradicion anstataŭ la simplan racion.

Mi ne volas diri, ke estas malsaĝe honori honorindan mortinton. Ekzistas ja homoj, kies vivo estis modelo, kiun oni prave povas proponi al la imitado de la amaso. Sed dorloti putrantan kadavron ne estas honori saĝe mortinton. Se tiu mortinto estis saĝulo, oni tiele kvazaŭ nur insultas lian memoron, farante malsaĝaĵojn. Se li estis profundpensa k talenta verkisto, oni povas racie honori lin nur legante k studante lian verkaron. Se li estis bonulo, la sola maniero honori lian memoron estas imiti lian bonon.

Kadavro neniel estas honorinda ; ĝi estas nur prizorgenda je socia higiena vidpunkto. La racio ordonas, ke kadavrojn oni senceremonie malaperigu per brulado aŭ per alia rimedo. Estas tute malsaĝe konservi ilin.

La kutimo dorloti kadavrojn estas bona pruvo, ke la granda plimulto el la nuntempuloj estas ankoraŭ spirite sklava de la arkaika, miljara tradicio.

Sinceraj k konsekvencaj revolucianoj devas unue fari revolucion en sia propra spirito ; aliigi sian

menson ; forbalai ĉiujn superstiĉojn k neraciajn kutimojn.

La sciencon, la racion ni obeu, ne la religion, la tradicion. Ni estu ne nur sennaciuloj, sed ankaŭ sentradiciuloj...

(12-IX-1925.)

## Kio estas burĝo ?

Gustavo Flober (Flaubert), franclingva verkisto k perfekta stilisto, difinis la signifon de la vorto « burĝo » jene : *Burĝo estas malnoble pensanta homo...*

Pensi malnoble, tio signifas pensi egoiste, celi ekskluzive personan profiton, deziri nur individuan feliĉon, eĉ se ĝi devas esti akirata per la malfeliĉo de aliuj.

Se pri tiu difino oni konsentas, estas eble konstati, ke en la proleta klaso troviĝas multe da tiaj « burĝoj ». Ekzistas ja laboristoj, kies sola aspiro estas fariĝi siavice ekspluatistoj. Ili tute ne deziras la aliigon de la nuna maljusta socisistemo, kies viktimoj ili estas, sed nur sian transklasiĝon.

Tiaj proletoj estas ĉiam pretaj perfidi la interesojn de sia klaso. Inter ili la burĝaro rekrutas lakeojn, policanojn, strikrompantojn...

Feliĉe en la burĝaro troviĝas ankaŭ homoj, kiuj perfidas sian klason. Marks, Kropotkin, Lenin k aliaj apartenis la burĝan klason laŭ sia deveno k socipozicio. Sed ili ne defendis sian klason ; male ili akre ĝin kontraŭbatalis. Mense ili transklasiĝis, proletiĝis k fariĝis la plej timindaj kontraŭuloj al la kapitalismo.

Tial la burĝaro malamis k persekutis tiujn klasperfidulojn...

Ne laŭvole oni naskiĝas, ĉu en la burĝa klaso, ĉu en la proleta. Sed dependas de nia volo subteni aŭ kontraŭbatali la klason al kiu laŭdevene ni apartenas...

Ankaŭ estas la rezulto de hazardo, ke ni naskiĝis, ĉu en Ĉinio, ĉu en Portugalio, ĉu en alia lando. Sed per nia volo ni povas fariĝi mondlingvanoj; ni vole povas malatenti la nacian ideologion k pense, mense sennaciuliĝi. Ni povas esti naciperfiduloj, samkiel ekzistas klasperfiduloj.

Tial la SAT-anoj ne utopias nek fantazias: Ili male agas kiel realistoj, kiuj staras ĉe la pinto de la profunda, nehaltigebla sed malrapida fluo, kiu portas la homaron al mondunueco, al sennacieca socisistemo...

(24-VI-1926.)

## Fonto de ideoj

Mi ne volas disputi pri la temo ĉu la ŝanĝoj senĉese okazantaj en la socio rezultas de la apero de novaj ideoj, aŭ ĉu la novaj ideoj aperas pro la jam okazintaj ŝanĝoj. Ne estus eble trafi unuanimecon pri tiu demando.

Sed ĉiu konsentas, ke la invento de maŝino kaŭzas iafoje gravegajn ŝanĝojn, eĉ revoluciojn.

Unu ekzemplon : la aplikado en Lankaŝir (Lancashire) de la teksmaŝino, inventita de Hargrivs (Hargreaves), okazigis la malprosperon de la ŝafbredado en Britio k ties prosperon en Aŭstralio, Argentino k alie.

La lano kiun prilaboras la teksmaŝinoj Lankaŝir-aj ja ne plu kreskas sur ŝafoj sin paŝtantaj en Britio; ĝi estas alportita trans la oceanon per grandaj ŝipoj.

Kiel oni vidas, la « ideo » — mi petas pardonon — la *invento* de Hargrivs havis eksterordinarajn sekvojn.

Ĉu estas malĝuste rezoni, argumentante, ke la « invento » de Zamenhof kapablas ankaŭ kaŭzi grandegajn ŝanĝojn en la mondo?

Estas vere, ke « invento » per si mem ne havas socian gravon. Necesas ja la ĝenerala aplikado de la invento.

Necesis, ke laboristoj konstruu k funkciigu la teksmaŝinojn de Hargrivs por ke okazu la grandega priparolita ŝanĝo.

Same necesas, ke la laboristoj aplikadu, uzadu kiel eble plej ofte esperanton por malligi ĝian kaŝitan forton, por ebligi la grandajn ŝanĝeblojn, kiuj kuŝas latente en la universala lingvo.

La SAT-anoj povas havi la certon, ke ili faras pozitivan, tre fruktodonan laboron, penante laŭ tutmonda skalo aplikadi esperanton.

Eble estas pro tio, ke oni ne sufiĉe insistadis pri la granda signifo de nia movado, ke tiom da esperantistoj laciĝas k forlasas niajn vicojn.

Antaŭ ol provi konvinki la alpropaganditojn, ni unue fortege konvinkiĝu mem, ke la sennaciisma ideo portas en si forton grandegan k kies utiligo estas nepre necesa por ŝanĝi la kriman sociordon nunan, por finfine fordetrui la landlimojn k sur iliaj ruinoj konstrui justan, senklasan socion.

(19-VIII-1926.)

## Subjektivaj kaŭzoj de la sukceso de SAT

Neniu dubas nun pri la reala, kreskanta forto de nia movado. Estus tute senutile insisti pri tiu fakto. Prefere ni provu difini k montri kaŭzojn de la sukceso de SAT.

### Laborismo

La unua estas, ke la aktivaj SAT-anoj estas klaskonsciaj laboristoj, kiuj kuraĝe, senlace laboradis k senĉese penadis ne lasi sin trompi per brilaj manifestadoj, kies efiko estas ĉiam efemera. Ili ĉiam penis laŭeble forigi el nia movado la dandismon, kiu infektas la neŭtralan movadon. La gvidantoj ja ĉiam alvokis al metoda, modesta, senfanfarona laboro.

Ni ja scias, ke la laboro ne estas peno, sed male plezuro, kiam ĝi estas farata memvole kun la konscio, ke oni laboras por la komuna bono k ne por iu rabema mastro.

En la libera laboro kuŝas eble la fundamento de l' moralo, tial mi ne timas paroli pri la *laborismo* de SAT. En ĝi kuŝas vera forto k necesa kondiĉo de daŭra sukceso.

### Praktikismo

La libera laboro estas ja per si mem kvazaŭ idealo. Sed necesas, ke la penado havu aprobindan k difinitan celon. Oni povas prezenti al si homon, laborantan k ŝvitantan, k kies penado estus tamen tute sen ia bona rezulto por la socio.

La laborismo de la SAT-anoj estas gvidata de praktikismo. Ili ĉiam penadas uzadi *praktike* esperanton por siaj klasaj celoj; ili firme konscias, ke

la lingvo per si mem ne havas ian ajn atentindan valoron, se ĝi ne estas aplikata praktike.

Ne ĉiam estas eble uzadi praktike la lingvon, sed tial ke la tuta kvinjara ekzisto de SAT celis tian uzadon, oni rajtas akcenti pri la praktikismo de nia Asocio.

## Liberismo

Esperanto havas signifon nur per tutmonda uzado; tial SAT ĉiam celis atingi, ke ĝi havu anojn en kiel eble plej da lokoj el ĉiuj mondpartoj.

Sed tre diversaj estas la kondiĉoj en la mondo. Estus do tute ne saĝe, se oni celus starigi precizajn regulojn, aplikendajn ĉie same. Necesis lasi grandan liberon, sufiĉan elaston k neprecizon en la Statuto de SAT. La vivo, la sperto devas ĉiutage instrui k montri, kio taŭgas aŭ ne. De supre faritaj decidoj k leĝoj plej ofte fiaskas, tial ke ili ne ĉiam kongruas kun la realo.

Liberismo karakterizas nian organizon, k ĝi ebligis ties atingitan sukceson.

## Idealismo

La legantoj bonvolu rimarki, ke ĉi-punkto venas nur laste, kvazaŭ konkludo, k ne kiel prologo.

Idealismo estas nur revo, metafizikaĵo, se ĝi, laŭ la signifo mem de l' vorto, malatentas la realon, la krudajn faktojn. Sed mi opinias, ke la celado al perfekto estas ankaŭ *fakto*, ke ĝi kuŝas en la koro k menso de ĉiu normale evoluinta k kulturita homo. Sekve ni ne devas malatenti tiun senpezan forton, kiu movigas multajn homojn. Kaj tian celadon al perfekto mi nomas la SAT-idealismo.

Nia Asocio devas ja esti iom saturita je tiaspeca idealismo : idealismo ne malligita de la realo, sed male sin apoganta sur ĝin por atingi kiel eble plej alten.

Nia idealo estas la sennaciismo — ĝi estas ia anticipo, k prezentas al si ŝtupon, kiun certe atingos la socio en sia senhalta evoluado — pro la senĉesa malvolviĝado de la Scienco k Tekniko.

Kiel eble plej koncize mi provis montri subjektivajn kaŭzojn de la ĝisnuna sukceso de SAT. Tiuj kaŭzoj restu vivaj; ili estas necesaj por la estonta kreskado k prospero de nia kvinjara Asocio.

(26-VIII-1926.)

## Ateistoj estas tre malmultaj

— Ĉiu SAT-ano devas esti ateisto, devas malkonfesi dion kaj ĉion religiecan.

— Persone mi emus aplaŭdi al tiu rigora postulo. Tamen, ĝia apliko kondukus al la eksigo de 95 % el la nunaj anoj...

— ! ! ? ?

— Vi miras. Aŭskultu, kara samopiniano. Unue ni ne devas forgesi, ke famaj filozofoj ankoraŭ nuntempe disputas pri ekzisto aŭ ne-ekzisto de dio. Jen iu starigis 12 pruvojn kontraŭ la kredo je dio! Sed aliu respondis per starigo de 14 pruvoj favoraj al la diisma tezo. Ni do modeste konfesu, ke la demando staras ekster nia kompetento...

Lastatempe K-do Saklatvala, la sola komunista deputito en Britio, sciigis per bele presita karto el luksa papero al siaj konatoj, ke liaj du knabinoj ĵus estis konfirmitaj en la religio de l' Parsioj (Zoroastranoj). Tia ceremonio konsistas en ŝmirado sur la vizaĝon per malseka faruno. Nu, ni supozu, ke tiu bone konata k flama revoluciano estus SAT-ano. Ĉu do ni devus eksigi lin?...

Iuj asertas, ke la kulto, kiun oni ĝenerale havas por kadavroj, estas plej evidenta pruvo de religieco

ĉe la kultantoj. Ĉu ni sekve devus eksigi la K-dojn el Sovetio, kiuj enbalzamigis la kadavron de Lenin k starigis por ĝi maŭzoleon ?

Jen vidu : tuta kunvenantaro ekstaras k demetas la ĉapelon ĉe kantado de « Internacio ». Ĉu tio ne estas religieca gesto ?...

Nu, mi ekvidas ĉe via fingro oran ringon ! Se vi konsentus aŭskulti, k se ni havus tempon, mi povus per bonaj argumentoj pruvi, ke tio estas restaĵo de religio, k sekve, ke vin mem oni ankaŭ devus eksigi el SAT...

Kredu min, estas jam tre grava fakto, ke oni povas en *Sennaciulo* priparoli tute senĝene tiujn demandojn. Se ni starigus dense plektitan barilon ĉe la enirejo de SAT, estas timinde, ke nia organizo baldaŭ fariĝus malgranda sekto, sen agadkapablo, sen edukpovo — sen vivrajto...

SAT devas esti edukejo. Kaj por trafe eduki necesas kompari la ideojn, la programojn, la taktikojn...

Ni ne postulu, ke ĉiu SAT-ano malkonfesu ĉion religiecan. Ni kontentiĝu per pli modesta postulo : ĉiaj ajn dogmanoj ne rajtu eniri la SAT-edukejon — k tie ni zorgu, ke la dogmemuloj ne regu. Ni ne samigu edukejon kun dresejo...

Kiuj kredas, ke ili estas posedantoj de la tuta vero, tiuj ja ne povas edukiĝi. Edukiĝo ne povas akordiĝi kun idea ŝtoniĝo. Kaj ni ne opiniu, ke nur en la eklezioj troviĝas kreduloj, t. e. homoj kun ŝtoniĝintaj ideoj...

(21-VI-1928.)

## Ni ne diigu la racion

— Vi ofte diras, ke la SAT-anoj devas esti homoj, celantaj enkonduki racion en sia mondpercepto. Bedaŭrinde mi konas multe da K-doj, kiuj multrilate agas tute neracie. Ili manĝas viandon, trinkas alkoholaĵojn, fumadas k vestas sin laŭ tute netaŭga maniero. Ili malliberige difektas siajn piedojn per ŝuoj multkostaj; ili tenas sian kolon per malmola ŝtofa ringo, kiu malhelpas ilin spiradi libere; ili kovras sian kapon per ridindaj k karaj vestoj, kiuj nur havigas al ili kalvon...

Ĉu tio estas racia? Ĉu tio estas SAT-aninda?...

— Nu, kian praktikan konkludon vi intencas doni al via parolo? Ĉu vi intencas proponi, ke nur vegetarano, nefumanto, nudpiedulo k similaj raciemuloj povu aliĝi al SAT? Se jes, ni devos eksigi almenaŭ 95 °/₀ el niaj membroj...

Kaj ĉu vi estas certa, ke se ne plu troviĝus en SAT « kadavromanĝantoj », regus plena interkonsento inter la restantoj? Ĉu ne ekzistas inter vegetaranoj diversaj malkonsentoj? Ĉu la krud-manĝantoj ne riproĉas al la kuir-manĝantoj ilian... malraciecon? Kaj kial rekomendi nur la senŝuecon k senĉapelecon? Ekzistas ja sektoj, kiuj rekomendas kompletan nudon. Se estas racie iri nudpiede, certe la senvestuloj posedas pli altan gradon da racieco...

Ni ja devas penadi ĉiam agi racie. Sed ni ne faru el la racio dion. Ni ne imitu la francajn revoluciulojn, kiuj, en 1793, starigis kulton al la diino Racio. Ornamante racion per mistika aŭreolo, ili agis ne racie sed religiece...

Pri multaj punktoj en la politika k socia vivo ne ekzistas absoluta certo. Ne estas definitive pruvite, ke manĝado de viando estas malracia. Kaj se la homoj militus iuj kontraŭ aliujn por provizi sin per viando, t. e. se la venkinto manĝus la venk-

iton, oni ne povus prave diri, ke la milito estas malracia...

La simpla saĝo rekomendas al ni toleremon. Se anarkistoj, komunistoj, sindikatistoj k socialistoj povas kunlabori en SAT, ni ankaŭ ebligu al viandomanĝantoj k vegetaranoj diversspecaj kunagadi por enplanti en la socia vivo la ĝeneralan uzadon de esperanto...

(26-VI-1928.)

## For, pastreca maniero!

Ni vivas ĉirkaŭite de misteroj. La scienco liveras al ni tro malmulte da klarigoj.

Vi vane atendos kontentigan respondon de sciencisto, se vi demandas lin, ekzemple, pri la kaŭzo, kiu igas kurantan hundon halti ĉi tie k tie, flaradi kaj fine... levi la postan piedegon por urineti sur elektitan lokon.

Sed demandu pastron. Neŝanceliĝe li tuj respondos, ke tiu hunda kutimo ekzistas simple pro tio, ke Dio tiel decidis per sia senlima saĝo. Sekve ni devas vidi en tiu stranga fakto nur kaŭzon por ami k adori la kreinton de la homoj, de la hundoj k aliaj bestoj...

Kaj oni devas konstati, ke tiaj respondoj estas bone akceptataj de la amasoj. Ĝenerale, sufiĉas, ke homo parolu aplombe, senhezite kun certa tono, por ke granda plimulto konsentu kun la diroj de la parolanto k eĉ lin aplaŭdu.

Scienculo ĉiam dubetas, hipotezas k donas la klarigojn, kiuj ŝajnas al li en la momento la plej akcepteblaj. Sed li bone konscias, ke liaj klarigoj eble ne plu taŭgos post kelka tempo, se novaj eksperimentoj malkonfirmos la hipotezon...

Grandan influon sur la amason ne povas havi scienculo.

Politikaj gvidantoj kredeble tion bone scias. Ili prefere imitas la pastron. Ili parolas kun aplombo, asertas, kvazaŭ profetas. Tial ili kutime trafas sukceson : oni aplaŭdas ilin k obeas...

Mi opinias, ke en SAT, kie ni celas instigi homojn al pensa memstareco, estus domaĝe, se regus la pastreca maniero. Regu prefere la dubema metodo de la scienculo. Se tiel estos, rezultos toleremo, konkordo k unueco...

(12-VII-1928.)

## Al ĉiu sia tasko

— SAT devas batali kontraŭ la kapitalismo, kontraŭ la imperiismo, kontraŭ la militismo, kontraŭ...

— ... Ne, milfoje ne!...

— ! ! ? ?...

— Ĉu do jam delonge ne ekzistas partioj, sindikatoj k aliaj organizoj, kiuj tute klare difinis al si tiujn taskojn? Ĉu do vi volas, ke nia Asocio konkurencu kun ili?

SAT ne kapablas k sekve ne devas batali kontraŭ tiuj diversaj ismoj. Ĝi nur povas havi kiel taskon sciigi, diskonigi kiel la socialistoj, la komunistoj, la anarkistoj, la kooperativistoj, k. a. plenumas tiun batalon. Per tio la SAT-anoj povas kompari la rimedojn k metodojn, uzatajn en la diverslandaj, diverstendencaj organizoj. Per tiaj informoj ili « batalu » en siaj propraj partioj k organizoj por akceptigi la rimedojn k metodojn, kiuj ŝajnas al ili la plej bonaj...

— Sed tio estas tamen kontraŭbatali la supremenciitajn ismojn...

— Eble, sed estas ia nuanco en la maniero prezenti la aferon. Kaj nuancoj ludas rolon en la vivo. Ni ĉiuj konsentas, ke SAT devas havi kiel celon meti esperanton je la servo de l'tutmonda Proletaro. Ĉu estus bona maniero, se per esperanto ni volus plenumi la samajn taskojn, kiujn jam plenumas aliaj pli kvalifikitaj por tio organizoj?...

Ĉu do estas tiom malfacile kompreni tion, kio estas nigre-sur-blanke skribita en nia Statuto? Vi relegu ĝin atente, penante kompreni ĝian profundan signifon, k eble vi konvinkiĝos, ke SAT havas kiel celon batali nur kontraŭ la malklero k fanatiko, kontraŭ ĉiaj dogmoj k rutinoj.

Kiam ekzistos en la mondo kelkaj dekoj da milionoj da laboristoj scipovantaj esperanton, tiam la tiutempaj vivantaj SAT-anoj povos eble kun ia pravo difini al esperanta asocio politikajn taskojn. Dume ni estu modestaj. Ni pliperfektigu nian interhelpan, informan, klerigan, edukan aparaton, k ni ne ridindigu nin, celante difini al SAT taskojn, kiujn ĝi plenumi ne povas.

Se K-do akiras per konstanta uzado de esperanto pli da klero; se per la SAT-aparato li povas bone informiĝi pri ĉio, kio interesas la tutmondan laboristan movadon, ne povas esti dubo, ke li fariĝos pro tio plej bona batalanto en sia partio, en sia sindikato, en sia kooperativo aŭ en alia simila organizo. Sed nur en tio limiĝas la rolo de SAT.

En revolucia periodo, kiam temas preni la armilojn por ataki, aŭ por sin defendi kontraŭ la faŝismo, ne SAT, sed la partioj aŭ sindikatoj gvidas la batalon. Sekve estas tute sensence postuli, ke nia Asocio difinu al si taskojn, por kies plenumo jam ekzistas aliaj organizoj...

(9-VIII-1928.)

## Idealo estas necesa

Ni observu ĉi tiun radofariston : li penadas por atingi ekzakton, perfekton en sia laboro. Sendube li pense prezentas al si radon, tiom perfekte faritan, ke oni ĝin povus kompari kun geometria cirklo. Nia laboristo bone scias, ke neniam li sukcesos realigi ideale perfektan radon. Al tio li tamen celas per ĉiuj fortoj.

Tiu radofaristo iarilate estas idealisto.

Ĉu mokinda pro tio ?

Certe ne. Kvankam li neniam sukcesos atingi en sia laboro absolutan perfekton, almenaŭ lia tia celado, lia sopiro al idealo okazigas, ke liaj radoj estas relative perfektaj, ke ili taŭgas en la praktiko. Sed por akiri tian taŭgecon, necesas senĉesa penado por fari ideale perfektan radon.

Idealo estas necesa. La homo devas difini al si idealon pri vivo k penadi per ĉiuj fortoj por ĝin atingi. En tia penado li devas trovi rekompencon, ĝojon — vivcelon.

Kiu ne havas idealon, tiu iel similas al ia fuŝa radofaristo, kiu tute ne zorgus, ke la radoj estu cirkloformaj. Senidealulo eĉ ne devus esti konsiderata kiel homo, ĉar la homeco ĉefe konsistas en la intelekta kapablo imagi perfekton — idealon.

En tiu senco ni ĉiuj estu idealistoj.

Ni estu ideale bonaj k kuraĝaj revoluciuloj ; ni estu ideale akurataj en la plenumo de la taskoj, kiujn libere ni akceptis. Ni estu idealaj SAT-anoj, kies solaj zorgo k deziro estas labori por la senĉesa pliperfektigo de la SAT-aparato.

En epoko, kiam monavidemo, koruptado k mallojalo faras detruan laboron en ĉiuj medioj, idealismo en niaj vicoj estas pli necesa ol iam ajn, ol ie ajn ; ĝi eĉ estas nepre necesa kondiĉo por la sukceso de nia movado.

(25-X-1928.)

## Edukejo, ne agitejo

Kiam mi asertas, ke en nia eduk-kulturcela organizo devas regi tolerema k eĉ dubema spirito, ne sekvas el tio, ke devas esti same en partio aŭ sindikato, kiuj estas batalorganizoj. Kiam oni partoprenas batalon, tiam diskutado k toleremo estas malutilaj.

Kompari ne estas pruvi. Sed komparo helpas kelkfoje klarigi, komprenigi demandon. Mi do faru komparon.

Estas milito. Ĉe la stabo teknikistoj, fakuloj studas por starigi la plej taŭgan planon, la plej bonan taktikon, unuvorte por decidi pri la plej trafaj rimedoj por akiri la venkon. Ĉu la decido farota estos la plej bona principe? Neniu povas tion aserti. Bonaj argumentoj ekzistas por pravigi kontraŭajn tezojn. Povas eĉ okazi, ke la alprenota plano ne estos la plej bona. Tamen ĉiuj fakuloj konsentas, ke kiam temos apliki la planon, ĉia diskuto pri ĝi estus malutila.

Per severa aplikado de ne tute bona plano oni eĉ povas iafoje akiri venkon, k per malsevera aplikado de bona plano malvenko povas rezulti.

En la kadro de SAT, la anoj de diversaj laboristaj organizoj, inter si konkurantaj, devas troviĝi en la spiritostato de stabanoj, kiuj esploras pri la plej bonaj rimedoj por akiri la venkon. Agante en sia partio aŭ sindikato, ili devas esti en la spiritostato de militantoj, kiuj celas nur apliki difinitan planon, difinitan taktikon por venki la malamikon.

En nia esperanta asocio ni ĉiuj lernu, esploru, komparu la tezojn, la taktikojn, la metodojn. Kaj kiu alvenis al la konkludo, ke la anarkista metodo estas la plej trafa, tiu provu apliki ĝin en sia anarkista rondo; kiu akiris la konvinkon, ke la komunista taktiko estas la plej ĝusta, tiu obeu la

disciplinon de sia partio. Same agu la socialisto aŭ sindikatisto.

SAT estu edukejo, ne agitejo.

Politika agitado estas ia batalo, k sekve la gvid-principoj de SAT tie ne taŭgas; sed ankaŭ ne taŭgas la agiteca spiritostato en nia esperanta organizo tutmonda.

Kiu ne kapablas fari tian diferencon inter la du movadoj, tiu ne estas konscia SAT-ano k ne kapablas labori trafe por nia afero.

(1-XI-1928.)

---

## Kio estas animo?

— Ĉu homoj havas animon?

— Vi maltrafe starigas la demandon. Diru: ĉu *ĉiuj* homoj havas animon?

— Ne ŝercu! la demando estas grava...

— Mi parolas tute serioze k konsentas kun vi, ke la temo malpostulas ŝercon. Necesas unue interkonsenti pri la difino de l' termino. Kion vi komprenas per la vorto animo?

— Mi komprenas ion nematerian, kio ekzistas en si, sendepende de la korpo al kiu ĝi donas vivon; mi komprenas ion, kio estas senmorta.

— Ha! ha! estas vi la ŝerculo. Neniam fizikisto povis konstati la ekziston de io nemateria. Vi tute fantazias. Se mi konsentus kun via difino, mi nepre aldirus, ke ĉiuj homoj estas senanimaj.

Laŭ mi, animo estas ia stato de delikate sentanta, alte pensanta homo, stato, kiu *rezultas* el materiaj movoj, okazantaj en la korpo, en la cerbo. Animo estas agregato de ideoj k sentoj.

Oni kelkfoje parolas pri « grandanimaj » homoj. Tio signifas, ke ekzistas aliaj, kiuj havas *mal-*

*grandan* animon. Estas do eble prezenti al si homojn, kies animo estas tiom eta, ke fakte ili povas esti konsiderataj kiel senanimuloj. Ili apenaŭ pensas, apenaŭ sentas, se oni faras escepton pri iliaj deziroj al satigo de korpaj bezonoj. Ankaŭ bestoj eĉ plantoj sentas tiujn bezonojn; ili tamen ne pensas k sekve ne havas animon. Pli precize: ilia pens- k sentaparato estas tiom elementa, ke ĝia funkciado ne povas *produkti* animon.

Estas senanimaj homoj, kiuj tamen scipovas legi; sed ili englutas legaĵon kvazaŭ supon. Se malbonas la supo ribelas la stomako; sed se la legaĵo estas malvera, ne ĉiam protestas la cerbo. Kaj se la legaĵo estas saĝoplena, ne ĉiam pro tio saĝiĝas la senanima homo.

Senanimuloj ordinare rilatas indiferente ĉu al belo, ĉu al saĝo, ĉu al honesto. Same kiel por blindulo koloroj ne ekzistas.

Homoj senanimaj povas ankaŭ kelkrilate ne esti malinteligentaj: kelkaj eĉ kapablas kapti la unuan lokon liberan en omnibuso, aŭ ie la unuan rangon...

Vi denove pensas, ke mi ŝercas, se mi diros, ke homoj ne *ĉiam* havas animon. Tamen tio estas fakto: dum profunda dormado, dum ebriiĝo aŭ similaj statoj senanimiĝas la homo. Tiam kvazaŭ mallumas en la cerbo.

Kolektivo povas ankaŭ havi aŭ ne havi animon. Kiam nur egoistaj, instinktaj motivoj instigas la anojn de iu ajn societo; kiam mankas ĉe ili originala pensado; kiam ili papage ripetas gurditajn « verojn », tiam la afero prosperi ne povas. Ĝi nur vegetas k sin direktas al kadukiĝo.

La SAT-anoj devas tre atenti, tre zorgi, ke ilia organizo ne fariĝu ia Senanima Asocio Tutmonda...

(16-V-1929.)

## Dogmo — Dogmiĝo

— Mi ne estas tiaulo, kiu konsideras, ke voĉdonado povas solvi principan demandon.

— Vi certe pravas. Sed pri kio temas?

— Temas pri la aldono al la Statuto, kiu estis akceptita ĉe la lasta balotado per 1570 voĉoj kontraŭ 192. Mi dubas, ĉu la voĉdonintoj serioze k atente legis k cerbumis la tekston. En ĝi oni ja parolas pri « dogmoj », kiujn instruas partioj. Tio estas ofenda. Ĉu vi opinias, ke mi estas dogmulo? En mia Partio oni ja ne instruas dogmojn. Mi do ripetas: estas dube, ĉu la K-doj, kiuj akceptis tiun aldonon, profunde ekzamenis ties signifon.

— Sed ĉu vi mem atente legis la tekston de tiu aldono? Ŝajnas, ke ne. Vi parolas pri « dogmoj », dum tiu vorto absolute forestas en la menciita teksto.

— ??!!

— Vi miras! Nu, bonvolu mem kontroli. Jen la koncerna parto: « ... per komparo de faktoj k ideoj, per libera diskutado ĝi (SAT) celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. »

Ĉu do vi tiom supraĵe konas nian lingvon, ke vi ne scipovas fari diferencon inter dogmo k dogmiĝo? Estas ja granda diferenco!

Ni supozu, ke via Partio sukcesis meti en sian programon la tutan puran veron; nu, ĉu tio signifus, ke partianoj ne povos fari el tiu vero dogmon? Jen la demando. Mi opinias k scias laŭsperte, ke jes; veraĵo ja povas fariĝi dogmo ĉe multaj spiritoj, se ili ne havas okazojn kvazaŭ repensadi la temon k retrovi mem la argumentojn, kiuj pruvas ties veron. Se partianoj ne tenas konstante vigla sian spiriton, se nur parkere ili lernas la instruojn k ne penas kompreni ilian ĝustan sencon, tiam fakte tiuj instruoj *dogmiĝas* en la cerbo de la instruitoj.

Tion volas diri la de vi riproĉata frazo. Nenion pli.

Ni ĉiuj konsentas, ke SAT ne devas fari politikan agitadon, ke ĝi povas nur esti klerigā, kultura. Necesas do esti konsekvenca k kompreni, ke oni vere klerigas k kulturigas ĉefe per komparado de ideoj k libera diskutado pri ili.

Necesas insisti, por ke estu tute klara la afero. Estas lernantoj, kiuj scipovas solvi geometriajn problemojn nur per tio, ke ili bone parkeris teoremojn. Sed ili ne scipovas klarigi, pruvi ties ĝuston. Sekve por ili tiuj teoremoj estas kvazaŭ dogmoj. Sed estas aliaj lernantoj, kiuj scipovas bone demonstri la veron de teoremoj, bone aplikas ilin k scipovas tiri el ili ĉiujn konsekvencojn. Laŭ mi, estas granda diferenco inter la du specoj de lernantoj : la unuaj estas dogmemuloj, la duaj estas memstare pensantaj homoj.

Estas dezirinde, ke la SAT-anoj estu el la dua speco de homoj : nur tiel ili fariĝos plej taŭgaj partianoj, sindikatanoj ktp., unuvorte plej bonaj klasbatalantoj.

Difinante al si kiel unu el siaj taskoj malebligi *dogmiĝon* de partiaj instruoj, SAT bone helpas al la partioj k trafe metas esperanton je la servo de l' tutmonda Proletaro.

(10-X-1929.)

## Edukado — Agitado

— Mi pripensadis viajn dirojn pri dogmo k dogmiĝo. Konfesi mi ja devas, ke fakte iom tro rapide mi legis — k decidis pri la legaĵo. Viaj klarigoj certe estas akcepteblaj. Tamen mi ankoraŭ opinias, ke ekzistas ia danĝero en tio, ke estu permesate en SAT pridubi, pridiskuti ĉion. Povas pro tio estiĝi malagrablaj disputoj. Ĉu ne estus

preferinde limigi la kampon al simpla informado, al nura konigo de faktoj?

— Ĉu vere vi kredas, ke tia limigo sufiĉus por forigi ĉian eblon pri disputoj? Mi firme opinias, ke per nura menciado de faktoj oni ankaŭ povas naski tre akrajn disputojn. Pripensu : eĉ statistikistoj ne ĉiam interkonsentas pri nombroj k malpli pri la maniero, laŭ kiu ili estas prezentitaj. Legantoj ja povas esti malsame influataj de samaj nombroj laŭ tio, ke prezentis ilin malsamopiniantoj.

Raporti nur pri faktoj? Vera senpripensaĵo! Sufiĉas legi ĉiutagajn ĵurnalojn por konstati, ke samaj faktoj estas raportitaj tre malsame.

Sed faru mem jenan eksperimenton : surstrate okazis akcidento; aŭ du homoj disputis k interbatiĝis. Kvindek personoj ĉeestas k vidis proprokule. Nu, pri la okazaĵo demandu al tri aŭ kvar personoj, hazarde elektitaj k vi konstatos, ke neniu respondos al vi same, neniu vidis la « faktojn » sub sama aspekto.

Ĉu vi do ne scias, ke eĉ per fotoj oni povas artifike aliigi « faktojn »? Faktoj! faktoj! Sed ekzistas milionoj, k temas elekti inter ili. Fanatikulo, dogmulo ĉiam scipovos elekti « faktojn », kiuj atestos por lia kredo.

Malmulte da homoj kapablas observi k raporti objektive. Ni sekve devas celi kreskigi objektivecon ĉe homoj. Se sufiĉe da SAT-anoj sukcesus akiri tian econ, tio estus bono, profito por ĉiuj partioj, por ĉiuj tendencoj. Ĉiuj ja havas intereson esti ĝuste informataj pri la vera stato de la viv-, labor- k batalkondiĉoj de la laboristaro en la tuta mondo.

Oni devas bone scipovi fari diferencon inter la ĉefa agado de partio k tiu de SAT. La unua precipe agitadas por altiri al si la plimulton da laboristoj. La rimedoj por agitado estas tute aliaj ol por edukado. Kutime forestas objektiveco en agitado. Ĝi parolas pli al la sentoj, al la koro ol al la racio.

SAT ne devas agiti politike : ĝia tasko povas esti nur eduka. Pri tio ni ĉiuj interkonsentas. Sed, fulmotondro ! ĉu finfine oni komprenos, ke por eduki oni devas uzi taŭgajn rimedojn — k ne ekzistas aliaj, ol tiuj pri kiuj parolas nia Statuto.

Mi estas konvinkita, ke ĉiuj saĝaj gvidantoj el ĉiuj klasbatalaj partioj povas kun tio konsenti. En mala okazo, tiuj gvidantoj fakte ne celus edukadon, sed dresadon, encerbigon de dogmoj. Se ekzistus tia partio, ĝi ne celus la bonon de la Laboristaro k sekve ne povus de ni esti atentata.

(17-X-1929.)

## Kulturi la simplan saĝon

— Vi tre mirigas min !... Ĉu do vere vi opinias ebla, ke la SAT-anoj fariĝu ĉiurilate memstare pensantaj homoj ? Per via edukmaniero vi atingos nur, ke tiaj « edukitoj » fariĝos tro memfidaj k volos diskuti k decidi pri ĉio ajn.

Ridinde !...

— Via rimarkigo estas iel tute prava. Mi eĉ citos ekzemplon, kiu apogas vian vidpunkton. Ne malofte oni renkontas K-dojn, kiuj post legado de la « Komunista Manifesto » k de kelkaj resumoj aŭ komentoj pri la Historia Materialismo kredas esti spertaj marksanoj. Ili tiel plej ofte nur ridindigas la marksismon — k sin mem...

Evidente, taŭga edukado devas ne nur veki ĉe homoj la deziron ĉion kompreni, k tiucele ĉion ekzameni mem ; sed, plie, ĝi devas celi, ke ili akiru plenan komprenon pri tio, ke specialaj profundaj studoj estas necesaj por ektrakti iajn demandojn. Estus ja tute ridinde, se simplaj laboristoj volus pri-diskuti la teorion pri relativo de Ajnŝtajn (Einstein) aŭ transcendajn filozofiajn problemojn. Kvankam

la klero de metafizikuloj ne ĉiam malhelpas ilin paroli sensencaĵojn...

Kaj, sur nia esperanta kampo, ĉu ne okazas ofte, ke klerulo ekvolas reformi nian lingvon tuj post lernado de kelkaj lecionoj ? En tia okazo nia intelektulo, same kiel tromemfida elementulo, ne komprenas ĝuste, kio estas scienco, kiel oni devas esplori demandon antaŭ ol proponi solvon.

Sed mi firme opinias, ke plej ofte — mi ne diras ĉiam — nekleraj proletoj povas havi pli bonan juĝon pri aferoj, kiuj rilatas ilian vivon, iliajn laborkondiĉojn, ol teoriuloj, kiuj tro abstrakte pritraktas tiajn demandojn.

Taŭga edukado devas ĉefe kulturi la simplan saĝon, kiu ekzistas pli malpli ĉe ĉiu normala homo. Kaj tiu kapablo sufiĉas ĉe laboristo por akiri klaskonscion k la certon, ke li estas ekspluatata. La burĝa, ŝtata edukado celas ĝuste nebuligi la simplan saĝon per encerbigo de « veroj », eldiritaj de « dio », de « sanktuloj », de « eminentuloj » k. s. belparoluloj.

Estus tre atentinda rezulto, se la plimulto da SAT-anoj alvenus al tia klara kompreno, ke necesas unue dubi por akiri veran kleron, ĝustan opinion pri ia ajn demando.

Ĉio, kio estas akceptita sen vera kompreno, konsistigas ja nur dogmaĵon, k tio estas certa baro kontraŭ la evoluado, kontraŭ la progreso.

La diversaj eklezioj povas ekzisti nur pro la kredo de siaj anoj. Sed neniu laborista organizo konsentus esti komparata kun iu ajn eklezio. Sekve, ĉiuj povas konsenti kun niaj edukaj principoj.

(24-X-1929.)

## Intelektulo? — Manlaborulo?

— Mi havas grandan admiron por Zamenhof: li ja kreis lingvon, kiu sukcesis trabati al si vojon k akiri vivkapablon. Sed tiu sukceso rezultas ĉefe el tio, ke esperanto kelkrilate tre similas «naturajn», naciajn lingvojn. Kaj oni bedaŭras iafoje tian similon.

La naciaj lingvoj trenaĉas kun si tiom da metafizikaĵo, tiom da nelogikaĵo, da erarigaĵo, ke mi ofte sopiris al esprimilo, per kiu oni povus meti en vortojn nur tion, kio rilatas al faktoj aŭ al ia tute preciza koncepto. Oni dezirus havi lingvon, kiu malebligus ĉian miskomprenon, oni sentas simpation por ia filozofia *aprioria* lingvo, kian revis jam de longe utopiistoj...

— Ne metafizikumu viavice; parolu pli konkrete; vi citu ekzemplojn...

— Nu, volonte; aŭskultu. Se mi parolas pri «manlaborulo», kion precize tio signifas? Meblisto, seruristo, tajloro ktp., estas nomitaj «manlaboruloj»; ĉu tio signifas, ke ilia cerbo ne utilas al ili dum la laboro? Se estas tiel, mi protestas. Mi mem estas «manlaborulo» — aŭ almenaŭ estis — k asertas, ke dum la metia laboro, mia penskapablo ne malofte estis streĉata por solvi diversajn problemojn, kiuj stariĝis ĉiufoje, kiam temis pri konstruo de nova objekto, aŭ pri eltrovo de metodo aŭ de procedoj, kiuj plirapidigos mian laboron. Mi certigas, ke iafoje mi streĉis pli forte mian intelekton ol kiam mi verkas artikolon. Tamen vidante min ĉe skribotablo k sciante, ke mi skribas por gazeto, multiuj nomus min «intelektulo», dum ili nomus min «manlaborulo», kiam mi staris ĉe stablo en meblofabriko.

Kion sekve signifas la terminoj *intelektulo, manlaborulo?*

Min despli embarasas la demando, ke hieraŭ mi renkontis surstrate malnovan konaton, kies okupo estas frotpurigi la pargetojn de burĝoj per brosoj ligitaj ĉe liaj piedoj. Mi bone prezentas al mi tiun laboron k se oni nomus mian konaton « piedlaborulo », neniu tamen komprenus. Sed tiu homo estas certe enkalkulata en la kategorio de « manlaboruloj », kvankam li laboras ĉefe per la piedoj.

Kaj se mi pensas pri tiu lerta, fama kirurgo, kiu segas ostojn, tranĉas karnon, ligas tendenojn, kudras haŭton k iel aspektas kiel buĉisto, mi tamen ne povas nomi lin « manlaborulo ». Se tiel mi parolus, tio aspektus kiel malsprita ŝerco. La lerto de la manoj ludas tamen ĉe kirurgo grandan rolon ĉe operacio!...

Kaj ĉu mi devas nomi « intelektulo » tiun senoriginalan aŭtoron, kies nura talento estas scipovi kolekti k kompili dokumentojn, kunfliki argumentojn troveblaj tie k ĉi tie?

Ĉu estas « intelektulo » tiu instruisto, tiu profesoro, kiuj kvazaŭ vomas al siaj lernantoj la instruon, la sciencon, kiun ili englutis el libroj k malbone digestis?

Kiel vi vidas, oni kelkfoje povas trafi en grandan embarason, kiam oni celas malkovri, kion kaŝas la ŝelo de vortoj.

Plej ofte ĉio estas nur ŝajno k trompo. Oni nomas ordinare « intelektulo » homon, kies manoj estas puraj k senkalaj, kiu surhavas blankan kolumon k bone ordigitajn vestojn. Tamen se oni povus rigardi en la kranion de multaj tiaj elegantuloj, oni vidus, ke tie kuŝas inerte nur ideoj ĉerpitaj el gazetoj aŭ libroj. Ilia intelekto ludas proksimume la rolon de la stomako ĉe ansero, kiun oni grasigas; ĝi senkritike akceptas la pensan nutron k « grasiĝas ».

Sed en laborejo jen homo vestita per makulita kitelo; li kutimas cerbumi pri perfektigo de siaj iloj, pri eltrovo de novaj laborprocedoj; li plie en

sia vivo akceptas kiel veran nur, kion li bone perceptas aŭ klare komprenas; homo, kiu ne timas diri : « mi ne scias », kiu kapablas dubi; unuvorte homo, eble ne klera laŭ la kutima senco de l' vorto, sed kies intelekto ĉiam vigle funkcias. Nu, se mi nomus lin « intelektulo », povas esti, ke li mem ofendiĝus, opiniante esti mokata : li ja estas « manlaborulo », tial ke lia laboro malpurigas k kalumas liajn manojn.

— Sed viaj rimarkoj ne tre utilas. Diru prefere, kiel vi deziras, ke oni difinu la vortojn *intelektulo* k *manlaborulo*.

— Ankaŭ mia respondo al via demando tute ne utilos, ĉar mian difinon neniu vortaristo povus akcepti. Sed por kontentigi vin, jen aŭdu :

Intelektulo oni devus nomi nur homon, kiu en sia metio, en sia fako eltrovis ion novan; homon, kiu ĝenerale en sia vivo kapablas liberiĝi el la rutino, el la tradicio, el la kutimoj, kiujn li opinias maltrafaj; perfekta intelektulo estas — *kreanto*.

Tipa intelektulo estis Zamenhof — almenaŭ ekster sia fako, la kuracarto. Kvankam ne estante fakulo en lingvoscienco, li tamen kreis (1) esperanton — dum centoj da sciencoriĉaj filologoj k lingvistoj amasigis plej lertajn k konvinkajn argumentojn por « pruvi », ke artefarita lingvo estas utopia entrepreno, ke tia kreaĵo povas nur iel simili la *Homunculus*-on de d-ro Faŭsto.

Intelektulo estas mia najbaro, tiu ĉarpentisto, kiu inventis elipsilon, kvankam li neniam faris profundajn geometriajn studojn.

Multe da similaj ekzemploj oni povus citi. Ne utilus.

---

(1) Jen denove vorto miskompreniga : krei signifas fari ion el nenio. Tio estas ja sensencaĵo, kiun akcepti povas nur dikredulo. Oni devas kompreni ĉi tie la vorton *krei* en la senco : fari ion apartenontan al neniu ekzistanta speco, stilo, tekniko, k. s.

Mi parolu al vi pli radikale : oni devas klopodi forigi el la vortaroj tiujn du maltrafajn terminojn : *intelektulo, manlaborulo*. Kaj tio estos ebla nur, kiam ne plu ekzistos sociklasoj. La manlaborulo ja estas la posteulo de la antikva sklavo, de la mezepoka servutulo. Kaj ĉiu scias, ke inter la antikvaj sklavoj estis ankaŭ homoj kun forta intelekto ; ekzemple, la fablisto Ezopo.

Oni devas celi, ke la homoj estu samtempe intelektuloj k manlaboruloj. Normala homo devas malvolvi ĉiujn siajn kapablojn. Malklera laboristo estas sendube ridinda en kelkaj okazoj. Sed ne malpli ridinde aspektas tiu scienculo, kiu ne scipovas enigi najlon en tabulon, ne frapante al si sur la fingrojn per la martelo.

Ĉiu homo devus labori per la manoj dum kelka tempo ĉiutage ; ĉiu homo devus havi la eblon malvolvi sian intelektan kapablon al ĉiuj direktoj. Intelektuloj, manlaboruloj, laŭ la ĝenerala akcepto de l' vortoj, estas iaj monstroj produktitaj per la ekspluatado de homoj kontraŭ aliajn homojn.

(14-XI-1929.)

## Dubemo

— La fakto, ke sur la paĝoj de *Sennaciulo* aperis multaj artikoloj, laŭdantaj Sovetion, ne estas sufiĉa ; ni volas koni la opinion de la gvidanto de nia gazeto pri la « Kvinjara Plano ». Via silento tiurilate ŝajnas al ni suspektinda...

Tiel skribis al mi lastatempe iu K-do el Polio. Li eĉ aldonis kelkajn malafablajn vortojn, kiuj celis esti ofendaj. Sed... ies aproboj povas ofendi, alies malaproboj laŭdi.

Se ofendite, mi povus tute ne rompi mian « suspektindan » silenton... Prefere, aŭskultu mian

tre humilan konfeson : ĝis nun mi ne sukcesis akiri firman opinion pri la « Kvinjara Plano ». Ĉiutage mi sentas pri tiu problemo la pezan ŝarĝon el dubo, Kia malagrabla sento estas dubi ! Kiom pli komforte estas kredi ! Kaj tiu konstato bone klarigas, kial estas en la mondo tiom da kreduloj — diversspecaj.

Ĉu Stalin pravas, asertante, ke oni povas konstrui socialismon en unu sola lando ? Ĉu Trocki malpravas en sia mala opinio ? Mi vane legis diversajn tezojn, farĉitajn per amaso da nombroj k citoj el Marks k Lenin, sed mia mallarĝa cerbo ne kapablis dece gastigi la legaĵon. Cetere mi ne estas fakulo en ekonomio. Mi do rezignis daŭre porti la ŝarĝon el dubo pri tiu demando.

Almenaŭ mi ne dubas, ke la eksperimento nun farata en Sovetio estas grandioza k meritas ĉies subtenon. Por ke la eksperimento estu konkludiga, necesas, ke ĝi okazu en normalaj kondiĉoj. Aliel la dubo povus resti eterna. Se kapitalistaj ŝtatoj atakus Sovetion ; se kontraŭrevoluciuloj sabotus (intence fuŝus) la eksperimenton en la lando mem, estas evidente, ke malsukceso en tiaj kondiĉoj ne havus konkludigan valoron. Ĉiu sekve havas intereson fari ĉion eblan por faciligi la taskon de la eksperimentantoj.

Tia estas pri la demando mia vidpunkto k ĝi klarigas, kial mi rifuzas artikolojn tiutemajn, kies signifo estas negativa k povus havi kiel rezulton ĝeni la eksperimenton.

Aliflanke ĉiu devas scii, ke en Sovetio regas partio, kiu estas sekcio el la III-a Internacio. Laŭ la decidoj de ĉiuj niaj kongresoj, SAT ne devas enmiksiĝi en la interna vivo de l' diversaj partioj. Ni do ne povas permesi, ke oni diskutu, ĉu la Sovetia Sekcio de la III-a Internacio bone aŭ malbone mastrumas siajn proprajn aferojn. Tute ne utilas demandi, ĉu mi kredas aŭ ne kredas, ke la socialismo povas esti konstruata en unu sola lando.

Mi volas stari antaŭ tiu demando kiel sciencisto antaŭ sia retorto : fari ĉion eblan por ke la eksperimento estu sukcesa — almenaŭ konkludiga.

Dume mi dubas. Kaj tiu mia dubo neniel povas malhelpi la grandiozan sukcesindan planon. Mi plie dubas, ke kredantoj povas esti la plej bonaj helpantoj en la eksperimentado. Kredo iel blindigas k malhelpas esti sufiĉe atenta, por ke ĉio funkciu normale k laŭcele.

Mi ŝatus, ke la dubemo estu SAT-aneca virto, — sed kompreneble ne deviga...

(25-IX-1930.)

## Denove pri dubemo

— Via dubemo ne havas mian simpation. Estas neeble dubi pri ĉio. Ĉu vi mem iel ne kredas je esperanto k SAT ? Por labori oni bezonas fidon k kredon.

— Neniam mi diris, ke oni devas pridubi ĉion. Estas nedubeble, ke lastan semajnon aperis ĉi tie iu « Inter Ni » (1), k ke ĝi venigis al mi la ĉi supran rimarkigon. Estas tute certe, ke nun mi tenas skribilon por pli detale klarigi mian penson. La dubo sekve devas esti relativa k limigita ĝia kampo.

Oni ne povas dubi pri la ekzisto de esperanto, pri la ekzisto de SAT ; sed neniu povas havi la certon, ke la unua estas la ununura solvo al la problemo pri tutmonda interkompreniĝo k ke la dua estas la plej taŭga organizformo. Sed oni povas, oni eĉ devas dubi pri tio, ĉu esperanto

(1) Tiuj artikoletoj aperis sub la ĝenerala titolo *Inter Ni*. — *Kompil.*

triumfos, ĉu SAT ne detruiĝos. Esperanto ne ekzistas en si ; ĝi vivas nur per nia komuna volo k estus danĝere kredi, ke nenio povas ĝin detrui. La samon oni povas diri pri nia organizo.

Kiu entreprenas vojaĝon, tiu tute prave povas dubi, ĉu li atingos la celon. Tamen ĉiutage homoj ekvojaĝas. Mi tute ne bezonas havi « fidon » k « kredon » por labori. La K-doj kunfondintoj de SAT povus atesti, ke mi ĉiam estis la plej dubema el ĉiuj pri la vivkapablo de nia Asocio. Kaj tamen mi laboris. La eksperimento ŝajnis al mi interesa k inda je oferoj. Tial mi oferis al ĝi tempon, energion k ceteron.

Proletoj ne povas dubi, ke ili estas ekspluatataj, k tiu certo devas instigi ilin trovi vojon por forigi la ekspluatadon. Ne ĉiuj elektas la saman vojon ; pro tio ekzistas diversaj inter si konkurencaj organizoj. Pri la vojo estas permeseble dubi.

Homoj konstatas, ke ili vivas k sentas en si bolantan energion, kiu devas ŝpruci. Temas decidi pri la maniero utiligi tiun energion. Iuj diboĉas, kartludaĉas aŭ preĝas al dio k tiel pasigas sian liberan tempon. Aliuj serĉas malsimilan vojon por disŝuti sian energion k elektas tiun, kiu ŝajnas al ili plej inda, saĝa k nobla ; tiel kreiĝas ĉe homoj iu vividealo, kiu fariĝas por ili obeinda leĝo. Kiam homoj agas laŭ la principoj, kiuj konsistigas tiun idealon, ili sentas en si moralan ĝojon ; en mala okazo — malestimon al si.

La malfacila flanko de l' problemo kuŝas en tio ĉi : kiel eduki la homojn, ke ili elektu indan, belan, noblan vivmanieron ? Kiel atingi, ke ĉiu el ni preferu perdi la vivon ol perfidi la vividealon, kiun li starigis al si ? La respondo al tiuj demandoj transirus la kadron de ĉi tiu rubriko k mi limigos min per unu aserto-konsilo : celi vivi heroece. Kaj ekzistas iuspeca heroeco, kiu postulas ĉiutagan zorgon ; ĝi estas la plej malfacila pro sia ĉiutageco. Estas ja pli facile morti sur barikado aŭ milit-

kampo dum ekscitiĝo k iafoje ebriiĝo, ol ĉiutage plenumi zorge k akurate taskojn libere akceptitajn. Homoj venas akurate al sia laborejo, tial ke ili timas la mastron ; sed malakurate ili vizitas kunvenojn...

Vere liberpensanta homo ne bezonas « fidon » k « kredon » je io ajn por esti instigata labori. Sed estus kruele forpreni la lambastonojn de krura kriplulo ; same ni ne riproĉu la kredon al tiuj, kiuj bezonas ĝin por agi.

La dubemo rilatas al la teknikeca menso, la kredo al la religieca. Ambaŭ mensoj reprezentas malsaman stadion de la cerba evoluo. Pri multaj demandoj malsame evoluintaj mensoj ne povas interkompreniĝi. Ateisto k deisto fakte ne parolas la saman lingvon, eĉ uzante la samajn vortojn.

Pastroj k politikaj gvidantoj neniam predikas dubemon. Ili ja bezonas kredantojn. Nia Asocio estas nek eklezio nek partio, tial estu al SAT-anoj permesite dubi.

(2-X-1930.)

## Forto de ideoj

Oni povas pli malpli kontentige klarigi al si la naskiĝon de ideoj per la materialisma filozofio. Ilia evoluado k la fakto, ke ili postvivas la kaŭzojn, kiuj naskis ilin, ŝajnas al mi malpli facile klarigebla. Kial ekzistas malsamaj religioj en samaj loko, tempo, vivkondiĉoj k cirkonstancoj ?

Farante tiun demandon, mi pensas pri la mahometanoj k hinduoj en Hindio. La unuaj ja mortigas bovinojn por manĝi ilin k la duaj, kiuj konsideras sanktaj tiujn laktodonantajn bestojn, kelkfoje... mortigas mahometanojn ĝuste pro ilia mortigemo al bovinoj...

La ideoj estas grandaj fortoj. Kiam homoj mortas k mortigas por konservi sian naciecon, sian lingvon, sian apartan vivmanieron k. s., ilin instigas al tio ideoj. Se la marksismo fariĝus nova religio tiom altirpova por la laboristaj amasoj, ke ĝi kolektus ilin milionope en ĉiuj landoj, la socialismo povus eble esti konstruata eĉ se la historia materialismo ne estas senmanke fundamentita.

Kiam komunisto-laboristo k socialisto-laboristo interbatalas, ilin instigas ideoj. Ĉe tia konstato oni iafoje volus detrui la ideojn. Neeble. La homo estas animalo, kiu havas ideojn. Por detrui ideojn oni devas detrui la cerbojn, kiuj entenas ilin.

Sola solvo al tia problemo estas, ke la homoj akiru ĝustan komprenon pri la relativa valoro de ideoj k ne konsentu morti aŭ mortigi pro ili.

Sed kiam laboristoj batalas por akiri pli bonajn labor- k vivkondiĉojn, tiam ili ne batalas pro ideoj. Pli alta salajro, pli mallonga labortempo — tio estas konkretaĵo. La klasbatalo estas fakto, ne ia ideologio.

En la Ajnŝtejna (Einstein-a) epoko la relativismo eniris eĉ la kampon de la t. n. ekzaktaj sciencoj. Ĉu ne estas dezirinde, ke ĝi ankaŭ eniru en SAT? Mi opinias, ke jes. Kaj se tiel okazos, la kamaradeca kunlaborado inter SAT-anoj kun malsamaj politikaj konvinkoj, sed samaj interesoj, povas funkcii glate aŭ almenaŭ sen tro fortaj interpuŝiĝoj.

Tiel estu!...

(15-VIII-1930.)

## Kiel naskiĝas ideoj ?

— Ĉu la ideoj ĉiam naskiĝas el la materio? Tion mi ne kredas... Se oni detruas la cerbojn, kiuj portas ideojn, ĉi-lastaj pro tio ne mortis; ili pluekzistas...

— Neniam ĝis nun iu ajn povis konstati la ekziston de ideoj, kiuj ne rezultus el funkcianta cerbo. Kaj ŝajnas, ke cerbo estas io materia, ĉu ne? Ĉu nia K-do opinias, kiel Platono, ke la Ideoj ekzistas en si k sidas ie en la sino de la Eternulo? Ĉu, kiel la fama greka filozofo, li kredas, ke ili estas la eternaj tipoj pri ĉio, kio en surtera mondo estas ŝanĝiĝanta k pereanta? Estas ja permeseble, sen risko esti konsiderata kiel stultulo, havi tian kredon, ĉar Platono ĝin havis k estas ankoraŭ nuntempe konsiderata kiel plej profundpensa filozofo. Sed mi tenas min ĉe la simpla saĝo k ne volas erarvagi en subtilajn metafizikaĵojn.

Jen vidu ĉi tiun lignaĵiston ; li penadas kunigi tabulojn por fari tablon. Tiucele li devas ebenigi tiujn tabulojn. Tion farante li akiras ideon pri ebeno. Se tiu sama laboristo estas iom pripensema, li certe konstatas, ke en sia hejmo mankas komfortaĵoj, dum li konstruadas luksaĵojn por homoj, kiuj kompense nenion utilan faras. Tio ne estas justa, li sendube pensas. Tiel li akiras ideon pri justo.

Ni supozu, ke tiun laboriston oni mortigas ; nu, aliaj homoj same penante ebenigi aĵojn ankaŭ akiros la ideon pri ebeno. Kaj se ili estas same proletoj, la konstato pri maljustaĵoj, kiujn ili suferas, naskos en ilia cerbo la ideon pri justo.

Klara k facile komprenebla afero ! Sed mi rezignas kompreni la klarigojn de Platono k de aliaj malpli famaj ideistoj...

Sed ni atentu : la ideo pri justo restas vere

tro... platona, t. e. tro abstrakta en la cerbo de la granda plimulto da homoj. Milionuloj tre sincere opinias justa la fakton, ke ili posedas tiom da riĉaĵoj; k multaj mizeruloj sentas nur envion al la riĉuloj; volonte ili konsentus esti mem milionuloj, se la bonŝanco permesus.

En la diskutata « Inter Ni » mi parolis pri la « forto de ideoj » k agnoskis ĝin. Sekve mi ne kontraŭus al tio, ke oni faru ian miton el ideo kapabla unuecigi mondskale la spiritojn. La justo povas esti unu el tiuj ideoj. Ĉu tion celas nia K-do? Kredeble jes, k mi ne volas uzi favoran okazon por moketi lian ideismon.

Se la ideo pri ebeno ne ekzistas en si, tio ja ne gravas, se sufiĉe da lertaj metiistoj kapablas fari ebenaĵojn; same direble pri justo, se sufiĉe da homoj pretas efektivigi justan sociordon. Estas eĉ tre bone, se ili sentus sin morale k forte devigataj agadi juste.

Jam delonge iu fama moralisto, kies nomon nun mi ne memoras, diris, ke maljustaĵo farita al unu sola homo estas minaco al ĉiuj. Oni sekve povas pravigi la neceson agi juste eĉ je pure egoisma, materialisma vidpunkto.

(16-X-1930.)



# SENNACIISMO

## Venis anarkisto...

— Ĉu do vi fariĝis spirita sklavo, doktrina kredemulo...?

Tiel kun riproĉema tono alparolis min iu anarkisto, kiun de longe mi konas kiel sinceran k sindoneman K-don.

— Diru, mi petas, kial vi min vipas per tia demando, mi respondis.

Kaj tiam estiĝis vigla diskutado, el kiu ties esencon mi raportu ĉi-tie.

— En la novembra n-ro de *Sennacieca Revuo*, vi provis pravigi la sennaciismon je marksisma vidpunkto. Ĉu do vi ĉesus defendi tiun ideon, se ĝi ne akordiĝus kun la marksismo?...

— Mi atendis vin, ho! kara demandanto. Skribante mian artikolon mi jam antaŭaŭdis vian voĉon. Mi estas do preparita por respondi.

Diris Tolstoj pri Evangelio: « Tio ne estas vera, tial ke ĝi estas evangelia diro; sed Evangelio estas vera, tial ke ĝi diris tion. »

Tiasence mi prijuĝas la marksismon, kiu estas kvazaŭ evangelio por la Proletaro. Kaj sekve mia prudento ordonas al mi obei la decidojn de la Partio, kiu, laŭ mia kompreno, plej ĝuste klarigas la penson de *Karlo Marks*.

— Ho! ĉesu, ĉesu, mi petas; mi ne venis al vi por aŭdi apologion pri Marks... Mi deziras nur ekscii, ĉu vi ĉesos defendi la sennaciismon se okaze « via » Partio malaprobus ĝin.

— Stranga demando.

— Ĉu stranga, kiam oni scias, ke la prezidanto de *Komintern* primokis esperantismon.

— Mi tuj rimarkigu, ke esperantismo k sennaciismo ne estas du samsignifaj vortoj. Ĉu do, kiel iaj kontraŭuloj de SAT, vi volas identigi ilin?

— Ne, tute ne... Sed rimarku, viavice, ke sennaciismo ne estus defendebla, se ne ekzistus mondlingvo. Sekve, tial ke Zinovjev primokis la mondlingvanojn, konsekvence nia sennaciismo estas ankaŭ primokata.

— Logike vi argumentas. Sed vi forgesas, ke nur *Komintern*, kongresanta, povas decidi pri tiaspecaj demandoj. Zinovjev eldiris simple sian personan opinion, k neniel lia diro devigas komunistojn konsideri ĝin kiel decidon de *Komintern*.

Fakte, ĝis nun, neniam la mondlingva problemo estis serioze pristudata de niaj oficialaj rondoj. Kaj ĝuste pro tio mi konsideras kiel mian komunistan devon klopodi k batali por ke nia plej alta Instanco aŭskultu nian voĉon k solvu tiun problemon.

Mi do petas vin, ke antaŭ ol direkti al mi vian demandon, vi atendu ĝis *Komintern* estos per kongresa decido deklarinta, ke estas malpermesate al komunistoj uzi k propagandi esperanton; ke male ili devas ĉiaokaze defendi sian gepatran lingvon, k konsekvence sian patrion; unuvorte ĝis *Komintern* klarigos la dirojn de Marks, kvazaŭ la katolika Eklezio klarigas tiujn de Jesuo...

— Via ironia respondo ne kontentigas min. Por ĝin rebati sufiĉas diri, ke ĝuste la komunistgvidantoj en Germanio identigas la interesojn de l' Proletaro kun tiuj de la nacio; ili diras, kiel la naciistoj, ke: « la Germanoj devas liberigi sian landon el sub la fremda jugo. »

Ĉu do *fakte* tio ne estas malaprobo al la sennaciismo?

— Bone, mi gratulas vin pro via lasta demando. Antaŭ momento vi demandis, kian sintenadon mi havos... se okazus ia decido. Nun vi parolas pri konkreta fakto. Trafe! Nur starante sur tia firma bazo oni povas utile diskuti.

Bonvolu rimarki, ke estas ĉiam necese distingi inter teorio k praktiko; inter celo k taktiko. Por atingi iun celon ne estas ĉiam eble sekvi rektan vojon; estas iafoje necese zigzagi, halti, eĉ malantaŭeniri. Pro taktikaj motivoj povas esti necese fari kompromisojn. Generalo ne rajtas lasi perei sian armeon por obei strategian principon, se montriĝas dum la batalo, ke ĝi ne estas aplikebla en iu neantaŭvidata okazo. Tiel agas, laŭ mia kompreno, la Germana Komunista Partio.

Sed ne malatentu, ke nur la G. K. P. povas kun ŝajna pravo esti riproĉata pri kompromiso. En tia okazo, la Franca Komunista Partio, aprobante la starpunkton de sia fratpartio, povas esti nur konsiderata kiel naciperfida. Sekve, taktiko kiu ŝajnas nacieca rilate al la G. K. P., estas nekontraŭdireble sennacieca rilate al la F. K. P.

Nur metafizikuloj povas postuli, ke ĉiam k ĉie oni devas apliki rigore difinitajn principojn.

— Tiuj viaj argumentoj ŝajnas al mi tro subtilaj. Mi eĉ opinias, ke ili povas esti konfuzaj por la SAT-anaro. Almenaŭ ni, anarkistoj, neniam konsentos partopreni agadon naciece aspektantan.

— Estus viaflanke pli prudente paroli nur je via propra nomo: vi ja ne devas forgesi, ke dum la milito *Kropotkin* k aliaj eminentaj anarkistoj konsilis partopreni la militon « kontraŭ la germana militismo » k sekve profite al la franca...

— Ja, kompreneble, mi parolas nur je mia propra nomo. La anarkistoj ne agnoskas partian disciplinon; ili obeeme ne sekvas « estrojn ».

— Mi scias, k ĝuste tie kuŝas la punkto, kie

disiĝas komunistoj k anarkistoj. Ambaŭ estas samcelanoj; ambaŭ deziras forigi la ŝtatregadon k celas plej grandan liberon por la individuo.

— Ho! pri tio mi dubas...

— Vi dubas! Aŭskultu do, kion diris *Lenin* mem: « La forigo de l' ŝtatregado estas la celo, kiun ĉiuj socialistoj, Marks unuavice, alcelis... » Ni estas certe samcelanoj, se ne samvojirantoj.

— Mi ne intencas hodiaŭ diskuti kun vi pri la plej irinda vojo. Mi deziras nur ekscii, ĉu vi restas firme preta altenteni la standardon de l' sennaciismo.

— Kial do vi timas? Ĉu vi rimarkis ĉe mi ian ajn emon forlasi nian idean ligilon? Mi ne estas tiom malsaĝa forlasi tion, kio faras la forton de SAT.

Mi restas konvinkita, ke nia sennaciismo estas plene adekvata al la komunismo; sed mi ankaŭ opinias, ke estus tute maltrafe apliki la taktikon de politika partio en SAT — k inverse. Nia organizo devas esti *aparato,* kiun ĉiuj samcelanoj uzu por la profito de sia partio aŭ sindikato. Se la anarkistoj uzas pli bone k pli ofte la aparaton ol la komunistoj, ĉi-lastaj ne povos riproĉi — same estu, se la komunistoj montriĝos pli agemaj.

— Nu, mi penos por ke la anarkistoj ne estu superotaj...

— Bonan ŝancon. Tio ne spitas min; la komunismo ne domaĝos pro via agemo, k profitos esperanto...

(1-1924.)

## Internaciismo — Sennaciismo

« Senvole ni tendencas, kiam oni parolas al ni fremdan lingvon, enmeti en la aŭditaj vortoj sonojn al niaj oreloj familiarajn k intimajn. Tiel, ekzemple, la Germano faris en la pasinta tempo el la vorto *arcubalista,* kiun aŭdis li, la vorton *Armbrust* (arbalesto). Niaj sentoj mem rezistas k malsimpatie rilatas al kio estas nova ; ĝenerale, en la plej simplaj procezoj de la sentokapablo, jam *superregas* pasioj, kiaj estas la timo, la amo, la malamo, enkalkulante tiun pasivan pasion, la mallaboremon ».

Tiu eldiro de l' profundpensa filozofo Niĉe (Nietzsche) estas vera k konstatebla la fakto ne nur rilate lingvajn sonojn, sed multfake. Se ni, ekzemple, atente observas la spiritostaton de kelkaj SAT-anoj, ne nur de tiuj, kiuj kvazaŭ enŝteliĝis en nia organizo kun la kaŝita celo aliigi ĝian spiriton, sed de sinceruloj bonintencaj, ni povas kelkfoje konstati, ke en la vorto *sennaciismo* ili simple metas la sencon de internaciismo.

Kaj miriga tio ne estas. La sennaciisma koncepto estas ja tro nova, ne sufiĉe klarigita, por ke ĝi povu esti ĝuste komprenata k mense alcelata. Por percepti ĝin, necesas konstanta streĉado intelekta, kiu kvazaŭ eltiras nin el la hodiaŭa marĉo, el la senĉesaj influoj naciecaj, en kiuj ni kvazaŭ baniĝas.

La sennaciisma ideo povis naskiĝi nur en la epoko, kiam ekzistas mondlingva movado jam sufiĉe forta. Sed ĝi ne povis ne naskiĝi. Tiu nova koncepto enkutimiĝos tre malrapide k nur en la movado, kiu aplikadas esperanton, profite al la proletara klaso, t. e. en SAT.

Ni ne forgesu, ke la antaŭa ŝtupo, la internaciismo, ne ankoraŭ estas mense atingita de la plimulto el la homoj. Kaj neforgesinde estas, ke eĉ

en la internaciistaro troviĝas multaj senkonsciaj naciemuloj.

Tamen nur blindaj ŝovinistoj ne vidas, ke vole nevole la mastrumado de l' mondo jam devas obei pli malpli la internaciisman principon. La ĉiuspecaj filistroj, kiuj denuncas k abomenas la « internacian kapitalon », la « internacian spekulacion » ktp. nur disfamigas la ekziston de iu nehaltigebla fluo, de iu neforigebla fakto.

En la jaro 1864 fondiĝis la I-a Internacio. Do pli ol sesdek jaroj jam forpasis de kiam la tiamaj « utopiistoj » proklamis la neceson por la laboristaro sin organizi super la landlimoj. Hodiaŭ la internaciismo estas ĉe la sojlo de l' venko. Kaj jen postvenas malforta, apenaŭ pensebla koncepto : la *sennaciismo*. Estu for ĉiuj limoj, ĉu ŝtataj, landaj, regnaj, lingvaj !... Mondekonomio, mondlingvo, mondmastrumado...

Sed la entuziasmuloj sin gardu kontraŭ iluzioj. La internaciistaro, kiu cetere ne ankoraŭ tutvenkis, ne estas preta sekvi novan ideofluon. Sed kiu pli klare vidas la malproksiman celon, tiu devas pionire marŝi unuavice, ne atentante la malkuraĝulojn, kiujn timigas neesplorita regiono. La veraj SAT-anoj devas penadi venki tiun « pasivan pasion », la intelektan mallaboremon, pri kiu parolis la mondfama Niĉe.

(16-VII-1925.)

## Ne dum la domo forbrulas

— « Sennaciismo k kontraŭŝovinismo samsignifas », estas dirite en la protokolo de la V-a Kongreso.

Mirige k strange !...

Se mi ĉeestus la Kongreson, akre tian opinion mi rebatus. Kaj estas ja strange, ke vi mem ĉe

tia diro ne eksaltis por ĝin plej energie kontraŭdiri k senkompate vipi la herezulon...

Tiel alparolis min juna, simpatia entuziasmulo. Kun riproĉa mieno k insista tono li atendis mian respondon. Kaj tiam mi sentis min kvazaŭ akuzato antaŭ juĝisto.

— Iel pravas via indigno, respondis mi. Tamen bonvolu kvietiĝi k kompreneme aŭskulti.

Ĉu do vi ne devis mem ofte prokrasti taskojn, tial ke aliaj ŝajnis al vi pli urĝe plenumendaj? Kion vi opinius pri iu, kiu akvumus salatojn en sia ĝardeno, dum lia domo forbrulas? Kredeble, vi pensus, ke tiu persono estas tute malsaĝa.

Nu, ĉe la V-a, la ĉefa, la urĝa tasko konsistis el tio, ke necesis fari ĉion eblan por konservi k plifortigi la necesan unuecon en SAT. Ĉio cetera ŝajnis al mi tiam malatentinda k ne tuj zorgenda. Temis ja forigi la kaŭzojn de interdisputo, por ke la spirita atmosfero de la Kongreso ebligu finfinan interkonsenton, unuanimecon. Tiel okazis. Kaj jen kial via iel prava riproĉo ne ŝajnas meriti seriozan konsideron.

Mi parolu al vi tute sincere k malkaŝe. Ĉu do estas tre grava la fakto, ke SAT-anoj povas havi eraran komprenon pri la signifo de la termino *sennaciismo*? Ne, tute ne gravas la afero. Kontraŭe. Ne malplaĉas al mi, ke sinceraj laboristoj, kiuj ne cerbumis longe pri la celo k taskoj de SAT, povas opinii, ke sennaciismo estas nur ia kontraŭŝovinisma koncepto. Nia organizo ne devas esti ia sekto el teoriuloj, kutimantaj analizi la signifon de ĉiu termino; ĝi devas resti malferma al ĉiuj senescepte esperantistoj, starantaj sur la klasbatala kampo.

Mi ja scias, ke patriotismo k kontraŭŝovinismo povas bone akordiĝi. Sed, mi ripetas, ne gravas se esperantista laboristo eraras pri la signifo de vortoj. Sufiĉas, ke, por apliki esperanton, la SAT-aparato devigu lin agadi en sennacieca kadro.

Tie kuŝas la gravaĵo. La cetero estas nur akcesoraĵo.

Sekve, estu certa, ke mi ne sidus trankvile k mute, se la parolo de nia nure kontraŭŝovinista K-do riskus aliigi la strukturon sennaciecan de nia organizo...

(5-XI-1925.)

## Neantaŭvidita rezulto

La sennaciismo havas tute neantaŭviditan rezulton : ĝi efikas pacige eĉ rilate lingvan disputon. Mi aludas pri la jam delonge okazanta disputo inter la « ujo-anoj » k la « io-anoj ».

Vi miras ! Nu, aŭskultu mian rakonton.

Antaŭ kelke da tagoj, tute hazarde mi renkontis s-ron Kar (Cart), la Prezidanton de l' Esperanta Akademio. Ekvidante min, li eksalte, senartifike alparolis :

— Ha ! estas vi, la malbonulo, la io-ano !... Kial, diable, vi ne deklaras publike, ke nur pro *politikaj motivoj*, vi ne uzas la fundamentan sufikson *uj* ĉe landnomoj ?...

Vi ne volas lasi la ekziston al la nacioj, sekve vi logike povas nur uzi la finaĵon (ne sufikson, diablo !) *io*. Tion permesas la Fundamento, kiam la gento ne donas sian nomon al sia lando, ekzemple, estas tute laŭfundamente diri : Alĝerio, Aŭstralio, Kolombio, ktp. ; ĉar tie malaperis *politike* la primitivaj gentoj.

Ĉar vi ne konsentas esti « Franco », mi bone komprenas, ke ankaŭ vi ne povas allasi, ke nia lando estu ujo por Francoj...

Sed, mi ripetas, deklaru tion tute malkaŝe, por ke oni sciu, ke nur pro politikaj motivoj k ne pro malobeemo al la Fundamento vi ne uzas la sufikson *uj* ĉe landnomoj...

Parolis laŭte, flame k entuziasme la vigla, june maljuna k simpatia Prezidanto de l' Akademio. Ĉe lia parolo mia miro estis tiom granda, ke mi ne povis danki kiel decus pro tio, ke li malkovris la kaŝitan motivon, kiu igis la sennaciulojn senkonscie preferi la finaĵon *io* ol la sufikson *uj* por nomi la artifike aŭ perforte limigitajn terpartojn, en kiuj stulte sin apartigas la popoloj.

De nun, sen ia konsciencriproĉo pro peko kontraŭ la sankta Fundamento, ni do povos tute libere uzi la formojn Francio, Sovetio, Esperantio, ktp. Sennaciismo estas ja vera pacigilo. Restas nur varbi al nia ideo la Prezidanton de l' Esperanta Akademio! (Ĉu facila la tasko?) Almenaŭ li estu varme dankata pro la liberala permeso, kiun li donis al la sennaciuloj...

(22-VII-1926.)

## Sennaciismo je praktika vidpunkto

Pridiskuti ĉu la tuta mondo sennaciiĝos post pli malpli longa tempo — post unu aŭ du jarcentoj — tio povas havi nur spekulativan intereson. Sed la proletoj, kies vivo estas ĉiutage minacata de la naciisma politiko, devas prikonsideri la demandon je tute aktuala vidpunkto.

Tion ni provu fari, ekrigardante al la nunaj problemoj, kiujn ĉiutage priparolas la ĵurnaloj el la tutmondo. Ekzemple, la usona imperiismo estas nun same vigle atakata en la gazetoj de revoluciaj partioj, kiel en tiuj de la naciistaj, eksterusonaj partioj.

Ĉu tio ne estas iom stranga?

La problemo povas esti starigata jene: ĉu la usona imperiismo iom post iom englutos la malfortajn ŝtatojn, kiuj najbaras ĝin; ĉu ĝia ekpansia

potenco senĉese disvastiĝos? Unuvorte, ĉu Usono finfine superregos la tutan amerikan kontinenton, de la markolo Bering, norde, ĝis la terpinto Horn, sude?

Kaj ĉu tio estas indiferenta aŭ ne por la laborista klaso? Ĉu ĉi lasta devas batali, militi por defendi la « sendependecon » de la ŝtatetoj, kiuj provas tra la tuta kontinento evoluigi, ĉiu aparte, nacian burĝaron, k konsekvence naciecan ideologion?

Por vidi pli konkrete la problemon, ni ekrigardu malantaŭen, ĝis la mezo de l' lasta jarcento. Ni vidas, ke Usono milite forprenis de Meksikio vastan regionon, kiu konsistigas nun la ŝtatojn Teksas, Arizona, Nov-Meksikio k Kalifornio. Kaj post kiam Usono venkis Hispanion k forigis tute ĝian regadon el Ameriko, la usona imperiismo antaŭeniras pli rapide al la sudo. En 1903 ĝi kaptas la kanalon de Panama k larĝan zonon ĉirkaŭ ĝi per dispartigo de Kolombio. Poste okazas intertrakto kun la respubliko de Nikaragvo en 1915, per kiu Usono akiras la superregadon sur la financoj de tiu ŝtateto k la ekskluzivan privilegion konstrui kanalon tra la istmo de Nikaragvo.

Necesas ankaŭ mencii, ke per diversaj financaj intertraktoj Usono fakte superregas la respublikojn de Haiti k de Santo-Domingo.

Kaj nun la longdaŭra konflikto, pli k pli akriĝanta, inter Usono k Meksikio alvenigas nin al la aktuala punkto de l' giganta problemo. Ĉu la Meksikia Laboristaro havas intereson defendi « sian » landon kontraŭ la usona imperiismo? Ĉu la viv- k laborkondiĉoj de la laboristoj el la ŝtatoj formitaj el la terpartoj jam « rabitaj » el Meksikio de Usono estas pli- aŭ malpli bonaj ol tiuj de la meksikiaj laboristoj?

Por respondi tute precize al ĉi lasta demando necesus posedi informojn, kiuj tute mankas al ni. En Meksikio k en la menciitaj ŝtatoj estas bedaŭrinde neniu SAT-ano, k eĉ se estus tie kelkaj, ili

eble ankaŭ preferus priparoladi politikajn okazintaĵojn, ol informi pri siaj vivkondiĉoj.

Ni emas tamen pensi, ke ne ekzistas granda diferenco inter la sorto de la laboristoj usone regataj k tiu de la laboristoj meksikie regataj.

Almenaŭ ni scias, ke en Meksikio kreiĝas nun nacia burĝaro, nacia kapitalo, kiu provas liberiĝi je la fremda kapitalo. Kaj, sekve, por la meksikia Proletaro la demando estas jena : ĉu estas saĝe, ke ĝi preferu esti ekspluatata per fremda kapitalo aŭ nur per la nacia ?

Se ekzistus en Meksikio sennaciistoj, certe ili tiele prezentus al si la demandon. Kaj ili same certe respondus : ni ne konsentas helpi al la enlanda, nun kreiĝanta burĝaro, por defendi ĝiajn profitojn kontraŭ la atakoj de la usona kapitalo ; ni pretas partopreni nur unu batalon : la klasbatalon ; ĉiu alia batalo estas nur trompo k mensogo ; ni deklaras laŭte nian deziron unuiĝi *kun* la usonaj laboristoj por klasbatali, por forigi ĉian ekspluatadon k ĉiujn landlimojn — k nian malkonsenton militi nacie *kontraŭ* niaj usonaj samklasanoj.

Jes ja tiele parolus sennaciistoj.

Nun ni demandas : ĉu same parolas ĝenerale la gvidantoj de la laboristaj partioj ? Ĉu estas vera la diro de tiuj, kiuj asertas, ke ĉiu revoluciulo estas ankaŭ sennaciisto, ke tute ne necesas priparoli k instrui sennaciismon ?

Povas esti, ke la sennaciisma ideologio ne havas ŝancon kapti la spiriton de la amaso. Povas esti, ke ni vidos, same kiel en 1914, ankoraŭ kelkfoje la popolamasojn lasi sin peli en patriotajn buĉadojn. Ni ja scias kiom forta estas la nacieca ideologio, kiom indiferentas la Laboristaro pri nia kulturmovado, kiom malmulte da internaciistoj konsentas ellerni esperanton. Sed ĝuste pro tio ni opinias, ke la SAT-anoj devas sin gardi, devas *ĉiarimede provi eviti* la partoprenadon en naciecaj militoj.

Kaj pro tio ili unue devas ĉiam prikonsideri ĉiujn aktualajn problemojn je la sennaciisma vidpunkto, por ne lasi sin trompi kiel la amaso.

Ne necesas esti profeto por ekvidi, ke la internaciistoj trovos ankoraŭ belajn pretekstojn por pravigi la partoprenadon de la proletoj en la venontaj militoj naciecaj. Ni ankoraŭ ne forgesis, ke en 1914 la francaj internaciistoj emfazis, ke la Laboristaro havas intereson defendi la demokration kontraŭ la germanaj aŭtokratio k militarismo. Kaj la germanaj internaciistoj argumentis, ke la socialistaro devas defendi la kulturon kontraŭ la carismo ktp. Oni ne dubu, ke morgaŭ samaj mistifikaĵoj povos ankaŭ efiki por trompi la simplan popolon.

Se SAT sukcesos atingi, ke, ĉe la venonta milito, ĝiaj anoj estu malpli facile trompeblaj ol la aliaj proletoj, nu, nia Asocio estos bone plenuminta sian edukan taskon.

Sed, mi ripetas, necesegas por tio, ke ni kutimiĝu pli k pli konsideri ĉiujn faktojn, ĉiujn okazontaĵojn, je sennaciisma vidpunkto.

(5-II-1927.)

## Viduloj povas sin direkti aliel ol blinduloj

Iu K-do skribis : « Via sennaciismo estas eble ĝusta teorie, sed taktike ĝi estas ne aprobinda. Laboristaj partioj neniel povus akiri influon sur la amasojn, starante ĉe tia vidpunkto. En la nacie subpremataj landoj, la proletoj k mizeruloj firme kredas, ke ilian malbonan situacion kaŭzas la konkerintoj. Ili proprokule vidas reprezentantojn de la subpremanta nacio, k tiel ilia malamo trovas konkretan objekton. En Irlando, ekzemple, Konoli (Conoly) ĉiam diris : « Ni liberiĝu el la brita jugo

por konstati, ke la kapitalismo estas la malamiko — ne la brita nacio. »

Gvidantoj de partioj havas kiel ĉefan celon kapti la regadon en siajn manojn, k sekve ni bone komprenas, ke ili ne tro volas kontraŭstari al la antaŭjuĝoj de la amasoj.

Sed SAT difinis al si alian taskon. Ĝi celas eduki; ĝi klopodas, ke ĝiaj membroj inter si ignoru la naciojn, tial estas tute logike, ke ni kutimiĝu prikonsideri problemojn je propra vidpunkto. Neniam ni proponis al nesamlingvanoj nian taktikon; ni nur celas montri, ke jam laboristaj esperantistoj staras ĉe la supro de la alta monto, al kiu sin direktas la Laboristaro.

Ni ja tro bone scias, ke la historian procezon ne gvidas la racio. La antaŭenirado de la homaro tre ofte okazas zigzage, palpe, blinde. Sed ĉu viduloj devas sekvi la saman vojon kiel blinduloj? Pli precize: ĉu sennaciistoj devas ankaŭ oferi sian vivon en bataloj por nacia liberiĝo, se ili jam konvinkiĝis, ke tio estas nur trompa iluzio? Ĉu patriotoj ne sufiĉas por fari tiun eksperimenton?

Ĉar la grandega plimulto da homoj estas movata de la sentoj k antaŭjuĝoj, ne estas mirige, ke la homara evoluo okazas en sangaj bataloj. Sed kiu konas la rektan direkton, tiu ne erarvagas tra dornoplenaj, malrektaj vojoj. Sennaciisto, kiu ne deziras sin mortigi, provas preterpasi la interpuŝiĝojn, kie diversspecaj naciistoj batalas inter si. Mi konsentas, ke la afero ne ĉiam estas facila. Sed ĉu decas, ke saĝulo kondutu kiel frenezulo, se okaze li troviĝas en frenezulejo?

Iu kontraŭvole, akcidente mortas en milito. Aliu memvole oferas sian vivon en tiu sama milito. Ni ne samigu la du okazojn.

(26-VII-1928.)

## Pri la " interna ideo "

Oni ofte mokis la « internan ideon de esperanto », pri kiu parolis la aŭtoro de ĥia lingvo. Ne sen motivo, cetere. Kelkiuj ja faris el tiu Zamenhofa koncepto ian religion, ian mistikon. Kiel okazas pri ĉia mistiko, ĝi simple fariĝis... mistifiko — per belsonaj paroloj de la pastroj de tiu nova religio. Ĝi estis — ankoraŭ estas — temo por vantaj, senenhavaj paroladoj, kiuj ĉarmas la aŭdsenton de aŭskultantoj. Tiel predikantoj akiris famon, popularon — k ceteron...

Tamen ne ĉiam oni prave kritikis la « internan ideon ». Necesas ĝin kompreni bone. Ĉiu idea movado havas ĉe sia komenco religiecan periodon. La socialismo ankaŭ estis « utopia », antaŭ ol fariĝi « scienca » per la laboroj de K. Marks.

Ĉe la komenco de la esperanta movado, la « interna ideo » estigis entuziasmon k propagandan fervoron ĉe la unuaj pioniroj. Ĝi estis ia unuecigilo k ludis atentindan rolon en la kriza epoko, kiam matematikuloj k logikemuloj (1) maltrafe volis enkonduki sur la lingvosciencan kampon disciplinojn taŭgajn nur en abstraktaj sciencoj.

Esperanto estas nur ilo. Sekve ĝi ne povas enteni ian ajn ideon. Sed la homoj uzas ilojn. Tiel ĉi tiuj lastaj fariĝas kvazaŭ inteligentaj, ideohavaj. Per la iloj la homoj aliiĝas, transformas la mondon.

La ilo esperanto estas bonega. Kiam ĝi estos mondskale k ĝenerale uzata, rezultos el tio grandega ŝanĝiĝo, apenaŭ imagebla.

Eble Zamenhof intuicie antaŭvidis tiun mirindan ŝanĝiĝon. Kaj, estante idealisto, li atribuis ĝin al iu ideo, kiu sin kaŝas en la lingvo de li elpensita...

SAT-anoj mokas la religion, kiu estiĝis el la

(1) Alude al la idistoj. — *Kompil.*

Zamenhofa koncepto. Sed ili volonte konsentas, ke la aŭtoro de esperanto genie prezentis al si la mirindan forton per kiu la homoj kapablus faligi la lingvajn barojn, se ili konsentus uzadi racie artefaritan lingvon, anstataŭ konservi fetiĉan kredon je ĉiameco de la naciaj lingvoj, je neeblo aŭ neindo ilin anstataŭi.

La vera interna ideo de esperanto konkretiĝas en nia sennaciismo...

(30-VIII-1928.)

## Kiuj devus sidi en frenezulejo?

— Ĉu vere la sennaciistoj celas detrui la naciajn lingvojn?! Estus granda, nepardonebla krimo. Mi apenaŭ povas kredi, ke homoj, kiuj ne sidas en frenezulejo, intencas pereigi tiajn trezorojn...

— Vi estas tamen ĝuste informita, sinjoro. Fakte la sennaciistoj plenkonscie celas la formalaperon de la naciaj lingvoj...

— !!!??

— Kvietiĝu, mi petas. La sennaciistoj frenezaj ne estas. Cetere ne dependas de ilia volo, ĉu esperanto pereigos aŭ ne la de vi tiom ŝatatajn trezorojn. Sed permesu unu demandon. Ĉu vi opinias, ke esperanto estas, aŭ almenaŭ povas fariĝi literatura lingvo? Ĉu la tradukoj el la literaturaj ĉefverkoj, kiujn faris Zamenhof k aliaj talentaj esperantistoj, bone spegulas k komprenigas la originalojn?

— Mi opinias, ke jes...

— Nu, ĉu sekve estus granda domaĝo, se la venontaj generacioj konatiĝus kun Ŝekspir, Volter, Cervantes, Dante, Gete k. a. klasikaj majstroj nur pere de esperanto? Nuntempe la granda plimulto da kleruloj konas la verkojn de Homer, Virgil k de ĉiuj antikvuloj nur pere de nacilingvaj tradukoj.

Tre malmulte da fakuloj ja kapablas legi antikvajn aŭtorojn en originala teksto.

La sennaciistoj havas la firman kredon, ke la nacilingvoj mortos, kiel mortis la lingvoj de malaperintaj civilizoj. Sed ili ne intencas bruligi bibliotekojn. Nur naciistoj kapablas tion fari dum militoj. Sekve ĉu decas ĝemkriadi, ke la sennaciistoj volas pereigi trezorojn ?...

Se esperanto estas taŭga esprimilo por scienco, por tekniko, por literaturo, ĝi pli malpli frue sin trudos al la granda publiko tra la tuta mondo. Kaj sekve de tio estas evidente, ke ĝi fariĝos la ĉefa k eĉ finfine la sola kulturlingvo ; estas al ni klare, ke la nuntempaj kulturlingvoj fariĝos arĥaikaj kiel la lingvoj sanskrita, greka, latina. La naciistoj tion malhelpi ne povos.

Se vi bone pripensas la aferon, vi alvenos al la konkludo, ke ne la sennaciistoj devus sidi en frenezulejo, sed ĝuste tiuj esperantistoj, kiuj ne antaŭvidas la konsekvencojn de sia fervoro por la « kara lingvo ». Al ili oni ĝuste povas rilatigi la latinan proverbon : *Quos vult Jupiter perdere, dementat prius* (1).

(18-x-1928.)

## Ĉu ili estas sennaciistoj ?

« Mi verkas kiel mondcivitano... Frue mi ŝanĝis mian patrion por la homaro, kiun apenaŭ mi image konis. »

Ŝiler (1759—1805).

« La nacioj estas kunfandiĝontaj en unu grandan, kiu faligos la landlimojn. »

Ŝevreŭl (fr. : Chevreul, 1786—1889).

(1) Kiujn Jupitero volas pereigi, tiujn li unue malprudentigas.

« Jes, socio, kiu ne forigas mizeron, jes, homaro, kiu akceptas militon, ŝajnas al mi malsuperaj socio, homaro; k mi celas al pli alta socio, al pli alta homaro: socio sen reĝoj, homaro sen landlimoj. »

VIKTOR HUGO (1802—1885).

« Iun tagon, ni esperu, la tuta terglobo estos civilizita; en ĉiuj lokoj de la homa vivejo regos klero. Tiam estos plenumita la grandioza revo de la intelektuloj: havi por patrio la mondon, por nacieco la homaron. »

VIKTOR HUGO (1843).

« Nacioj! estas pompa vorto por signi barbarecon. Ĉu la amo haltas tie, kie haltas niaj paŝoj? Ni disŝiru tiujn standardojn; alia voĉo krias: « Nur la egoismo k la malamo havas patrion; la frateco estas senpatria! »

A. DE LAMARTIN (1841).

(Ĉi tiu peco estas en belaj versoj en la franca teksto.)

« La faligo de la naciaj limoj, la bridado al la aristokrataj k plutokrataj klasoj, kiuj havas avantaĝon je ilia pluigo, la kunfandiĝo de la interesoj, la starigo de l' *socia egalo,* jen, al kio celas la antropologiaj sciencoj. »

HOVLAK (Hovelacque, 1843—1896).

« La nacieco estas fiktivaĵo ne nur absurda, sed danĝera. La patriotisma ideo k la religia ideo estas superstiĉoj, kiujn inventis la burĝaro por gvidi k obeigi la popolon. »

OSKAR KLEMIĈ (1873).

« La vilaĝoj unuiĝas, poste la urboj, k la provincoj, la landoj; finfine la landlimoj tiom malantaŭeniras, ke ili tute malaperos. Certe venos la tago, kiam ne plu estos milito, tial ke ĉiuj homoj estos civitanoj de unu sola k sama lando, kiu etendiĝos sur la tuta tero. »

H. PEREN-DUPORTAL (1901).

« Se oni konsideras la staton de la homaro kiel ĝi estos post tempodaŭro de cent mil jaroj, estas neeble prezenti al si alion ol puran k simplan unuecon de la homa speco; unuecon realigitan laŭ plej kompleta maniero k ampleksantan, sen ia escepto, ĉiujn homojn el ĉia ajn origino, vivantajn sur la tuta surfaco de l' tero. Tiu absoluta unueco havos federacian registaron, kiu zorgos pri la universalaj aferoj, kun komuna leĝdona principaro, komuna al la tuta tero, kun sama fundamento de kulturo certigata al ĉiuj gefiloj de l' homoj...

« ... Inter tio, kio hodiaŭ disigas la popolojn, estas elemento tre forte kontraŭstaranta la kunfandiĝon; ĝi estas la lingvo. La gravaj lingvoj longe rezistos post la efektiviĝo de la politika unueco, k al ili sin ligos, post la malapero de la ŝtatoj, la lastaj apartiĝemaj korinklinoj. Ili estos, dum kelkaj jarcentoj, kvazaŭ moralaj patrioj, kiuj anstataŭos la materiajn patriojn. Tio estas iom konsola al ni, kiuj ĉagrene ĵetis tro akrevidan rigardon sur tion, kio estos.

« Nenio tamen estas eterna, k ni devas kutimiĝi al tiu ideo, kiu estas ĉagrena, sed vera, ke venos la tago, kiam unika idiomo, kiu eble ne estos la nia (la aŭtoro estas Franco. Trad.), estos sammaniere parolata sur ĉiuj loĝeblaj lokoj. La rezigno devas esti sen maldolĉo. Tial ke tiu unika idiomo, starigante por ĉiam la kuniĝon inter la racio k la scio, efektivigos la fratecon. La homo povos esti fiera. Li estos elfininta la konkeron super sia planedo, moviĝanta malliberejo, entenanta ĉion, kio havas penson, senton k volon. Li estos ĝin pleniginta per sama animo, lasante al la naturo la respondecon esti doninta limojn al tiu reĝlando de la spirito. »

LUDOVIKO HAVE (Havet, 1902).

☆ ☆

Tiajn platonajn frazojn pri kunfandiĝo de nacioj, pri malapero de landlimoj k. s. oni povas trovi *abunde* en la diverslingva eŭropa literaturo. Ĉu pro tiaj diroj oni prave povus nomi tiujn aŭtorojn sennaciistoj? Mi opinias, ke ne. Laŭ mia kompreno, sennaciisto povas esti nur tiu, kiu *konscie* (1) laboras por plirapidigi la historian procezon.

Ĉio, kio tendencas ĉu krei, ĉu plifirmigi, ĉu revivigi naciajn apartaĵojn, tio estas laŭ mi simple reakcia; aŭ, en plej bona okazo, povas nur celi al ia internaciismo, sed ne al sennaciismo.

La artefariteco kondiĉas la sennaciigon de nia planedo. Kaj nuntempe la tekniko, rezulto de artefariteco, troviĝas grandparte en la manoj de l' kapitalistoj. Tial la sennaciiga procezo okazas sub formo de kapitalisma imperiismo. Estas tiu imperiismo, kiu enkondukas la teknikon en ĉiuj mondpartoj. Se morgaŭ Eŭropo k Usono estos regataj socialisme, la sennaciiga procezo ne povos pro tio halti k sekve ni havos ian socialisman imperiismon. Kaj tiel, ĝis la tuta planedo estos unuecigita je mastruma vidpunkto.

Estas de ĉiuj kompetentuloj konfesite, ke la lingvo ludas grandegan rolon en la vivo de homaj socioj. La lingvo estas kvazaŭ subtila k samtempe potencega teknikilo. Vera sennaciisto estas tiu, kiu uzadas k aplikadas artefaritan lingvon kiel teknikilon por forpuŝi k detrui la naciajn idiomojn. Konsekvenca sennaciisto neniel k nenial povas subteni ion ajn naciecan. La batalo por la sendependeco de nacioj estas pravigebla je internaciisma vidpunkto, neniel je sennaciisma.

Se la gvidantoj de la laboristaj movadoj ĉiam ĝis nun sin deklaris por la rajto de la popoloj je nacia memdispono, tio signifas, ke ili estas nur

(1) Necesas diri *konscie*, tial ke fakte, objektive multaj patriotaj, reakciaj inventistoj, teknikistoj, financistoj ktp., laboras senkonscie al la sennaciigo de l' mondo.

konsekvencaj internaciistoj. Ili cetere ĉiam ĝis nun konsideris la esperantistojn kiel neatentindajn fantaziulojn.

Nek la literaturistoj k filozofoj, kiuj kontentiĝis per eldiro de belsonaj vortoj pri mondcivitaneco k kunfandiĝo de nacioj; nek la gvidantoj de laboristaj organizoj, kiuj malatentas la lingvan problemon k batalas por la sendependeco de nacioj, povas logike esti nomataj sennaciistoj.

Sed ĉu utilas batali pri vortoj? Certe ne. Mi ne vidas nuntempe grandan domaĝon en tio, ke homoj samigas la sencon de la vortoj internaciismo k sennaciismo. Sed, kiuj ŝatas logikon k klaron en la ideoj, tiuj ne povas konsenti al tia samigo.

Aliparte, necesas aldoni, ke la vortoj sennaciisto k SAT-ano ne estas samsignifaj. Ĉiu konsekvenca sennaciisto estas ja SAT-ano, sed ne ĉiu SAT-ano estas sennaciisto. En la Statuto de nia Asocio ne estas parolite pri sennaciismo. Tion bone memoru ĉiu K-do, kiu deziras ĝuste kompreni la diskutojn, kiuj okazas nuntempe en la gazeto pri tiu temo.

(21-III-1929.)

## Krei al si sennaciecan animon

— Estas neforigebla *fakto*, ke mi estas germandevena k parolas la germanan lingvon. Sed estus tute indiferente al mi, ĉu la francan aŭ alian de kulturita popolo. En mia lingvo estas tiom da delikataĵoj, ke ĝin mi amas pro tio; ĝi donas al mi estetikan ĝuon. Tial, miaopinie, la mondo estus malpli riĉa, se mankus tiuj variigaj diferencoj, kiujn konsistigas la naciaj lingvoj. Esperanto estu do nur la *dua* lingvo por ĉiuj. Ĉu pro tiu mia starpunkto en tiu demando vi rajtas nomi min naciisto?

— Konstati fakton, tio pruvas nenion en si mem. Epidemioj, militoj ankaŭ estas faktoj; ĉu tio signifas, ke ni devas fari nenion por ilin forigi? Religiulo ankaŭ amas sian religion k trovas en ĝi multe da « delikataĵoj ». Dum la milito, inter miaj frontamikoj estis katolika pastro. Li perdis la kredon je la dia misio de l' eklezio. Tion li konfesis al mi kelkan tempon antaŭ la malmobilizado. Li decidis ne denove survesti sutanon k provi « refari » sian vivon. Li estis tre kulturita, muzikema homo k tre bedaŭris, ke en sia estonta vivmaniero io mankos al li : la pompaj religiaj ceremonioj, kiuj okazas en preĝejoj dum festoj k similaj okazoj. Tiaj aranĝoj ja donis al li grandan estetikan ĝuon. Ĉu pro tio li devus resti en la eklezio?

Laŭ mi, naciisto estas ĉiu, kiu celas konservi naciajn apartaĵojn; ĉiu, kiu ŝatas, flegas k gloras ilin. Ho, mi volonte konsentos, ke la naciismo de nia K-do ne estas atakema k konkerema. Se tiel ĝi estus, oni ja devus nomi ĝin imperiismo. Estus tamen facile argumenti, ke la logika k natura konsekvenco de l' naciismo kondukas al la deziro, ke la tuta mondo profitu el « delikataĵoj », kiujn oni tiom ŝatas...

Oni ja povas konsideri la naciojn kiel eternindaĵojn k klopodi por trovi juran bazon, kiu ebligu inter ili pacajn interrilatojn. Tio estas la interaciisma vidpunkto. Ni ne esploru nun, ĉu la malvolviĝo de la ekonomiaj fortoj, kiuj preparas k trudas la formon de la homaj socioj, permesos tian aranĝon.

Kiam filozofoj parolas pri « historiaj rasoj » (1), pri la « animo de nacioj », mi ne neas tiujn faktojn. Sed la samaj homoj ankaŭ klarigas, kiel naskiĝis k evoluas tiaj rasoj, tiaj animoj. Ili do ne estas io eterna, neŝanĝebla. La tutmondaj trustoj, la tut-

(1) Je biologia vidpunkto puraj rasoj ne plu ekzistas jam delonge en la t. n. civilizitaj popoloj.

monda trafiko, la senfadena telefonio k. s. artefaritaĵoj kreas iom post iom la objektivajn kondiĉojn, kiuj ebligas la naskiĝon de sennacieca animo. En la estontaj generacioj supozeble pli k pli malvolviĝos la teknika menso malprofite al la mistika aŭ religieca. En *Naciismo* mi akcentis, ke la ideoj k sentoj postvivas longe la kaŭzojn k objektivajn kondiĉojn, kiuj naskis ilin. Sed la homoj, kiuj konscias pri tio k volas fari pioniran laboron, devas jam nun senĉese penadi liberiĝi el tiuj ideoj, kiuj tenas nin spirite ligitaj al la pasinto. Iel ni devas obei la konsilon de la filozofo Niĉe : *penadi sin mem levadi super sian propran kapon.* Neniu aliiĝo, neniu progreso estus ebla, se pioniroj senĉese ne penadus en tian direkton.

Parolante pri edukado k kulturo en SAT, mi ĉiam pensis pri tiu pionira laboro. Per esperanto oni povas prave celi la kreon de sennacieca animo. Nia artefarita lingvo povas fariĝi tiom riĉa k delikata, ke neniu bedaŭros la morton de la nacilingvaj delikataĵoj. Kiu konscie k obstine celas al tio, tiu estas sennaciisto ; kiu male deziras konservi la naciajn apartaĵojn, tiu estas naciisto, eĉ se li ne deziras, ke lia nacio estu super ĉio.

(20-XI-1930.)



# SOCIPOLITIKO

---

## Publika letero de francia SAT-ano al lia dolara moŝto Kuliĝ (Coolidge)

Sinjoro Prezidanto Kuliĝ,

Antaŭ kelka tempo, skribis al vi la maljuna Klemanso (Clemenceau), la homo kiun oni nomis « La Tigro » pro lia atakemo parola. La kaduka ŝtatisto trovis ankoraŭ sufiĉe da energio por vipi belstile la rabemon de la financistaro, kies dungito vi estas. Li diris kun indigna tono — ĉu indigno sincera aŭ nur ŝajna, mi ne scias, sed almenaŭ konstatebla en lia letero — ke « Francio ne estas vendebla, eĉ al siaj amikoj. Sendependa ni ricevis ĝin ; sendependa ni forlasos ĝin... »

« Ni ĵetis en la abismon, daŭrigas la fama franca patrioto, ĉion : la sangon k la monon... Venu en niajn vilaĝojn por legi la senfinan liston el niaj mortintoj... ĉu tio estas konto de banko, la viva forto de tiu junularo buĉita... ? »

Tiaj akraj paroloj kredeble vekis ĉe via dolara moŝto, nur kompateman rideton por la malsaĝa kadukulo, kiu cinike konfesas, ke li konsentis k instigis dum kvar jaroj la buĉadon de la franca junularo — k tio por konservi la sendependecon de Francio.

Kaj jen hodiaŭ nia Ugolino[1]-Klemanso ekkonstatas, ke la « amikoj » minacas la *sendependecon* de Francio same kiel faris la « malamikoj » antaŭ 12 jaroj !

Kaj ne nur la fama patrioto-junularmanĝanto indignas pro la postuloj de viaj mastroj pri pago de militŝuldo, sed ĉiuj francaj politikuloj, eĉ laboristaj gvidantoj : Ni ne konsentu liveri « nian landon » al la usona imperiismo, laŭte protestas ĉe kunvenegoj plej popularaj oratoroj. « La usonanoj volas rabi nian tabak-industrion », skribis antaŭ kelkaj tagoj iu deputito en tre maldekstra ĵurnalo[2]...

Sinjoro prezidanto, permesu al mi diri, ke tiuj protestoj k babilaĉoj estas tre... naivaj, aŭ simple hipokritaj. Mi estas vere mirigita konstati, ke la voĉoj de laboristaj gvidantoj agordiĝas kun tiu de la sangomakulita « Tigro ».

Tial iom senĝene mi decidis skribi, por konigi al vi la opinion de simpla laboristo pri la demando, kiu tiom incitas la francajn diverspartiajn gvidantojn.

Mi ne estas kompetenta rilate ekonomiajn demandojn. Tamen mi scias, ke la stulto k krimeco de la eŭropaj ŝtatistoj okazigis, ke la milito ebligis al Usono akiri la duonon de la oro el la mondo ; ke via industrio nun produktas pli ol la duonon de kelkaj artikloj : 60,2 % de la krudfero ; 59,8 % de la ŝtalo ; 52,7 % de la kupro.

Nu, tiuj ciferoj estas por mi pli elokventaj ol

---

[1] *Ugolino*. Italia tirano, kiu vivis en la XIII-a jarcento. Enfermite de sia malamiko, la ĉefepiskopo Ubaldini, en turon kun siaj du filoj por ke ili tie malsatmortiĝu, Ugolino unue manĝis siajn du filojn k tiele povis vivi pli longe. Same la patrioj ĵetas en militon siajn filojn por daŭrigi sian ekzistadon. — Ni aldonas ĉi tiun klarigon ne en la intenco instrui la usonan prezidanton, sed kelkajn legantojn, kiuj eble ne scias detale la historion de Italio.

[2] Marselo Kaŝen (Cachin) en *La Homaro* (L'Humanité), la oficiala gazeto de l' Franca Kompartio. — *Kompil.*

ĉiuj sentimentaj k belvortaj paroladoj. Via imperiismo ŝajnas al mi nun la plej forta k kapabla trudi sian volon al la disaj, etaj imperiismoj ĉi tieaj. Estas evidente, ke la eŭropaj fabrikoj malkapablas konkurenci sukcese vian industrion. Ili provas tion fari, nur penante malaltigi nian salajron, plilongigi nian labordaŭron.

Bedaŭrinde la laboristaro eŭropa estas nur dise organizita, k sekve senforta por kontraŭstari la ekspluatemon de la ĉi tiea mastraro. Ne estas espereble, ke baldaŭ ni povos imiti niajn rusajn K-dojn. Do kion malpli malbonan ni povas nun deziri? Nur unu aferon: havi dungantojn, kiuj teknike kapablas mastrumi pli bone, pli science ol tiuj, kiuj nin nun ekspluatas. Racie ni povas nur deziri, ke la usonaj inĝenieroj k produkt-organizistoj venu ĉi tien, invadu Francion, Hispanion, la tutan Eŭropon k kreskigante la industrion tiele plirapidigu la historian procezon, kiu, laŭ la diroj de K. Marks, devas nepre, fatale konduki al starigo de socialisma reĝimo.

Bonvolu do, via dolara moŝto Kuliĝ, ne atenti la sentimentajn babilaĉojn de niaj diverspartiaj politikuloj. Kiel Klemanso mi diros: venu ĉi tien; venu ne por legi la liston de liaj viktimoj, sed por organizadi science, malrutineme, grandskale la produktadon.

Ni scias, ke la vivnivelo de la usonaj laboristoj estas pli alta ol la nia. Kial do ni timus? Se ni ne volas batali por konservi al Francio ĝian sendependecon, ĉar tio signifas permesi, ke nur la francaj mastroj nin ekspluatadu, ni almenaŭ estas pretaj bataladi kuraĝe por atingi, ke nia vivnivelo estu same alta kiel tiu de niaj usonaj K-doj. Kaj kiam ĉi lastaj decidos batali por forigi ĉian ekspluatecon, ni ankaŭ estos pretaj partopreni tian batalon. Ni nur ne konsentas morti pro iaj ajn patriaj interesoj.

La superregado de via juna imperiismo ŝajnas

al mi malpli malbona, mi ne diras pli bona, ol la eŭropaj inter si batalantaj, malfortaj imperiismoj. Tial mi petas, ke vi ne atentu la sensencajn ĝemadojn pri sendependeco nacia k similaj mistifikaĵoj.

Invadu Francion! la tutan Eŭropon, — nur ne tuŝu Sovetion...

Mi petas pardonon, ke eble mi faris leteron pli longan, ol tiu de lia tigra moŝto Klemanso. Sed vi ja komprenos, ke mi estas nur laboristo k sekve ne havas lian verko-kapablon por povi diri multon en malmulte da vortoj.

Dume, bonvolu akcepti, via dolara moŝto, mian sennaciulan saluton.

(9-IX-1926.)

## Ekrigardeto sur la historion de l'Unua de Majo

Tiu datreveno jam havas sufiĉe longan historion. En la jaro 1884, la Kongreso de la Federacio de la laboristaj unuiĝoj *(Trade Unions)*, okazinta en Ŝikago, decidis, ke la unuan de majo 1886 la laboristoj devos konsenti labori nur ok horojn. Dum la du antaŭaj jaroj estis farata tra tuta Usono vigla agitado por sukcesigi la decidon alprenitan.

DE LA HODIAŬA TAGO
NENIU LABORISTO DEVAS LABORI
PLI OL OK HOROJN
POTAGE
OK HOROJ DA LABORO!
OK HOROJ DA RIPOZO!
OK HOROJ DA EDUKADO!

Je la difinita dato okazas grandaj strikoj en diversaj gravaj industrioj. En kelkaj grandurboj

tuj sufiĉe da laboristoj ricevis kontentigon. Sume 125.000. Post unu monato, 200.000 sukcesis trudi al la mastraro la okhoran labordaŭron.

Ĝenerale la labordaŭro en la tuta Usono estis mallongigita. Ekzemple, la bakistoj, kiuj laboris 16 horojn, akiris la dekhoran labortagon.

Kompreneble la mastraro ne konsentis volonte al la postuloj de la laboristoj. Kun helpo de la ŝtato ĝi organizis fortan kontraŭstaron. Kelkloke laboristoj estis eĉ mortpafataj. Ekzemple, en Milvoke (Milwaukee) naŭ personoj estis fimortigataj de policistoj. Regis plej akra klasbatalo, kiel montras la jena alvoko, publikigita per germanlingva ĉiutaga gazeto, *Laborista Gazeto* (*Arbeiter Zeitung*), aperinta en Ŝikago :

« La klasbatalo komenciĝis. Hieraŭ oni mortpafis la laboristojn antaŭ la fabriko Mak Kormik. Ilia sango postulas venĝon ! Nedubinde la tigroj, kiuj regadas, avidas la sangon de la laboristoj. Sed la laboristoj ne estas ŝafoj. Al la blanka teroro, ili respondos per la ruĝa teroro. Prefere morton ol mizeron !

« Se denove oni mortpafas la laboristojn, ni respondos tiel, ke niaj mastroj pri tio longe memoros. Ni estas devigataj voki : Al la armiloj !

« Hieraŭ virinoj, infanoj de malriĉuloj priploris la morton de siaj edzoj k de siaj patroj mortpafitaj. Dum, en palacoj, riĉuloj trinkis pro la sano de la fimortigistoj.

« Plu ne ploru, vi kiuj suferas !

« Estu kuraĝaj, sklavoj ! Ribelu ! »

Tiu alvoko tipe montras, kia estis la spiritostato en la vicoj de la usonaj laboristoj.

Respondis 15.000 da ili. Sur la placo Hemakit (Haymarket), starante sur ĉaro, parolis la plej popularaj oratoroj el Ŝikago, interalie Ŝpis (Spies), Pas'ns (Parsons), Fild'n (Fielden). La kunvenego

estis tuj finiĝonta. Noktiĝis. Subite 200 policistoj ekatakis la popolamason. Sed antaŭ ol ili povis denove krimi, kiel la antaŭan tagon, bombo estis ĵetata en iliajn vicojn k dudeko da ili terenfalis. Aliaj policistoj alvenis k vera batalo okazis.

Tiu okazintaĵo liveris pretekston al la registaro por fari amasan arestadon. La tuta personaro de la *Laborista Gazeto*, kies ĉefredaktoro estis Aŭgusto Ŝpis, estis enkarcerigata. Fine la juĝistaro faris filertan elekton inter la arestitoj k nur ok el la ĉefaj propagandistoj ĉeestis antaŭ la tribunalo : A. Ŝpis, A. Pas'ns, A. Fiŝe (Fischer), S. Fild'n, G. Engel, M. Ŝvab (Schwab), O. Neeb k L. Ling.

Kvankam mankis ia ajn fakteca pruvo, tamen la verdikto kondamnis la akuzitojn. La 11-an de novembro 1887 Pas'ns, Ŝpis, Engel k Fiŝe estis pendigataj. La antaŭan tagon de la ekzekuto, Ling sin mem mortigis. La punoj de Fild'n k de Ŝvab estis ŝanĝataj en dumvivan enkarcerigon ; tiu de Neeb, en dekkvin jaran.

Kelkajn jarojn poste estis pruvate, ke la bombon ĵetis anarkisto, kiu ne estis arestata, kvankam la polico bone konis lian rifuĝejon. La policisto, kiu malkovris ĝin, ne sukcesis ricevi de siaj estroj la ordonon aresti la bombĵetinton. Se oni estus lin arestinta, la ok influhavaj propagandistoj, kies morton deziregis la timigita burĝaro, devus esti liberigataj. La firuzega plano de la polico sukcesis.

Tiel la Unua de Majo naskiĝis en sanga, furioza k senkompata klasbatalo.

En la postaj jaroj, en diversaj landoj la manifestacioj de la laboristoj okaze de la Unua de Majo ankaŭ malvolviĝis en klasbatala atmosfero k multloke la sango de la proletoj ruĝigis la teron.

Jam forpasis 41 jaroj de kiam la usonaj laboristoj donis al la Unua de Majo ĝian karakteron de lukto por la plibonigo de la laboristaj vivkondiĉoj. Tamen ne ankoraŭ ĉie en la mondo la okhora labortago estas aplikata. Sed ne povas esti dubo,

ke granda antaŭenpaŝo estas farita tiudirekten. Oni eĉ jam povas ekvidi la tempon, kiam la laboristaj organizoj devos postuli pli mallongan labordaŭron ol la okhoran. La senlaboreco ekzistanta en preskaŭ ĉiuj landoj, la senĉese perfektiĝanta tekniko, la raciigo en la produktado klare montras al la Laboristaro, ke ĝi devas bataladi por plimallongigi la labortempon.

☆ ☆

Por ni, SAT-anoj, la Unua de Majo devas havi specialan signifon. Kiel laboristoj ni ja devas partopreni la surstratajn manifestaciojn. Sed kiel SAT-anoj ni havas la taskon instrui al la laboristoj pri la simplaj jenaj veroj k faktoj :

1. Finfina liberiĝo de l' Proletaro povas okazi nur laŭ tutmonda skalo.

2. Sekve, la laboristoj devas forte unuiĝi super la landlimoj.

3. Sed forta, intima unuiĝo povas ekzisti nur se la unuiĝintoj povas senpere interkompreniĝi.

4. Unu el la unuaj, plej grandaj taskoj estas do la forigo de la lingvaj baroj.

5. Jam ekzistas proleta unuiĝo, kies anoj troviĝas en ĉiuj mondpartoj k kiuj inter si fordetruis la lingvajn barojn.

6. Tiu organizo nomiĝas SAT ; ĝi konsistas el proletoj el diversaj politikaj tendencoj, kiuj frate kunlaboras. La tuta Laboristaro imitu la bonan ekzemplon.

Tiujn punktojn ĉiu SAT-ano devas detale klarigi ĉe ĉiu bona okazo. Kaj la Unua de Majo, kiam laboristoj el la tuta mondo manifestacie konigas sian volon atingi kompletan liberiĝon, estas unu el la plej taŭgaj okazoj por konigi nian SAT-movadon.

Ĉiuj SAT-anoj forte konsciu, ke ili staras ĉe la fronto de la larĝaj vicoj da batalantoj por definitiva venko de la laboro super ĉia ajn ekspluatismo. La Unua de Majo estu por ni la tago dum kiu pli vigle ol iam ajn, kun streĉita volo, ni propagandu por la SAT-celoj, por la sennacieca k senklaseca socio tutmonda.

(30-IV-1927.)

## Oni petas volontulojn

Antaŭmilite Usono ŝuldis dolare al Eŭropo 5 miliardojn. Postmilite tiu ŝuldo aliiĝis en kreditoraĵon da 16 miliardoj. Dum la sama tempo la ĝenerala indico (kvociento) pri produktado pasis de 100 en la jaro 1913 al 151 en 1927. Konsekvence de tio, la ekonomiaj fluoj de Suda Ameriko pli k pli direktiĝas al Usono, dum antaŭe ili iris al Eŭropo.

Nuntempe 40 °/₀ da eksportaĵoj el la Latinaj Respublikoj estas absorbataj de Usono, k tiu lasta eksportas en Sud-Amerikon pli ol la Eŭropaj nacioj. Dekkvar el la dudek Sud-Amerikaj Respublikoj estas jam sub la estreco de la Usona kapitalo. Tio signifas, ke en la Nova Kontinento la dolaro venkis la sterlingan funton. Alivorte, la Usona imperiismo venkis la Britan sur tiu ekonomia batalkampo.

Dume la tuta eŭropa gazetaro, ĉu faŝista, ĉu komunista, ĉu socialista, ĉu anarkista, energie agitadas kontraŭ la Usonan imperiismon; ĝi flame k patose defendas la « sendependecon » de Nikaragvo k de aliaj ŝtatetoj.

Ĉu el tio oni konkludi devas, ke ĉiuj tiuj ĵurnaloj estas subaĉetitaj de la Brita imperiismo? Aŭ ĉu tiu indigno ĉe la gvidantoj de la publika opinio estas nur signo pri eknaskiĝo de eŭropa — internacia — patriotismo?

Ambaŭ hipotezoj kredeble estas pravaj. La kapitalistaj gazetistoj ja ne kutimas labori senpage, k la aliaj trompite kantas laŭ malsama ario la kanton verkitan de siaj bone pagataj kolegoj.

En 1914 ni jam povis sperti tiun tragedi-komedion. Temis tiutempe pri la germana, rusa, brita k. a. imperiismoj. Ni do jam havas sperton pri tio k povas facile antaŭvidi, ke ĉe la venonta milito inter Eŭropo k Ameriko la eknaskiĝanta eŭropa patriotismo estos elkreskinta k sekve konsistigos neelĉerpeblan fonton da heroismo.

Ni kompreneble ne volas dubi pri la sincero de niaj lertaj, talentaj, multe honorataj — mi ne diras honorindaj — k famaj gazetistoj. Mi nur tre humile donos al ili konsileton :

Iniciatu vi la starigon de armeo el volontuloj por helpi al Nikaragvo en gia « heroa » batalo kontraŭ Usono. Tiel via agitado estos multe pli efika. Kompreneble vi estu la unuaj volontuloj. *Sennaciulo* certe ne rifuzos publikigi la nomojn de la bravaj ĵurnalistoj, kiuj oferos sian vivon en tiu sankta batalo por la « sendependeco » de l' malgrandaj nacioj.

Ĉu ja ne estus katastrofo, se iu imperiista ŝtato sukcesus unuigi la tutan mondon ? Ĉu ne estus treege bedaŭrinde, se ne plu ekzistus landlimoj, se oni ne plu bezonus pasportojn k. a. similajn oportunaĵojn ?...

Aliparte estas timinde, ke tiam la proletoj ne plu lasus sin delogi por partopreni la tiom glordonajn naciajn batalojn ; estas ja tre kredeble, ke ili dediĉus sian tutan energion nur al la klasbatalo...

(8-III-1928.)

## La eksterleĝigo de l' milito

Ĉu mi ankaŭ kuraĝu paroli pri tutmonda politiko?

— Kial ne?

— Oni ja diras, ke por priparoli dece tian temon, necesas havi vastajn konojn.

— Sendube.

— Kaj mi posedas nur simplan saĝon!... Tamen mi risku. Eble mi diros sensencaĵojn. Tiaokaze mi nur faros kiel plej altgrade diplomitaj ekonomiistoj, verkistoj, generaloj k similuloj... Kelkan memoron mi ja havas. Ekzemple, mi ankoraŭ ne forgesis kiel, en 1914, plej titolitaj k famaj homoj argumentis pri la milito. Laŭ ili, pro ekonomiaj kialoj k politikaj motivoj, ĝi ne povus daŭri pli ol kvin aŭ ses monatojn. Tamen ĉiu scias, ke la patriota buĉado daŭris dum pli ol kvar jaroj!

Mi ankaŭ scias, ke plej ŝatataj k obeataj laboristaj gvidantoj ne malofte eraris en siaj antaŭdiroj pri baldaŭa forfalo de l' kapitalismo, pri proksime eksplodanta revolucio en Britio, Francio k aliaj kapitalistaj landoj. Kiuj dubis pri tio, tiuj estis eĉ kelkfoje konsiderataj kiel « kontraŭrevoluciuloj ».

Mi do risku liveri klarigon pri la nun tiom larĝe priparolata demando : la « eksterleĝigo de l' milito ».

Do s-ro Brian, ruza, senskrupula k renegata politikisto, proponis al Usono, ke ĝi konsentu kun Francio pri aranĝo, kiu malebligus militon inter ambaŭ ŝtatoj.

Kial tia propono? Tial ke Francio ne povas esperi iun tagon perforte kontraŭstari al la postuloj de l' Dolara lando; Francio ja devos iel ajn pagi sian ŝuldon al Usono. Sekve la ŝuldanto havas intereson je « paca » aranĝo. Francio volas nur konservi la liberon malebligi, ke iu ajn eŭropa ŝtato sin liberigu el la Versaja kontrakto...

« Nu, diris al si s-ro Kelog, tiu Brian estas ja lertulo; li havas bonan ideon. » Pripensante la aferon, la usona ministro baldaŭ ektrovis, ke la ideo estas plibonigebla. Kial do proponi tian eksterleĝigon nur al du ŝtatoj? « Mi submetu tian proponon al ĉiuj », decidis Kelog. « Kion povas pri tio timi Usono? Nenion. La apliko de la Briana ideo al tutmondo neniel povas domaĝi al ni. Ĉu Usono ja ne estas la plej riĉa nacio? Ĉu do ĝi ne posedas la plej perfektan industri-aparaton? Ni tute ne bezonas timi konkurencon. Per *fair play* (ĝusta traktado) ni konkeros la mondmerkaton.

« Kion ni nun deziras? Nur la rajton eksporti niajn varojn k oron en ĉiujn landojn. Ni sekve povas tute senriske proponi la eksterleĝigon de l' milito. Per nia tekniko, per nia oro ni havas la certon venki sur la ekonomia batalkampo.

« El tia propono ni eĉ tiros grandan moralan profiton; ni aspektos pli pacemaj ol Sovetio mem!...

« Kaj se oni ne akceptos nian proponon, ni nin turnos al nia popolo k diros: « Nu, vidu; por forigi la militon ni proponis al la tuta mondo rimedon; sed ĝin malakceptis la aliaj nacioj. Tio pruvas, ke Eŭropo sub instigo de Grand-Britio, volas atenci nian prosperon, malhelpi nin konkeri *pace* la mondmerkaton. Se minacas severa ekonomia krizo, se regas senlaboreco, se suferas la Laboristaro, kulpas en tio la eŭropaj ŝtatoj, kiuj ĵaluzas k intrigas kontraŭ nin. Ni sensukcese proponis pacon al la mondo. Malgraŭ nia granda pacemo, ni kontraŭvole estas devigataj prepari nian defendon, akceli la konstruadon de militŝipoj k de ĉiaj militiloj... » Tiel parolis al si s-ro Kelog.

La demando ja estas simpla. Ni povos post malmulte da jaroj konstati, ke en Usono oni konstruadas militilojn same grandskale, kiel nun aŭtomobilojn.

Brian estas ruzulo, sed Kelog estas seriozmiena ŝerculo: li proponas pacon, dum li bone scias, ke

tio estas nur plej bona taktiko por akceptigi de la Usona popolo larĝan programon de armado. — Kaj la idealistaj pacistoj, kiuj ĝojas pri la proponoj de la du famaj politikistoj, estas egaj naivuloj...

Oni paroladas pri paco, dum fakte milito preparîĝas. Ne morgaŭ, ne postmorgaŭ ĝi okazos; sed ne forpasos multe da jardekoj ĝis tondros kanonoj, eksplodos gasbomboj k martiriĝos denove la stulta homaro...

Tion malhelpi povus nur la Proletaro. Sufiĉus, ke ĝi organiziĝu mondskale, ke ĝi klaskonsciiĝu k seniĝu je trompa patriotisma ideologio. Se tiel ne okazos, milionope laboristoj estas jam kondamnitaj je « glora », « heroa », « patriota » mortaĉo en la venonta milito inter Eŭropo k Ameriko.

(26-IV-1928.)

## Pri la morto de araba SAT-ano

Kun kordoloro mi eksciis pri la morto de K-do Neĝam Mohamed. Tiu fervora junulo apenaŭ ekpaŝis sur la vojo al plena spirita liberiĝo, k jen li falis morttrafite...

Neĝam estis jam liberiĝinta el la malsaĝaj religiaj kutimoj arabaj. Ne povas esti dubo, ke li ankaŭ liberiĝus el la nacia sento k fariĝus vere plenkonscia sennaciisto.

— Sed tia li estis, eble protestos liaj amikoj el la grupo « Ĉiam antaŭen ! »...

— Ne, karaj K-doj. Neĝam estis nur araba patrioto, eble bona internaciisto, sed nenio pli. Vi mem konfesas tion dirante : « ... li sincere malamis Francion, kiu sklavigis liajn samrasanojn ». Konsekvenca sennaciulo malami ne povas iun ajn

landon ; li malamas nur la ekspluatadon, la maljuston, la fanatikon, la tradicion...

— Nu, ŝajnas, ke vi mem estas patrioto : vi ja defendas la francan imperiismon k konsentas la sklavigon de la Francoj super la Araboj ! Vi...

— Ne tiom ekscitiĝu. Aŭskultu k penu kompreni. Ĉu do la arabaj proletoj estis liberaj, antaŭ la alveno de la Francoj ? Tute ne. Ili estis sklavoj de siaj ŝeikoj (tribestroj), ili estis sklavoj de sia mahometana religio ; tiutempe inter ili ne estus eble eĉ paroli pri liberpensa, komunista propagando. Se tia stato daŭrus, neniam nia K-do Neĝam estus fariĝinta esperantisto, neniam estus veturinta al Göteborg k tie en SAT-anio traktata kiel frato k egalulo.

Mi, kiel Neĝam, estas nur franca ŝtatano, sed ne Franco. Mi ja naskiĝis en Normandio, kiu perdis sian sendependecon antaŭ pluraj jarcentoj. Sed mi sentas nenian emon por la nacia liberigo de la Normandoj el la « jugo » de Francio. Normanda aŭ franca patriota sento tute forestas ĉe mi. Tiagrade, ke dum la granda milito mi ne malofte eldiris al K-doj la penson, ke la venko de Germanio estus preferinda pro la pli alte evoluinta tekniko de tiu lando.

— Kial do vi ne volontiĝis en la armeon de Vilhelmo ?

— Tial ke mi ankaŭ ne povus fariĝi germana patrioto. Mi konstatis, ke germanaj k francaj patriotoj mortigas sin reciproke ; tion malhelpi mi ne povis k sekve el tiu okazo mi deziris, ke rezultu kiel eble malplej da malbono.

Mi konstatas, ke homoj volas konservi siajn nacian lingvon, naciajn kutimojn, nacian sendependecon k por tio estas ĉiam pretaj morti k mortigi. Por tiaj celoj konsekvenca sennaciisto ne povas vole oferi sian vivon. Li bedaŭras, ke la historia procezo ne okazas laŭ racia metodo. Tia metodo estus forlaso de ĉio nacieca, unuiĝo per la helpo de artefarita

lingvo de ĉiuj proletoj el la mondo por liberiĝo el la kapitalista jugo. Unuvorte la sola racia batalo estas la klasbatalo, ne la nacibatalo. Sed kompreneble mi ne volas malhelpi, ke iu ajn nacibatalu, se plaĉas al li. Kaj, se iu nacibatalanto sin nomas « sennaciulo », nu, por mi tio estas nur amuza...

Tro frue mortis nia K-do Neĝam por povi akiri plenan spiritliberiĝon, tial lia antaŭtempa morto estas tiom pli ĉagrena.

(4-IV-1929.)

## Denove pri la morto de araba SAT-ano

Mi ricevis jenan leteron : « Vi argumentis logike en via artikoleto pri la morto de nia K-do Neĝam Mohamed. Sed vi forgesis tre atentindan punkton. Niaj K-doj el la grupo « Ĉiam antaŭen ! » diris, ke la Araboj estas pli ekspluatataj ol la Eŭropanoj. Ĉu vi neas tiun fakton ? Kaj se ne, kial vi malatentas ĝin en via rezonado ? »

Mi ne neas la fakton k volonte ĝin priparoletos hodiaŭ. Kiel kutime, mi ne eldiros kaprompajn argumentojn. Mi simple rakontos al vi anekdoton.

Kiam mi venis el mia provinco Parizon k provis tie per mia metio akiri vivrimedojn, mi dungiĝis ĉe mastro, kiu okupis nur du metilernantojn. Li tuj ekvidis, ke mi estas malsperta provincano, kiu tute ne konas la kutimojn k labortarifojn de granda urbo. Li bonuzis la okazon por pagi al mi malaltan salajron k eĉ trudi, ke mi laboru, kiel en mia provinco, 12 horojn ĉiutage k plie 6 horojn dimanĉe matene. Tiam mi ne sciis pri ekzisto de sindikatoj, mi eĉ emis kredi, ke la mastro favoras

min, bonvolante doni al mi laboron. Kaj tiel dum kelkaj monatoj pasis mia vivo. Iun tagon, ĉe gastejo, mi renkontis aliajn sammetianojn, kiuj demandis min pri mia salajro ktp. Aŭdinte mian respondon, ili insultis min, malbenis k minacis bati en la vizaĝon, tial ke mi laboras por salajro pli malalta ol tiu difinita de la sindikato.

— Jen tiaj fiprovincanoj venas Parizon k per sia stulto k neorganiziteco ĝenas nian batalon kontraŭ la mastroj. For! for, malbenindaj kamparanaĉoj!...

Kvankam tia akcepto ŝajnis al mi iom kruda, mi penis klarigi, ke mi volonte sindikatiĝos k postulos al la mastro la sindikatan tarifon. Tiel okazis k finfine mi akiris la parizan civitanecon, se mi tiel povas diri.

Nu, ĉu estus preferinde, ke mi reiru en mian provincon k tie agitu por ĝia sendependiĝo?...

Ĝenerale la koloniaj laboristoj estas ja pli ekspluatataj ol la laboristoj el la metropolo. Tamen ne per batalo por nacia liberiĝo ili plibonigos sian sorton, sed per unuiĝo kun la sammetianoj el la tuta mondo por liberigi sin el sub la kapitalista ekspluatado. Unuvorte, por proleto la klasbatalo estas la sole racia k profitdona. Kaj se la laboristoj el la metropolo bone komprenos siajn proprajn interesojn, ili klopodos helpi siajn malsamrasajn K-dojn, instigante ilin organiziĝi k klaskonsciiĝi.

La ekspluatantoj tute ne atentas la naciecon de la ekspluatatoj, sed celas nur trovi laborforton por kiel eble malplej alta prezo. Kaj se ie proletoj ne estas postulemaj, sufiĉe bone organizitaj, tia stato reefikas malhelpe alien, kie laboristoj energie klasbatalas.

La tekniko unuecigas la mondon. Bedaŭrinde la spiritostato de la homoj tre malfruas rilate tiun procezon. Anstataŭ rigardi antaŭen, al la Novo, la homoj emas rigardi malantaŭen, al la malnovo. Ili restas apartiĝemaj, tradiciemaj, naciemaj. Laŭ

mi, ĉiu agado, kiu celas konservi la malnovan ideologian superstrukturon, estas simple reakcia...
Sed eble mi eraras, k se homoj anstataŭ klasbatali volas nepre nacibatali, nu, mi ne intencas kontraŭstari al tio. La nacibatalemuloj almenaŭ konsentu, ke mi ne partoprenu en tia kontraŭflua naĝado.

(18-IV-1929.)

## La Kamentubo

Eminentaj filozofoj asertas, ke regas ordo en la Naturo. Povas esti. Sed por tion konstati, ili sendube metis sur sian nazon okulvitrojn, kiuj tute mankas al mi. Por miaj okuloj fakte estas videbla ĉie ĉirkaŭe nur granda ĥaoso. En la kruda naturo ĉio rezultas de hazardo k de blindaj fortoj. Nur la homo kreas ordon en la mondo. Per lia genio k volo — jes volo — riveroj transpontiĝas, vojoj, domoj, ŝipoj, maŝinoj konstruiĝas por difinita celo. La naturo fariĝas la servanto de l' Homo. Kie oni konstatas ordon, tie la homa laboro, la tekniko, la arto triumfas...
La ordo estas artefaritaĵo.
Tiajn pensojn mi cerbumis iun tagon en la Silezia montaro, kie mi ripozis dum kelka tempo post nia IX-a Kongreso. Ĉie en tiu bela regiono montoj k valoj kuŝas senorde, sencele. Verdaj arbaretoj kvazaŭ kapvestas la montojn laŭ plej diversa maniero. Treege fantazias la Naturo...
El post verdaj abioj jen ĉi tie k tie aperas iu alta kamentubo. Ĝi certe malharmonias kun la medio; ĝi difektas la pejzaĝon, elĵetante nigran fumon en la bluan ĉielon. Poetoj k romantikaj turistoj certe tre malbenas la kamentubon.

Al mi ĝi ankaŭ aspektas malbele. Sed mia racio konsilis, ke mi aŭskultu la klarigojn de la kamentubo. Kaj ĝi parolis jene :

« Dank' al mi vi povis rapide k relative malkare veni ĉi tien por admiri la pejzaĝon : la fervojo, kiu kondukis vin, ja ne povus ekzisti sen mia helpo ; dank' al mi la kamparano tie en la valo, sidanta sur rikoltmaŝino, plenumas sen granda peno taskon, kiu postulis antaŭe ŝviton k egan laciĝon de eble dek laboristoj ; dank' al mi vi havas en la poŝo horloĝon, kiu ebligos al vi akuratan rendevuon kun tiu K-do, kiu promesis veni renkonte al vi el relative malproksima urbeto ; dank' al mi tiu via K-do posedas biciklon, per kiu li veturas al vi ; dank' al mi... »

Longe tiel parolis la kamentubo. Mi fine komprenis, ke eĉ dank' al ĝi esperanto povas ekzisti k SAT funkcii.

☆ ☆

La kamentubojn posedas la kapitalistoj. Tion ni ja ne devas forgesi. Pro tio la kamentubo povus ankaŭ rakonti, ke dank' al ĝi militmaŝinoj k plej kruelaj mortigiloj fabrikiĝas, homoj senlaboriĝas, mizeriĝas, mortiĝas. Sed tiuj homoj, dank' al la kamentubo, ankaŭ unuiĝas, klaskonsciiĝas k prepariĝas por kapti en siajn manojn la mastrumadon de la tuta produktado. Tiam la kamentuboj ne plu utilos por fari kriman laboron. Kiam regos la socialismo sur la tero, tiam forestos landlimoj k ĉia ekspluatado de la homo kontraŭ la homon. Tiam oni eĉ povas esperi, ke la kamentuboj ne plu difektos la pejzaĝojn. La homa genio estos trovinta la rimedon tiel trafe sklavigi la fortojn de la naturo, ke la maŝinoj funkcios sen fumo k eĉ sen bruo. Jam nun antaŭ miaj okuloj sur la fervojo kuras elektra trajno, kies lokomotivo estas senkamentuba...

Tre elokvente parolis al mi en arbareto el Silezio la kamentubo, kiu difektis la pejzaĝon. Ĝi instruis al mi, ke ĝia ekzisto nepre kondiĉas la starigon de l' socialismo en la mondo. Vane estus esperi, ke sen la scienco, sen la tekniko, sen la homa volo socialismo povas stariĝi k ordo regi en la mondo.

Kie mankas kamentuboj, tie ankaŭ mankas la objektivaj kondiĉoj por la starigo de l' socialismo.

(Hirŝberg, 18-VIII-1929.)

## Ĉu la Ligo de Nacioj konsistigas ion novan?

Dum ĉiuj registaroj konkuradas en militpreparoj, la popoloj vivas senzorge, lulite de la espero al daŭra paco, per la klopodoj de la *Ligo de Nacioj*. La tuteŭropa gazetaro (krom eble la faŝista k la komunista) provas teni sian legantaron en tiu iluzio.

Mi volonte konsentos, ke en Ĝenevo oni ne preparas konscie la militon. Por mia tezo tute ne domaĝas, ke la Brianoj, Benesoj, M'kdonaldoj k. a. famaj « pacistoj » deziras sincere malebligi la militon. Ne sufiĉas bonaj intencoj por atingi la celon. Ĉiuj plej famaj manifestacioj de la Ligo de Nacioj favore al la paco ne forigas la fakton, ke ĉiu nacio ĵaluze volas konservi sian sendependecon, sian suverenecon. Tio estas la kerno de l' problemo k kondiĉas la neeviteblan fiaskon de ĉiuj plej « sinceraj » aranĝoj porpacaj. Tial ke la nacia aŭ ŝtata suvereneco restas netuŝenda principo en la internaciaj rilatoj, tio signifas, ke en Ĝenevo temas nur pri tenado de ekvilibro inter diversaj antagonismaj fortoj. Tia ekvilibro sekve estas nur provizora. Ĝi povas daŭri dum 20, 30, 40 aŭ pli aŭ malpli da

jaroj, tamen ĝi neniel estas io definitiva. La fama filozofo Kant konsentas pri tio, ke la natura stato inter ŝtatoj estas la milita stato.

Sed la senĉesaj k bombastaj paroladoj k deklaroj porpacaj de famaj ŝtatistoj sukcesas tre bone krei iluzion en la popolamasoj.

Ĉi-lastaj, cetere, ne bone konas la historion; ili facile kredas, ke la Ligo de Nacioj estas io nova, ke finfine stariĝis institucio, kiu trudos pacon al la mondo. Estas do interese k utile montri, ke similaj organizoj jam ekzistis en la pasinto k ke ili ne sukcesis certigi la pacon.

En la antikvo, kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo, ekzistis en Grekio institucioj, kiuj tre similis la nunan Ligon de Nacioj. Funkciis arbitracio inter la civitoj. Tion montris klare burĝa verkisto, Viktor Berar (Bérard), en sia tezo: *De arbitrio inter liberas Graecorum civitates* (Pri arbitracio inter liberaj civitoj Grekaj). La *amfiksjonioj* (Ligoj de civitoj aŭ ŝtatoj kun politika k religia karaktero) k similaj institucioj havis tute la saman celon kiel la Ĝeneva. Tiuj ligoj sukcesis kelkokaze eviti militojn; sed, tial ke ĉiu civito (ŝtateto) konservis sian sendependecon k suverenecon, la paco restis ĉiam nur provizora.

Estiĝis diversaj provoj por unuigi la civitojn de Grekio. Ili ĉiuj restis sensukcesaj. Neniu civito konsentis rezigni sian suverenecon k kunfandiĝi en pli grandan unuiĝon. Kaj jen kio okazis: la Romanoj faris tiun unuiĝon perforte, konkerante ĉiujn malgrandajn ŝtatojn...

Estas tre interese noti la similon, ekzistantan inter la nuna situacio en Eŭropo, rilate al Usono unuaflanke, k tiu de Grekio, rilate al Romanio duaflanke. La tiutempa tekniko en Grekio disvastiĝis eksteren k la Romanoj plej bone scipovis ĝin alpreni k aplikadi. La samo okazis rilate Usonon. Tie enplantiĝis k nun plej sukcese aplikiĝas la tekniko naskita en Eŭropo. Usono nuntempe, kiel

Romanio en la antikvo, konsistigas la plej grandan potencon. Oni tute ne fantazias, prezentante al si jenan bildon : iun belan tagon, kiam Eŭropo, pro internaj (internaciaj) militoj, estos ankoraŭ pli ol nun malfortiĝinta, tiam Usono, imite al la Roma Imperio, trudos sian superregadon al ĉi tiu kontinento. La hipotezo ne estas malsaĝa, sed male tute racia.

Oni ne rebatu, ke la antikvaj civitoj ne estas komparindaj kun la nunaj nacioj. La ĉefa diferenco ekzistas nur rilate la amplekson. Esence la problemo estas la sama. La nuntempaj eŭropaj nacioj ne volas rezigni sian suverenecon, kvankam la Ekonomio postulas tion. La psikologio de l' popoloj malebligas tian rezignon. Ne vane la Lernejo, la Eklezio, la Gazetaro disvastigis naciismon, patriotismon. La nacianoj nuntempe estas en la sama spiritostato kiel antikvatempe estis la civitanoj. Cetere la diferencon pri amplekso larĝe kompensas niaj modernaj interkomunikiloj. La Grekoj k Romanoj ne konis vaporŝipojn, nek fervojojn, nek aviadilojn, senfadenan telegrafion k. s.

Estas ankaŭ notinde, ke Usono ne konsentis aliĝi al la Ligo de Nacioj. Ĝi ja plene konscias, ke en Ĝenevo oni celas ĉefe prizorgi eŭropajn interesojn k kontraŭstari al la usonaj. Neniuj plej elokventaj frazoj povas forigi tiun fakton.

La nuna Ligo de Nacioj ne konsistigas ion esence novan en la Historio. La militkaŭzoj restas la samaj kiel en la pasinta tempo. Oni simple trompas la popolon per senĉesaj paroladoj pri la paco.

Kaj stariĝas antaŭ ni la demando : kiel la proletaro el Eŭropo k Ameriko rilatu al la venonta milito inter la du kontinentoj ?

Por respondi konvene al tiu demando, necesus konsiderinde plilongigi ĉi tiun artikolon. Tion mi ne faru. Ial estas eĉ preferinde, ke aliuj respondu. Povus ja okazi, ke mi herezumus...

Sufiĉu do altiri la atenton de la legantoj al tiu grava problemo, lasante al ĉiu la zorgon trovi mem la ĝustan solvon. Mi aldiru tamen mian esperon, ke la SAT-anoj, kiuj lasis logi sin en la « Paneŭropan » (Tuteŭropan) movadon, ekkonscios pri sia erarpaŝo k retrovos la ĝustan vojon — la *klasan* unuiĝon de ĉiuj proletoj de l' Mondo. Ili ekkomprenos, ke la unuiĝo de la Eŭropaj ŝtatoj — se ĝi estus ebla — eĉ ne preparus la pacon, sed la militon kontraŭ Usono.

(22-XI-1929.)



# PACISMO

## Ĉagrene parolis Pacisto...

— Via penado por estigi, kreskigi ĉe la membroj de SAT sennaciecan spiritostaton estas, se ne aprobinda, almenaŭ allasebla. Ni, homaranoj, jam de longe diris pri neceso veki ĉe esperantistoj « fortikan senton de solidareco k disvolvi ĉe ili la komprenon k estimon por fremdaj popoloj ».

Sed kial vi parolas pri « klasbatalo », pri la « klasaj celoj de l' Proletaro » ? Ĉu ankaŭ la « burĝoj » ne estas homoj ? Vere, Zamenhof tre suferus, se li vidus, ke Esperantio fariĝas « malĝojiga bildo de la malsana, malama, malorda nuna mondo ». Li ja ĉiam revis pri esperanta rondo, kiu estu « eta modelo de pli bona homaro, kie pozitivaj valoroj jam anstataŭas negativajn fortojn k ebligas pacan kunlaboron. Ni ĉiam preferu tion, kio unuigas, ol tion, kio disigas... Nur esperanto disvastiĝu ĉiujare pli k pli ; k kiam la rondo ampleksos la tutmondon, tiam homaro regos ĉie... »

— Longe k elokvente parolis la pacisto. Li diris pri la grandkoreco de l' Majstro, pri lia senfina amo al ĉiuj gentoj k popoloj. Li emfazis pri la nobla celado de la esperantistoj ; pri sankta nia

afero ktp. Se mi bone memoras, li eĉ prikantis la bluan ĉielon, la bonodorajn florojn k ĉiujn ordinarajn temojn, per kiuj oratoroj kutimas vuali la vanton de siaj paroladoj.

Ĝue mi aŭskultis la belan voĉsonadon. Tute ne sentis mi la bezonon kontraŭdiri tiajn mielecajn parolojn. Mi lasis min luladi per ia dolĉa revo, estigata de la orbuŝa parolisto, k sentis min transportata en la nubojn de l' malrealo...

Kial do malaperis tiu agrabla sonĝo ?...

Reveninte sur la krudan teron, mi bedaŭrinde konstatas, ke la esperantistoj estas homoj kiel la aliaj. Ili agas en la socio laŭ sia funkcio : se ili estas mastroj, ili ekspluatas siajn dungatojn ; se ili estas policistoj, ili persekutas k mortigas ribelantojn ; se ili estas pastroj, ili predikas absurdan dogmon k tiel sklavigas spirite la laboristojn ; k se ili estas patriotoj, ili prikantas — eĉ en esperanto — la « karan patrion ».

Senreviĝinte k farinte tiun konstaton, mi ripetadis al mi la lastan frazon de la pacisto :

« *Nur esperanto disvastiĝu ĉiujare pli k pli; k kiam la rondo ampleksos la tutmondon, tiam homaro regos ĉie...* »

Mi pripensadis... Kaj komparante tiun aserton kun la realo, tiam tre klare mi ekvidis, kiom fantazie, iluziige, trompe parolis la pacisto. Mi plene konsciis, ke la « homaranoj » estas kvazaŭ pastroj de nova religio. Ili trompas la popolon per senenhavaj esperoj k celoj. Necesas ja kontraŭbatali daŭre ilian nebulan ideologion, kiu nur povas moligi la klaskonscion ĉe laboristoj. Estas nia devo montri, ke tiuj pacistoj estas *fakte*, se ne konscie, tre valoraj subtenantoj de l' nuna krima sociordo. Plie, celante la kunigon de burĝoj k proletoj en saman rondon, ili malhelpas la propagandon de esperanto en la organizoj, kie la klasbatalo estas unu el la bazaj principoj.

Kiam nia Majstro, de ĉiuj respektata k amata, predikis sian « homaranismon », tion fari li povis, ne aspektante tro ridinde. Sed nuntempe, kiam akriĝas ĉiutage pli k pli la batalo inter la klasoj ; kiam en kelkaj landoj efektiviĝas antaŭ niaj okuloj tio, kion en sia romano, « La Fera Kalkanumo », priskribis *Ĝak London :* la celscia, la metoda sklavigo de la laborista klaso, ĉu decas prediki kuniĝon de la sklavoj kun la sklavigantoj ? Ne, milfoje ne !... Tio estas perfido, preskaŭ krimo kontraŭ la Proletaron...

La pacistoj ne provu do per sofisma dialektiko starigi ian similon inter homaranismo k sennaciismo. La unua ismo estas nur sentimenta, senbaza aspiro ; dum la dua, radike ligita al la laborista movado, anticipas la epokon, kiam la proletara mondrevolucio estos faliginta la landlimojn. Por la homaranoj esperanto estas memcelo ; por la sennaciuloj ĝi estas *nur* necesa rimedo por atingi la definitivan unuecigon de la laboruloj tutmondaj.

Tial mi konsilas al la bonkoraj homaranoj, ke ili prediku sian kredon nur al burĝoj k riĉuloj. Ili konvinku ĉi lastajn pri neceso konsenti je la pravaj postuloj de la laboristaro. Ju pli malekspluatema estos la reganta klaso, des malpli la proletaro bezonos perforti, « klasbatali », por akiri sian ĝustan parton el la de ĝi kreitaj riĉaĵoj. Sed la pacistoj ĉesu narkoti la klaskonscion de la proletoj per vantaj paroloj.

(IV-1924.)

## Pri Pacismo

Al s-ro Eŭgeno Relgis,
Bukaresto.

Sinjoro,

Vi bonvolis honori min per sendo de la teksto de via enketo pri *Pacisma Internacio*. Kvankam mi ne estas pacisto, mi tamen volas respondi koncize al via enketo, tial ke ĝi estas sendube bonintenca.

Mi ne estas « pacisto », pro firma mia konvinko, ke ĉiuj organizoj, kiuj difinis al si kiel ĉefan taskon propagandi pripacajn ideojn inter la homoj, havas eraran deirpunkton, ĉar ili ne atakas la verajn kaŭzojn de l' militoj.

La kaŭzoj de l' militoj, laŭ skema maniero, estas duspecaj : 1) ekonomia kaŭzo ; 2) psikologia kaŭzo — k ĉi tiu lasta dependas de la unua ; ĝi estas nur, tiel diri, ties rebrilo.

Por malaperigi la unuan k plej gravan kaŭzon de la militoj, necesas ekonomie unuigi nian planedon. La inventistoj, la teknikistoj, la laboristoj — eĉ la financistoj k militistoj — ĉiutage laboras, konscie aŭ ne, al tiu unuigo. Edison, Branli, Lindberg, Cepelin ktp. estas unuigantoj k sekve *pacigantoj*, sed ne « pacistoj ».

Ne ekzistos paco, ne povas esti definitiva paco sur nia planedo antaŭ ol estos efektiviĝinta tiu ekonomia unuiĝo. Kaj la finrezulto de tiu procezo nepre kondukas al la malapero de la politikaj land-

limoj, al la neniiĝo de la nunaj nacioj k ŝtatoj kiel sendependaj unuoj.

La « pacismaj aspiroj », pri kiuj parolas la teksto de via enketo, la bonaj intencoj de la idealistoj estas senefikaj : la nacioj, la ŝtatoj, pro la fakto, ke ili reprezentas apartajn interesojn, kiuj estas antagonismaj kun aliaj samspecaj interesoj, ĉiam estos kaŭzoj de milito. La paco — provizora paco — inter tiuj antagonismoj povas esti nur rezulto de ekvilibro inter fortoj. Tuj kiam rompiĝis tiu ekvilibro profite al iu el tiuj antagonismoj, eksplodas milito por krei novan ekvilibron, same provizoran.

La psikologia kaŭzo, kvankam ĝi estas akcesora, ludas tamen kelkokaze konsiderindan rolon. Malgraŭ la ekonomia konkurado, kiu ekzistis inter Grand-Britio k Germanio, en 1914, ne estus eble forlogi la tutan Eŭropon en sangan frenezon, se la spiritoj ne estus antaŭe saturegataj per edukado specife nacieca, patriotisma, helpe de la Lernejo, de la Eklezio, de la Gazetaro. Ĉiu nacio, ĉiu patrio tre zorge inokulas la spiriton de siaj regatoj per ideologio taŭga por la pluigo de siaj apartaj interesoj. La amo al la nacia sendependeco estas la temo plej favorata de ĉiuj ŝtataj institucioj. Tia edukado kreas latente veran psikan malsanon primilitan. Tion oni povis konstati en akuta stato en 1914, kiam famaj internaciistoj k kontraŭmilitistoj volonte soldatiĝis por batali ĉu kontraŭ la germana imperiismo, ĉu kontraŭ la angla aŭ la rusa...

Iu « Pacisma Internacio », kiu havus tute klaran percepton pri la veraj kaŭzoj de militoj povus sendube multon fari por malfortigi la pusigon de l' patriotisma mikrobo, kiu kaŭzas la psikan malsanon primilitan.

Sed, miascie, ne ekzistas nuntempe « pacisma » organizo, kiu fias al la patrio k al la nacia sendependeco. La pacistoj, ĝenerale, estas bonaj pa-

triotoj, kiuj laŭdas sian nacian kulturon, adoras siajn naciajn kutimojn, sian lingvon, sian kuirarton...

Kaj, cetere, ĉu do nuntempe ne estas konstateble, ke anarkistoj, komunistoj, socialistoj, la kontraŭimperiistoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj koloroj k ĉiuj specaĉoj senĉese eldiras flamajn alvokojn al la batalo por la *sendependigo* de tiu aŭ alia « subpremata nacio » ?

La ideologio ĉiam malfruas je la faktoj. La scienco k la tekniko revoluciigas la mondon, faras ĝin de tago al tago pli malgranda, sed la homoj, eĉ tiuj, kiuj asertas k kredas esti revoluciuloj, daŭrigas esti gvidataj de ideologio, rezultanta de ekonomia stato malaperinta aŭ almenaŭ malaperanta.

— Nu, vi sendube demandos : « Kion vi mem faras por la paco ? Kion vi proponas fari ? »

— Kion mi faras por la paco ? Dio mia ! ne multon. Miaj rimedoj k kapabloj estas tre malgrandaj. Mi povas almenaŭ aserti, ke mi sukcesis krei al mi spiritostaton, kapablan sen tro da peno adaptiĝi al stato, kiu postulas la malaperon de la « naciaj kulturoj ». Kvankam mi estas Normando, mi sentas neniun bedaŭron pro la iom-post-ioma malapero de la dialekto, per kiu mi estis lule dormigata ; mi estas preta senbedaŭre vidi la francan lingvon same malaperi k fariĝi morta lingvo kiel la greka k la latina. Sen ia honto, mi konfesas, ke, jam de kelkaj jaroj, mia hejma lingvo ne plu estas la franca, sed artefarita lingvo, kreita de genia homo. Estas per esperanto, ke mi interparolas kun mia kunvivantino (kies gepatra lingvo estas la angla) k kun mia kunlaboranto (germandevena). Per tiu lingvo mi korespondas kun K-doj el pli ol 50 landoj ; en esperanto estas eldonata la semajna gazeto *Sennaciulo*, kiun mi gvidas, k nun per esperanto estas al mi plej facile k agrable esprimi miajn pensojn.

Esperanto estas ankaŭ la sola oficiala lingvo de la anoj de *Sennacieca Asocio Tutmonda* (1), kiu arigas nuntempe preskaŭ 10.000 membrojn, dissutitaj sur la tuta terglobo. Per esperanto mi havis eblon esprimi, pli bone ol en franca lingvo, tion mi emas kredi, miajn plej karajn pensojn en modestaj verkoj; ankaŭ per tiu juna, vigla, viva lingvo, plena je ankoraŭ nekonataj riĉoj, mi havis la nedireblan plezuron vesti la penson de Volter (2), tradukante *Kandid* (3).

Mi konfesas, ke tio estas malmulto por la Paco! Tia laboro ne estas brila k liveras nek gloron, nek famon, nek materian profiton. Sed malgraŭ tio mi restas firme konvinkita, ke tiu senfama k modesta tasko pli utilas por detrui la psikologian kaŭzon de militoj ol la pompaj paroladoj k kortuŝaj alvokoj por paco nerealigebla, tiom longe, kiom nia planedo ne estos ekonomie unuigita k kiam la spiritoj restos saturitaj je patriotismo k nacia sendependismo.

Restus por klarigi, kiel mi prezentas al mi laŭ konkreta maniero la procezon pri unueciĝo sur nia terglobo. Tio transirus la kadron de via enketo; mi do limigos min, dirante nur mian esperon : La laborista klaso unuiĝos super la landlimoj, paralele al la stariĝo de mondtrustoj; ĝi akiros konscion pri sia grandega forto k metos ĝin *ekskluzive* je la servo de siaj *klasaj* interesoj — interesoj, kiuj

---

(1) Necesas rimarkigi, ke SAT ne havas difinitan politikan programon k sekve, ke ĝiaj anoj ne estas devigataj aprobi la ideojn, kiujn mi eldiras ĉi tie : mi parolas nur je mia propra nomo. Mi aldonas, tamen, ke nia organizo, difininte al si, interalie, kulturan taskon, permesas al siaj organoj esprimi ĉiujn ideojn, kiuj sincere celas la emancipon de l' tutmonda proletaro.

(2) France : Voltaire.

(3) France : *Candide*.

havas absolute nenion komunan kun naciaj interesoj.

Mi rekomendas la batalon de la ekspluatata klaso kontraŭ la ekspluatantan klason. Tiu batalo havas iafoje perfortajn k sangajn aspektojn. Kaj pro tio mi ne povas esti « pacisto » (1)...

(X-1929.)

---

(1) Tiu letero jam aperis en franca, nederlanda k germana lingvoj, sed ĝi aperas unuafoje ĉi tie en esperanto. — *Kompil.*



# PRISKRIBOJ

## Ĉe la lando de la " Nigraĉemizuloj [1] "

### Romo

Kiu studis pli malpli la historion de l' romana popolo, tiu ne povas sen ia emocio paŝi sur la zigzagaj, mallarĝaj stratoj de l' t. n. sepmonta, Ĉiama Urbo. Trude oni memoras, ke tie, antaŭ du mil jaroj, vivis, interbatalis, krimis la famaj estroj de imperio, kiu etendiĝis de Nigra Maro ĝis Gibraltara Markolo, de Grandbritio ĝis Sahara Dezerto. Tie staris amase plej belstilaj konstruoj ĉiuspecaj : temploj, banejoj, triumfarkaĵoj, kolonegoj, cirkoj ktp., kies restaĵoj atestas ankoraŭ nuntempe pri la potencego, riĉego, belbrilegeco de formalaperinta civilizo.

En la « Foro Romano » (Romana Forumo) la triumfarkaĵoj de Septimjo Severo, tiu de Tito, multaj rompitaj kolonoj, difektaj statuoj k multe da aliaj ruinoj elokvente konvinkas, ke ĝis nun oni ne superis la artisman kulturon de la antikvaj Romanoj. Kia sento pri formharmonio ! kia juĝkapablo pri proporcioj !... Kaj mediteme oni pensas, ke tiun kulturon ili akiris ĉe siaj venkitoj, ĉe la

---

(1) Ĉi tio estas ekstrakto el sufiĉe longa raporto pri vojaĝo en Italio. — *Kompil.*

Grekoj — tiel la « venkitoj » venkis spirite siajn « venkintojn ». Kia pripensiga temo !...

Image oni restarigas tiujn konstruojn, k plenigas ilin per svarmanta popolamaso, entuziasma, bruema, paradema. Triumfintaj generaloj laŭre kronitaj, starantaj en ĉaro, veturas meze de varmegaj aklamoj ; tie en la giganta Koloseo centmilkapa rigardantaro freneze aplaŭdegas gladiatorojn...

Tie jam ekzistis klasbatalo inter patricioj (aristokratoj) k plebanoj (malnobeluloj) ; tie sklavoj, gvidate de Spartako, armite ribelis k provis liberiĝi ; tie plej diversaj regadformoj estis elprovataj : reĝeco, respubliko, diktatoreco, imperiestreco...

Kaj disiĝas la romana potenco... Alvenas barbaroj... Malaperas brilega civilizo.

Pasas jarcentoj da mallumeco ; dume kreskas nova potenco : la katolikismo, kiu siavice batalas por akiri la mondregadon. La idolana religio estas anstataŭita de la kristana : sur la ruiniĝintaj temploj elstariĝas vastaj bazilikoj. El la ruinoj kvazaŭ elsorbiĝas k reviviĝas la idolana spirito : la antikvan luksegon imperian imitas la papoj ; riĉegaĵoj amasiĝas en la Vatikanon. Konstruiĝas la malhumilega Sankta Petro, kiu kvazaŭ konkuras laŭ la grando kun la Koloseo. En tiu senkompare vasta baziliko ja povas okdek mil kreduloj respektege genufleksi antaŭ la papo.

La papregado !...

Oni preskaŭ kredus, ke ĉi tie la grundo estigadas ĉiaman revon pri tutmonda superregado. La papoj persiste celas fari el Romo la ĉefurbon de l' tutmondo, unuiĝonta sub la regadon de l' Kruco.

Kaj eble en la kapo de Musolini iafoje naskiĝas ankaŭ la penso pri ia vasta imperio. Almenaŭ iu faŝista ĉiutaga ĵurnalo, *L'Impero* (La Imperio), ne timas propagandi la ideon pri restarigo de l' antikva romana imperio ! ! Sed tiuj imperiistoj tro facile forgesas, ke en Italio mankas karbo k ferminaĵo, kio malebligas nuntempe, ke ilia revo efektiviĝu...

Apud luksegaj preĝejoj k palacoj staras laŭlonge de malpuraj stratetoj, malkomfortaj, malbelaspektaj domoj. Tie vivas popolamaso, kiu eble estas pli mizera ol tiu vivinta samloke antaŭ dudek jarcentoj. Ja, sub la regado de Aŭgusto la sklaveco estis preskaŭ tute malaperinta, k la popolo ĝuis sufiĉan bonstaton.

Ĉu do progreso estas nur vorto? Ĉu esence nenio ŝanĝiĝis?...

En la stratoj rapidas aŭtomobiloj, serpentumas tramvojoj. Mi pensas, ke nur unutaga veturado apartigas Romon de Parizo. La aeron konkeris aviadiloj; la penso k voĉo preskaŭ ne plu konas distancojn...

La antikvaj Romanoj kapablis fari plej gigantajn konstruojn, sed ili ne konis niajn modernajn veturilojn; ili estis sklavoj de la distanco. Rilate teknikon, nekontraŭdireble granda progreso okazis.

Pri la morala progreso oni ja povas dubi. La homo ne pliboniĝis. Nuntempe kiel antaŭ du mil jaroj la homoj malamas, perfidas, militas, ĉiel krimas; ekzistas sklavoj, la proletoj, k patricioj, la mastroj. Malestas justa sociordo...

Sed la tekniko malaperigas la distancojn; la grandindustrio laŭ tutmonda skalo prilaboras, samnormigas iun klason, la Proletaron, kiu ĉiutage k persiste provas, lernas unuiĝi super la landlimoj. Oni povas prave imagi, ke la ĉiama revo pri unuiĝo de ĉiuj popoloj fariĝos realaĵo. Ne per la konkeremo de iu Cezaro, sed per la ribela agado de l' proletara klaso. Ne reviviĝos la imperioj, sed falos la kapitalisma imperiismo. Regos fine justo sur la tero. Oni povas, oni *devas* esperi...

Tiele mi monologis irante al K-do B. kun kiu mi rendevuis por aŭdi ankoraŭfoje pri la « afero », kiel diras la Milanaj K-doj por ne elparoli la vorton faŝismo...

(VII-1924.)

## Leteroj el Turkio

Konstantinoplo, 9. septembro 1925.

**Kontrastoj.** — De tiom longe mi sopiris vidi la nepriskribeble belan Bosforon, la senkompare mirindan Oran Kornon! De tiom longe mi deziregis paŝi sur la lokoj famegaj ne nur pro ilia belo, sed ankaŭ pro la tieaj okazintaĵoj, pri kiuj rakontas la Legendo k la Historio...

Okazis ofte, ke la realaĵo malpli efikis sur min ol la bildo, kiun image mi vidis antaŭe. Ĉi tie ne trafis min tia disreviĝo. Konstantinoplo povas ja spitinviti ĉiun ajn verkiston, ke li priskribu ĝin fidele, ĉiun ajn pentriston, ke li bildigu ĝian veran figuron.

Mi ankoraŭ ne vidis ĉion vidindan, sed jam konvinkiĝis, ke ĉi tiu kosmopolita urbo estas bilde nekaptebla. Okcidentaĵoj k orientaĵoj interpuŝiĝas, intermiksiĝas k kreas ion nedifineblan. Grandaj stratoj, kiujn trakuras tramveturiloj k aŭtomobiloj, najbaras kun stratetaĉoj malglatege pavimitaj, nur piedireblaj k sur kiuj svarmas ĉifonvestitaj homoj. Altaj novaj domoj, belaj magazenoj najbaras kun kadukaj domaĉoj, kun mizeraj budoj. Per unu sola ekrigardo oni povas vidi la Mezepokon k la XX-an Jarcenton. En Stambul (1) ĉie superstaras imponaj moskeoj (2) kun pezaj kupoloj k elegantaj minaretoj. Ĉie kuŝas ruinoj, ruboj, malpuraĵoj. Ĉie ankaŭ novaj konstruoj.

Kontrastoj okulfrapas ĉe ĉiu paŝo.

---

(1) Stambul estas unu de la tri partoj, disigitaj per la Bosforo k la Ora Korno, el kiuj konsistas Konstantinoplo. La du aliaj partoj estas Pera-Galata k Skutari. — Ĉi lasta troviĝas sur la azia bordo.

(2) En la tuta urbo estas 700.

Ĉu ne estas mezepoka kutimo, ke por transiri la pontojn oni devas pagi unu piastron? Aŭtomobiloj tie haltas pro tiu pago. Sur la Nova Ponto 24 viroj deĵoras k postulas la trairan depagon. Ili staras sesope ĉe ĉiu angulo de l' ponto k baras la tutan larĝon de l' trotuaro. Nur la tramveturiloj ne estas haltigataj.

La popolamaso estas densa, diverskolore, diversaspekte vestita. Ĉie svarmas stratvendistoj k trudemaj almozpetantoj. Portistoj kun ŝarĝo, kapabla terenpremi malfortan azenon, marŝas pene, ŝvitante dum longa vojo k plenumas neplenumindan taskon. La homo estas ja ankoraŭ ŝarĝbesto — dum rapide preterpasas, kvazaŭ insulte, aŭtomobiloj, kiuj portas homojn. Grandare glitas surakve malpezaj, plaĉaj « kaikoj » (barketoj) movigataj de fortaj brakoj — dum vaporbarketoj rapide k facilmove preterpasas. Promenas belulinoj, obeantaj la lastajn ordonojn de la Pariza modo — dum preteriras vualitaj virinoj, kiuj obeas ankoraŭ la Mahometanan leĝon. Fezoj, turbanoj najbaras kun eŭropaj kapvestoj...

Kontrastoj, ĉie kontrastoj.

**Okcidento venkas.** — Sed urĝas veni ĉi tien por ĝui tiujn pentrindajn kontrastojn. Ŝajnas, ke la Turkoj nun forte penadas por demeti la pezan tradicion, por forigi siajn apartaĵojn. La nuna registaro energie agadas por ke foriĝu la rutino, por ke definitive ruiniĝu la arkaikaj kutimoj. La prezidanto de la Respubliko, Mustafa Kemal Paŝa, persiste provas disrompi la religian kirason, kiu premkatenas la popolon k malhelpas, ke ĝi akceptu k profitu la okcidentan kulturon. Tiucele li entreprenis grandskalan agitadon. Lastatempe, li profitis la datrevenon pri la batalo ĉe Bumlu-Punar, kie li akiris mondfamon k ĉe la turka gento grandegan popularon pro sia venko super la Grekoj, por alvoki la popolon, ke ĝi forlasu la malnovajn morojn, ke ĝi imitu la kulturitajn eŭropanojn.

Parolante en Ineboli, li forte akcentis pri neceso definitive forlasi la malnovan vestmanieron. Li diris : « La internacia tualeto de la civilizitaj popoloj perfekte konvenas por nia nacio... ni kapvestu nin per vesto kun viziero, t. e., por paroli pli klare, per ĉapelo... »

Kaj nun jam multaj Turkoj forlasis la fezon. La gazetoj sciigas, ke ĉe Angora, kiam revenos la Prezidanto, liaj akceptantoj estos kapvestitaj per ĉapelo. Eĉ decido de la ministraro igas deviga por la ŝtatoficistoj la uzon de ĉapelo.

Estas vera privesta revolucio !

Rilate la virinojn, Mustafa Kemal ankaŭ energie postulas la forlason de la malnovaj kutimoj :

« En iuj lokoj, li diris, mi ankoraŭ vidis virinojn, kiuj kaŝas sian vizaĝon per iu tolaĵo, aŭ per sia antaŭtuko, aŭ sin kaŝis kiam ilin preterpasis viro. Kia strangaĵo ! Ĉu indas tiuj sovaĝaj moroj por patrinoj, por filinoj de civilizita nacio ? Tia spektaklo estas ridinda k necesas senprokraste ĝin forigi... »

La amatoroj de pentrindaĵoj rapidu veni ĉi tien, se ili volas ĝui la bildon de la malnova Turkio. La okcidenta kulturo antaŭeniras grandpaŝe. Kredeble, post deko da jaroj Konstantinoplo ne plu havos la saman figuron, ne plu estos rekonebla.

Ĉu domaĝe ? Mi opinias, ke ne. La mirinda situo natura de la urbo restos ja la sama k nekompareble bela. Ne domaĝas se la stratoj estos pli glataj k malpli malbonodoraj ; ne domaĝas, se la hotelĉambroj estos sencimaj ; ne domaĝas se fezoj, turbanoj k aliaj malnovaĵoj estos videblaj nur en muzeoj...

La tradicio ĉiurilate estas ja malfacile mortigebla, sed ĝi tamen mortiĝos per la ripetataj batoj de la noviĝemuloj. Ĉie venkas la scienco, la tekniko. Kaj estas por ni, sennacianoj, ĝojige konstati, ke eĉ patriotisma, naciisma movado kiel tiu, kies Mustafa Kemal estas la ĉefrolulo, k kiu agitas la

turkan genton, tamen helpas la malvolviĝon de la internacia kulturo, la procezon de la malproksima, sed nepre okazonta sennaciiĝo de l' popoloj.

☆ ☆

Konstantinoplo, 11. septembro 1925.

**Monaĥejoj k maŭzoleoj estas fermitaj.** — En antaŭa letero mi aludis al la privesta revolucio, nun okazanta en Turkio. Se nur temus pri ŝanĝo en la vestmaniero, la fakto menciinda ne estus. Sed revolucio efektive okazas en la moroj. La jarcentara religia tradicio disrompiĝas. La nuna Registaro ne nur ne timas ataki la antikvan vestmanieron, sed ankaŭ la plej tipajn reprezentantojn de l' religio.

Per dekreto, datumita je la 2. septembro 1925, la ministraro decidis fermi la monaĥejojn k maŭzoleojn, kiujn de jarcentoj la popolo kutimas konsideri kiel sanktaĵojn. Mi faru kelkajn citojn el tiu historia dokumento :

> « 1. — Ĉiuj monaĥejoj troviĝantaj en Turkio... estu fermotaj... »
>
> « 2. — Ne plu ekzistu ia ajn « Kongregacio » en la Respubliko, nek ŝeikoj, nek dervIŝoj, nek aliaj adeptoj, havantaj religian karakteron... »
>
> « 4. — La konstruoj fermotaj estu eventuale transformotaj en lernejojn, se ili taŭgas por tio... »

Tiuj eltiroj sufiĉas por montri, ke la turkaj gvidantoj celas funde ekstermi la malnovegan tradicion religian. Oni tamen ne konkludu el tio, ke de nun ĉiuj di-reprezentantoj ne plu havas laŭleĝan ekziston. La nuna spiritostato ne ebligas pli pro-

fundan elradikigon. Restas ja la nemonaĥaj pastroj, kiuj diservas en la moskeoj.

**La dervîŝoj.** — Ekzistis diversspecaj : la turniĝantaj, la dancantaj, la kriegantaj k aliaj. Mi havis la bonŝancon alveni antaŭ ol la dekreto malpermesis la laŭleĝan ekziston de tiuj monaĥoj. Mi do povis proprokule vidi kiel ili kultas al sia dio. Kaj mi pensas, ke eble interesos la legantaron mallonga skizo pri tio, kion mi vidis. Mi nur kopiu el mia notlibro :

Vendrede 28. aŭgusto 1925.
Ĉe la turniĝantaj dervîŝoj.

La diservo okazas je la tria posttagmeze. Kaduka domo kun ligna eksteraĵo mizeraspekta. Ĉirkaŭ la korto en malgrandaj ĉambroj estas videblaj tra la vitraĵoj tomboj de monaĥoj. Oni povas eniri la diservejon, ne demetinte la ŝuojn, kiel faros la kreduloj. Sed la vizitantoj restas en la antaŭaĵo. Virinoj ankaŭ vizitas. La turniĝejo estas oklatera, eble sep paŝojn larĝa. En la malantaŭaĵo kaŭras maljuna dervîŝo blankbarba kun blanketaj turbano k sutano. Same kaŭras dekstre 12 dervîŝoj, maljunaj, mezaĝaj, junaj. Maldekstre kaŭras ankaŭ unu maljunulo k du knaboj. Ĉiuj estas kapvestitaj per alta vesto el griza felto konusforma, senranda. Ĉe la galerio estas kantistoj k muzikistoj. Ĉu vere ili kantas ? Strangaj bruoj, kvazaŭ miaŭado, lamentado. Ankaŭ stranga la muziko : mi havas la impreson, ke knaboj ludas, blovante inter la foliojn de fermita libro. Tamburetbruoj. Post kelka tempo, la dervîŝoj batas la plankon per la kapo, poste stariĝas. Ili komencas rondiradi envice. Kiam la unua alvenas antaŭ la blankete vestita dervîŝo (kredeble la estro), li duonturniĝas sur la kalkanoj tiele, ke li frontas la postiranton ; tiam ambaŭ riverencas. La unua faras denove duonturniĝon k daŭrigas rondiradi. Poste la dua faras kiel faris

la unua k ĉiuj sinsekve same riverencas duope antaŭ la estro. Tiele ili faras tri rondirojn. Poste ili daŭrigas rondiri, sed nur salutante k kisante laŭvice la manon de la estro. Fine ili komencas turbmaniere turniĝadi per la nudaj piedoj.

Komence ili kruce havas la brakojn sur la brusto, la manojn sur la ŝultroj. Iom post iom la manoj glitas k, kvazaŭ birdo etendanta siajn flugilojn, la brakoj etendiĝas. La dekstra manplato estas turnita al la plafono, la maldekstra al la planko. La pozicio de la brakoj iel pensigas pri aeroplana helico. La kapo kliniĝas. La turniĝado fariĝas pli k pli rapida; la larĝa vestaĵo ampleksiĝas k fariĝas ombrelforma. La turniĝado daŭras eble 10 minutojn. Paŭzo. Ĉiuj ŝvitas. Nu, ili rekomencas rondiradi k saluti la estron. Denova furioza turniĝado. La samo okazas tri fojojn. Kelkminuta predikado de unu derviŝo (kiu ne turniĝadis), k fine la estro (li ankaŭ ne turniĝadis) faras mallongan preĝon, kiun ĉiuj partoprenas.

Ne ĉiuj same rapide turniĝadis. Estis kelkaj maljunuloj, kiuj nur kvazaŭ skizis turniĝadon. Sed kelkiuj turniĝadis kiel veraj aŭtomatoj, kun fervoro, kiu certe najbaras frenezon.

Por la kredulo tiu kulto havas kompreneble sencon. Jen la klarigo, kiun oni donis al mi : en la universo ĉio turniĝadas, ekz. la Tero, la astroj ktp. Nu, se Alla konstruis la mondon laŭ tiu turniĝsistemo, tio signifas, ke li ŝatas la turniĝadon. Sekve, nenio pli povas plaĉi al dio ol la turniĝado...

Vere, tiu opinio ne estas pli malsaĝa ol similaj, kiujn havas la plej diversspecaj kreduloj. Vidante tiun spektaklon, mi nur bedaŭris, ke tiom da homa energio estas elspezata por senutila celo. Kaj eble la tuta malbono en la mondo devenas el tio, ke la homoj faras tro ofte senutilan, eĉ malutilan laboron...

En Skutari (parto de Konstantinoplo, kiu troviĝas sur la azia bordo), mi ankaŭ ĉeestis diservon

de kriegantaj derviŝoj. Mi ne priskribos ĝin. Tiu ĉi letero estas jam sufiĉe longa, k temas ne misuzi la paĝojn de nia gazeto. Mi nur diru, ke la kulto de tiuj derviŝoj estas ankoraŭ pli stranga, pli burleska ol tiu de la turniĝantoj. Ĝi baziĝas sur la jena paragrafeto de la *Korano* : « Kiuj ne kapablas lerni entute la Sanktan Libron, tiuj lernu nur la unuan paragrafeton : Je la nomo de Alla, pardonema k kompatema. Ĉu tio estas ankoraŭ tro ? nur la vorton Alla. Ĉu ankoraŭ tro ? nur la unuan silabon. »

Tial dum la tuta diservo oni aŭdas jenajn raŭkajn sonojn : *Alla hu !* aŭ simple *hu !* k tio daŭras eble du horojn kun kelkaj paŭzoj. Mi havis preskaŭ la impreson esti en bestmontrejo, kies gastoj malsatas...

Tiuj derviŝoj k aliaj ne plu havas laŭleĝan ekzistorajton en Turkio. Eble la turistoj bedaŭros tion. Sed ĉiuj saĝaj homoj povas nur aprobi la turkan registaron, kiu kuraĝis kontraŭstari al tiu religia fanatiko.



# POLEMIKO

---

## La unua devo...

La ĉeestintoj de l' IV-a SAT-kongreso eble ankoraŭ memoras pri ia strangaĵo, okazinta dum unu el la kunsidoj : la SAT-ano *** petis la permeson paroli franclingve por saluti je la nomo de sia instruista organizo.

La kongresestraro konsentis ! Tiel nia « SAT-ano » havis la eblon montri sian... franclingvan kapablon !...

Neniam mi povos forgesi la strangan senton, kiu tiam min atakis : naŭzo, ridemo, kolero, mokemo, indigno intermiksiĝe min incitis.

Du jaroj baldaŭ estos forpasintaj de tiu memorinda okazintaĵo, k jen denove mi spertis la saman senton, legante en la n-o 93 de *Sennaciulo* iun longegan artikolon « speciale » verkitan franclingve de tiu sama K-do. Li estas ja « speciala » SAT-ano ; li komplezas verki por nia gazeto, sed nur franclingve, k alia K-do devas esperantigi lian verkaĵon.

Antaŭ du jaroj, oni povus pensi, ke tiu « SAT-ano » estus pli saĝa, se li silentus. Sed oni ankaŭ povis indulgi la novan varbiton kun la espero, ke

post la kongreso li diligente lernos la lingvon k fariĝos inda sennaciulo.

Vana espero! Nia franclingvano pagis ja tre akurate la kotizon, enviciĝis inter la « aktivajn » anojn, sed ne ellernis la lingvon...

Ne kun la malica intenco hontigi K-don B... mi pribabilas tiun fakton, sed por elstarigi unu el la kaŭzoj, kiuj malhelpas la rapidan malvolviĝon de nia movado.

Kiam oni ja konstatas, ke klera homo, post du jaroj de SAT-aneco, ne kapablas uzi nian lingvon, oni do ne miru, se multaj lernantoj forlasas la kursojn post kelkaj lecionoj.

Kaj oni gratulu varmege la simplajn laboristojn, kiuj diligente k persiste, post laciga laboro, lernakiras sufiĉan esperanto-scion por paroli k skribi en nia lingvo.

Oni grave erarus, opiniante, ke tiu Brusela « SAT-ano » estas escepto. Ni bedaŭrinde povas konstati similajn faktojn en preskaŭ ĉiuj urboj.

Ni ne sukcesis sufiĉe penetrigi en la cerbon de niaj alpropaganditoj la fortan konvinkon, ke la unua nepra devo de ĉiu internaciisto estas ellernadi la internacian lingvon.

Kiuj forte konsciis pri tio, tiuj ne nur ellernis sed ĉiutage *uzadas* esperanton. Ili unue estis konsekvencaj internaciistoj k nun fariĝas pli k pli konsciaj sennaciuloj.

(29-VII-1926.)

## Kiu estis honorata?

Antaŭ nelonge K-doj el Sovetio sendis al mi leteron kun peto ĝin transsendi al H. Barbus (Barbusse). En tiu letero mi legis, ke la fama aŭtoro « unuigis la laboristajn esperantistojn el la tuta mondo. » Tiu informo cetere aperis en ruslingva gazeto, kies eltranĉaĵo akompanis la leteron.

Tiel estas skribita la Historio!...

La afero eble okazis iun nokton, kiam mi dormegis; aŭ iun tagon, dum kiu mi ne aĉetis la gazeton, en kiu aperis la informo. Pro tio kredeble mi ne estis informita pri la okazintaĵo!...

Mi nur scias, ke Barbus provis unuigi mondskale la revoluciemajn verkistojn — k plene fiaskis!... Estis ja antaŭ kelkaj jaroj sufiĉe ofte k detale raportite, eĉ en esperantaj gazetoj, pri la movado « Klaro ». Vane hodiaŭ oni serĉus vivsignon de tiu entrepreno...

Barbus eldiris tre flamajn k laŭdajn parolojn pri esperanto. Sed bedaŭrinde li ne lernis ĝin k neniam verkis eĉ malgrandan artikolon en la internacia lingvo. Nuntempe li estas direktoro de nove aperanta gazeto: *Mondo*. Kelkajn numerojn mi havis en manoj. Sed vane mi serĉis plej malgrandan noton pri la esperanta movado.

Ĉe tia konstato mi emas pensi, ke nia famulo iel similas la pastrojn, kiuj predikas amon, modeston k ĉiujn aliajn virtojn, sed kondutas mem malame, fierege, malfrate k multrilate — fie... Ĉu do la laŭdo al esperanto estis por li nur rimedo por akiri pli da famo, pli da popularo? Estas ĉagrene tion pensi. Sed homo, kiu patose parolas, ke la **unua** *devo de ĉiu internaciisto estas lerni la internacian lingvon,* k mem ne plenumas tiun devon, ne povas esti konsiderata kiel seriozulo k fidindulo.

La anoj de la multaj esperantistaj grupoj, kiuj elektis Barbus-on sia honora prezidanto, preĝu al la animo de Zamenhof, por ke li ne estu tro rigora k akceptu la pekulon en la Paradizon de Esperantio post lia morto...

H. Barbus estis ankaŭ la honora prezidanto de la 1-a SAT-kongreso. Tiutempe oni povis esperi, ke li lernos la lingvon. Tion li ne faris, k hodiaŭ oni rajtas pensi, ke la laboristaj esperantistoj honoris la famulon, sed ne la famulo ilian movadon.

(2-VIII-1928.)

## Preferu agojn ol belsonajn frazojn

— Ricevinte *Sennaciulo*'n, mi tuj serĉas la paĝon sur kiu troviĝas « Inter Ni ». Kaj mi demandas min : « Kiun hodiaŭ kritikas, mokas, pikas tiu nekontentigebla E. L. ? »

Verdire mi ne ĉiam konsentas kun vi ; mi eĉ emas pensi, ke intence vi donas ian paradoksan formon al viaj ĉi tieaj artikoletoj... Almenaŭ mi konfesas, ke aprobantoj k malaprobantoj estas instigataj al pripensado. Kaj pro tio oni multon povas pardoni al vi...

Sed, diable! kial vi kuraĝas kritiki eĉ famulojn kiel H. Barbus? Vi atentu!... Respektu idolojn. Aliel vi riskas malkontentigi k eĉ kolerigi ties adorantojn...

— Estas fakto, ke mia kritiko kontraŭ la fama aŭtoro de *La Fajro* venigis al mi kelkajn riproĉajn leterojn. K-doj prenis sur sin la zorgon pledi por la akuzito. La karaj « advokatoj » ne tiom ekscitiĝu! La famo de ilia idolo ja ne estas en danĝero pro mia artikoleto. Se tiel estus, Barbus mem kapablas sin defendi. Ni volonte publikigus lian pravigon. Eĉ se ĝi ne estus verkita en esperanto!...

Per mia kritiketo mi celis nur instigi la K-dojn, ke ili ĉiam prefere ŝatu agojn ol belsonajn frazojn. Agoj ja parolas pli elokvente ol vortoj. Simpla laŭdado al esperanto ne valoras, se la laŭdanto mem scipovas nur... laŭdi.

La sola valora argumento de la « defendantoj » de Barbus estas, ke la famulo ne havis tempon por lerni nian lingvon. Ĉu ili estas certaj pri tio? Ĉu do tiom informitece ili konas lian intiman vivon? Kiel K-do Izgur trovis tempon por lerni esperanton k poste per ĝi eĉ literaturi?

Sed ni supozu, ke la aserto ĝustas. Ĉu tio povus pravigi la fakton, ke en *Mondo*, la revuo, kiun gvidas Barbus, neniam ĝis nun aperis eĉ plej malgranda noto pri esperanto aŭ pri nia movado?

— Mi skribis al Barbus pri tio, k scias, ke aliaj K-doj ankaŭ skribis...

— Mi ĝojas, ke mia kritiketo instigis al tia skribado. Se iun belan tagon aperos en *Mondo* raporto pri la esperanta movado, nu, tiam eble mi pentos pro mia ne sufiĉa respekto al famuloj — k gardos tamen la konvinkon, ke la riproĉata « Inter Ni » ne estis senutila...

(11-X-1928.)

## La vojoj de dio estas nediveneblaj

Mi emas suspekti, ke la direktoro de *Espero Katolika*, pastro Rambu (Ramboux), estas ne tre ortodoksa kredulo. Lin certe ataketas danĝera herezemo.

Sur kio vi apogas vian suspektemon? eble demandos iu. Nu, tute simple, sur tio, ke senĉese pastro Rambu prezentas SAT-on k ties anojn kiel modelon al la legantoj de sia gazeto. En la lasta numero li eĉ dediĉas la fruntartikolon al laŭdado

de nia « satana » organizo k direktas siajn sagojn nur kontraŭ la katolikajn esperantistojn! Ĉu tio estas deca konduto ĉe pastro? Ĉu ne estas klare, ke la legado de *Sennaciulo* k pli speciale de ĝia « Liberpensula Paĝo » infektis lin senkonscie per malortodoksa veneno? La Maliculo (la Diablo) estas ja tre ruza, li scipovas tiel lerte insidi la kredulojn, ke ne malofte ili falas en liajn kaptilojn...

Estas ja skandala afero, kiam pastro ne trovas pli trafan argumenton por vigligi la fervoron de siaj paroĥanoj ol montri kiel plej imitindajn homojn tiujn, kiuj kredas nek dion, nek diablon k malkaŝe kontraŭpropagandas la « Sanktan Eklezion ».

Sendube la dia instruo k la religiaj kutimoj forte narkotas la cerbon de la kreduloj. Tamen estas dube, ĉu neniu vekiĝos ĉe la konstato, ke pastro proponas al ili « satanojn », kiel plej imitindajn homojn!...

Sed eble mi eraras: la celoj, la vojoj de dio estas tiom nediveneblaj! Povas esti, ke la « Eternulo », sen nia scio, subtenas nuntempe SAT-on, laŭ eŭtrapelia maniero, nur por hontigi la esperantistajn katolikojn, kiuj ne sufiĉe abonas al *Espero Katolika*...

Ni sekve estu atentaj k ne lasu nin superruzi per la « dianoj »; ni estu indaj « satanoj », senlace laborantaj por detrui la kapitalistan inferon, kiun kreis k defendas la dio de la katolikoj k tiu de similaj kreduloj. Dio estas ja rezulto de la nescio, de la mizero k kredemo — k pastro Rambu estas eble iom herezema, sed certe tre ruza homo, kiu uzas *ĉiajn* rimedojn — eĉ satanajn — por la gloro de sia sankta entrepreno.

*Ab uno disce omnes* (1).

(21-XI-1929.)

---

(1) Laŭ unu vi konas ĉiujn.

## Ne ĉiu kapablas herezumi

Jena letero trafis en miajn manojn :

« Estimata K-do Eŭtrapel,

« Mi ne scias, kio estas eŭtrapelio k kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo Eŭtrapel. Mi ja vane serĉis tra la tuta Jarlibro, k tian SAT-anon ne trovis. Eble la eŭtrapelio estas ia speciala ironio, al kiu oni devas kutimiĝi por kompreni ĝuste viajn dirojn. Nu, ne gravas. Almenaŭ mi parolu al vi tute serioze k provu konvinki vin, ke pastro Rambu estas ĝisoste konvinkita katoliko.

« Kial vi povas dubi pri tio? Devus esti al vi klara, ke ĉiu ajn Rambu-ulo povas fariĝi nur katoliko, se li edukiĝas en katolika lernejo, aŭ protestanto, se tio okazas en protestanta lernejo, islamano, en islama, budaisto, en budaisma — marksano, en marksana ktp. Maloftaj ja estas la Volter-oj k Renan-oj, kiuj kapablas memstare pensi k liberiĝi el la encerbigitaj dogmoj.

« Ĉe mi forestas ĉia dubo, ke la direktoro de *Espero Katolika* fakte k sincere kredas, ke la Eklezio, al kiu la hazardo faris, ke li apartenu, estas dia institucio; ke la papo estas neeraropova, kiam temas pri dogmaj aferoj k sekve, ke vi, kompatinda Eŭtrapel, dronas en senfunda abismo el eraroj.

« Mi eĉ ne mirus ĉe la aŭdo, ke pastro Rambu preĝas kelkfoje por la savo de via animo — kredeble kun la espero, ke post via konvertiĝo vi fervore kunlaboros al *Espero Katolika*.

« Kredu al mi : pastro Rambu neniel estas atakita de duboj pri sia dia misio sur la tero; ne-

vundeble li staras antaŭ viaj sagoj k vi vane provus atingi, ke li faru plej malgrandan penon por ĝuste kompreni viajn « satanajn » ŝercojn...

« *Beati qui non viderunt et firmiter crediderunt* (1). »

Laŭvorte kopiita.

(28-XI-1929.)

---

## Eltomba parolo de Marks

Ne malofte verkistoj prenas kiel temon, montri, ke se Jesuo Kristo revenus surteren, li tute ne rekonus la papon kiel sian disĉiplon k ĉefreprezentanton. Ankaŭ la grandegan plimulton el la pastroj li ne agnoskus kiel kristanojn. Li trovus eble kelkajn laŭspirite disĉiplojn inter simplanimaj proletoj, kiuj neniam vizitas preĝejon, sed kondutas bonkore, paceme k solidareme al siaj samsortanoj. Tiajn virtojn oni trovas ne nur ĉe homoj, sed ankaŭ ĉe bestoj el kelkaj specoj. Ili do ne rezultas de katehizado k lernado el dikaj libroj bibliecaj, sed de natura sento k neceso trudita de la vivo mem.

Oni ja facile povas prezenti al si iun Jesuon, kiu denove per forta mano svingus vipon por peli el la temploj la parazitajn pastrojn k bibliparkerantojn. Estus bela spektaklo, kiun ĝoje rigardus liberpensuloj.

Image k ĝue vidante tiun spektaklon, subite aperis antaŭ mi iu alia k preskaŭ simila. Mi vidis K. Marks, elsaltinte el sia tombo, kiu batis sur la

---

(1) Feliĉaj kiuj ne vidis k tamen firme kredis.

postaĵon al aro da t. n. « marksistoj », pli malpli freŝe bakitaj, k kiuj volis ekskomuniki je lia nomo.

« Ha, bubaĉoj, li diris, ĉu tiel vi komprenas mian instruon? Kial vi provas fari el ĝi dogmon? Ĉu do vi nur kapablas papage ripeti, kion mi diris? Estas vera honto, ke vi provas fari el miaj verkoj novan biblion. Vi tute ne estas miaj disĉiploj k mi ne toleros, ke vi pastrumu kun la *Komunista Manifesto* en la mano k diru, ke ĉi tiu aŭ tiu ne estas « marksisto ».

« Silentu!... ne ridindigu vin k min per viaj aplombaj asertoj, ke nur vi predikas marksiste. Neniam mi celis starigi novan kvazaŭan religion k ĉefe kun tiaj pastroj, kiaj vi estas. Lernu unue pensi per via propra cerbo. Kaj se okazos, ke studante la *nunan* socion, vi alvenus al konkludoj eble ne tute samaj kiel la miaj, kiujn mi faris antaŭ multe da jaroj, tiam mi eble konsentos, ke vi nomu vin « marksistoj ». Mi lasis al vi ne dogmon, sed nur esplormetodon, dialektikan ilon, kiujn vi ne sukcesis lerni k uzi trafe k ĝuste.

« Mi eĉ volas fari publikan konfeson : pento eniris mian konscion ĉe la memoro, ke mi mokis al Prudon pro tio, ke li interesiĝetis pri lingvo internacia. Estas vere, ke tiu aŭtoro ne havis specialan aŭtoritaton por pritrakti la demandon. Almenaŭ pri ĝi li okupiĝetis, dum mi nur scipovis moki... Konsilante al la laboristoj el ĉiuj landoj, ke ili unuiĝu, mi malatentis, ke por tio necesas unue, ke ili interkompreniĝu. Tia malatento estas grava manko, estas ia peko, pro kio mi hodiaŭ pentas.

« Por mia senkulpigo mi ja povas diri, ke la verkon de Zamenhof mi ne konis, kiam, antaŭ 83 jaroj, estis publikigata la *Komunista Manifesto*. Sed hodiaŭ miaj plej aŭtoritataj disĉiploj ankaŭ ignoras la lingvan problemon. Tamen esperanto vivas k estas uzata de relative multaj proletoj. Kio estas pardonebla al mi, tio fariĝas neforigebla morta peko por la nuntempaj « marks-

istoj », kiuj ne lernas k ne utiligas la artefaritan tutmondan lingvon. Se mi povus mem proprokule vidi, ke proletoj vigle, pasie diskutas inter si dum kongresoj per artefarita lingvo, mi certe atentus tiun gravan fakton k kredeble prikonsiderus diversajn problemojn de iom alia vidpunkto ol mi faris... »

Tiel parolis K. Marks. Lia eltomba voĉo forte sonis ĉe miaj oreloj. Mi ĝojis, kiam sarkasme li mokis tiujn homojn, kiuj scipovas nur citi el liaj verkoj, sed ne kapablas el ili ĉerpi ties riĉhavan nutran medolon — k tamen ne hontas aljuĝi aŭ rifuzi ateston pri « marksismo ».

(30-X-1930.)



# PENSOJ

I

La inteligento konsistas el tio, ke per juĝkapablo k rezonado homoj eltrovas solvojn pri problemoj, kiujn starigas la vivo.

La besto neniam *faras* ion, ĝi nur imite ĉiam *refaras*, tial ke ĝia *instinkto* liveras al ĝi la solvojn trovitajn de la speco.

Per sia inteligento homoj inventas, same kiel, per la kutimo, kiu estas ia persona instinkto, akirita per la praktikado, ili reproduktas tion, kion ili mem inventis aŭ kion aliu instruis al ili.

II

Oni sekve povas diri, ke ju pli homo ne submetiĝas al la kutimo, des pli inteligenta li estas. Kaj se oni observas la homojn, oni konstatas, ke inter ili troviĝas malmulte da inteligentuloj : preskaŭ ĉiuj ja estas kutimuloj, rutinuloj, tradiciuloj.

III

Oni tamen grave erarus, konkludante el tio, ke sufiĉus ne obei ian ajn kutimon por agi inteligente.

Kiu, post persona analizado, kritikado, alvenas al la konkludo, ke iu kutimo estas en si mem bona, obeinda, tiu ne agus saĝe, inteligente, se li malatentus ĝin nur pro tio, ke ĝi estas kutimo.

IV

Aliparte, estas iarilate preferinde, ke homo akiru per propra cerbumado eraran opinion ol alpreni ĝustan ideon, kiun li tutfunde ne komprenas.

V

Diri : « Mi ne scias, mi ne komprenas », tio postulas sufiĉe da kuraĝo...

VI

Oni nomas vero aserton pri kiu ekzistas *spirita konverĝo*, t. e. interkonsento de ĉiuj spiritoj. Unu el tiaj veroj estas, ke la homaro alcelas unuecon, aŭ — parolante pli precize, pli marksisme — estas al unueco puŝata de l' malvolviĝo de l' produktofortoj. Malkonsento ekzistas nur pri la vojo irenda, pri la rimedoj uzendaj por akceli tiun unuecon. Kiaj ajn estas la vojoj irotaj, la rimedoj uzotaj, estus tre malsaĝe ignori la grandan unuigan forton, kiun konsistigas artefarita lingvo.

VII

En la priklasa elementa kono, genie klarigita de K. Marks, kuŝas vero pli profunda, pli esenca ol opinias eĉ Marks-anoj. *Latente* ekzistas klaso el personoj, kiuj volas konservi la privilegion, kiun donas al ili la scipoveco de multaj lingvoj, por tiel havi pli da ŝancoj akiri gvidpostenojn en la laboristaj organizoj. Tiuj poliglotoj nature estas, pli malpli senkonscie, kontraŭuloj al esperanto.

VIII

La spirita kontaktiĝo inter la diverslandaj proletoj fakte okazas nur *pere de* poliglotaj intelektuloj. Tial la agado de SAT, celanta kunigi, intimigi *senpere* la laborulojn tutmondajn, estas *esence* revolucia.

IX

Ŝafaro, kiu blekante atendas, ke la paŝtisto konduku ĝin, ĉu al paŝtejo, ĉu al buĉejo, ne reprezentas forton. Oni ne forgesu la grandan primilitan lecionon de 1914 : la grandaj, multanaraj organizoj el internaciistoj agis tute same kiel la plej puraj patriotoj.

X

Ŝipestro sin orientas laŭ la direkto montrata de sia kompaso. Sed sur la ideala linio, se montriĝas rifo, la estro ĉesas direkti la ŝipon laŭ la rekta vojo. La sennaciismo, samkiel la socialismo, estas ia anticipo en estonton. Hodiaŭ, kiuj volus ĉiurilate konformigi siajn agojn al tiuj ismoj montrus nur, ke ili estas kredemuloj k similus ŝipestron, kiu malatentas rifon.

XI

Prediki sennaciismon al neesperantistoj estus same ridinde k maltrafe kiel instrui beletristikon al analfabeto.

XII

La internaciismo estas la hodiaŭa vero ; la sennaciismo la morgaŭa.

XIII

Nur senkuraĝulo, duonviro, kastrito timas akcepti ĉiujn konsekvencojn de la ideoj, kiujn li propagandas.

XIV

Morti pro iu ideo estas pravigeble nur per la konvinko, ke la morto *viviĝas* la ideon. Aliel la martiriĝo estas sensenca mistikaĵo.

XV

La eduka SAT-laboro estas antaŭ- k postrevolucia, ne dumrevolucia.

XVI

Al kuracisto, advokato, profesoro, k. s. oni pagas *honorarion* ; al laboristo *salajron*. Tiu simpla kvalifika diferenco montras klare kiom da servuteco entenas la vorto laboristo.

XVII

Labor*ist*o sin gloranta pri sia *isteco* similas sklavon, kiu sin glorus pri sia sklaveco.

XVIII

Ne plu devas ekzisti labor*ist*oj, sed nur laborantoj — laboruloj.

XIX

La emo al uzado de vortaĉoj estas ia dandismo ĉe laboristoj.

XX

Por ricevi instruon el la legado de gazetoj, oni devus legi nur malnovajn. Se dekjare malnova artikolo estas ankoraŭ... aktuala k interesa, aŭ se la « profetaĵo » de la aŭtoro realiĝis, la artikolo certe estas leginda.

Malmulte da tiaj artikoloj troviĝas en la ĵurnaloj, precipe en la ĉiutagaj. Tial oni plej ofte perdas tempon en la legado de gazet-artikoloj.

XXI

Iel gazetisto devas flati al la deziroj de la legantoj. Kiu ne flatas, sed diras nur malagrablajn verojn, tiu riskas neniam akiri popularon.

XXII

Mi kompatas redaktoron, kiam li devas enmeti artikolojn pli bonajn ol la siaj...

XXIII

Iu laŭdis mian artikolon, k ĉagrene mi pensis : « Kredeble mi diris en ĝi banalaĵojn. »

XXIV

Se por refuti vidpunkton *klare* eldiritan en 50 linioj, kontraŭulo bezonas skribi 100-linian artikolon, ne povas esti dubo, ke la « refuto » refutas nenion.

Sed por refuti *malklare* eldiritan opinion, oni kelkfoje bezonus skribi multajn paĝojn. Tiaokaze estas preferinde tute silenti.

XXV

« Mi petas, ke vi ne prokrastu la aperon de mia artikolo », insistas ĉi tiu — kiu ne antaŭvidas la oscedon de la legonto.

XXVI

Bona verkisto penas por eviti penon al la leganto — k plie ne forgesas, ke la unua troviĝas en la redaktejo...

XXVII

Se ideoj estas fortaj, ĝuste k korekte esprimitaj, tiaokaze la leganto penadu por kompreni. Verkisto ne povas konsenti kastradon al sia penso.

XXVIII

Kiu atentigas siajn kunhomojn pri neceso multon lerni, multon sperti, pri neceso akiri organiz- k mastrumkapablon ; kiu parolas pri malfaciloj, pri neceso de oferado k daŭra batalado ; kiu parolas, ke revolucio ne estas sportafero, tiu riskas neniam ricevi aplaŭdojn.

XXIX

Por akiri popularon, ne estas pli trafa maniero ol diri plaĉajn banalaĵojn aŭ profeti baldaŭan venon de paradiza stato sur la teron.

XXX

La pastroj tiurilate estas la plej lertaj homoj : ili ja promesas al la kreduloj nur postmortan eniron en la paradizo.

XXXI

Sur la soci-politika kampo grandaj homoj estas ordinare persekutataj. Sed oni erarus, opiniante, ke ĉiuj persekutatoj estas grandaj homoj.

XXXII

Estas danĝere tro ofte pravi.



# ENHAVO

Paĝoj

Antaŭparolo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5

MONDLINGVO

Nia pozicio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 13
Tri semajnojn en Rusio . . . . . . . . . . . . . . 16
Ĉe la sidejo de Komintern.
Vivantigi Esperanton . . . . . . . . . . . . . . . . 20
Signo pri maturiĝo de klaso . . . . . . . . . . . . 22
Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo . . . 23
De la deziro al la efektiviĝo... . . . . . . . . . . . 24
For la idemon! . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 27
Malgranda kaŭzo, granda efiko . . . . . . . . . . . 29
Kiuj estas la saĝaj ? . . . . . . . . . . . . . . . . 30
Pri la Biblio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 31
Se Lenin estus esperantisto . . . . . . . . . . . . 33
Pri stilo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 35
Ĉu kreo aŭ nur iniciato ? . . . . . . . . . . . . . 37

ORGANIZADO

« Liberiga Stelo » al la Verdruĝuloj . . . . . . . . . 41
Celo k rimedoj. — Nia pozicio. — Nia tasko. — Samlingveco. — Unueco-Diverso. — Praktikeco. — Provizoreco de la Statutoj.
Ĉu internacia aŭ sennacieca organiziĝo ? . . . . . . . 47
Je la lumo de la sperto . . . . . . . . . . . . . . . 48
Publika letero al Romen Rolan . . . . . . . . . . . 52
Neŭtralismo — Neŭtraluloj. . . . . . . . . . . . . . 56
« Ho malfidemulo !... » . . . . . . . . . . . . . . . 59
Rutinemo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 64
Ĉu unue SAT-anoj ? . . . . . . . . . . . . . . . . 66

Paĝoj
La signifo de niaj Kongresoj. . . . . . . . . . . . . 67
Superpartieco . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 69
Vivu la neŭtralismo!. . . . . . . . . . . . . . . . 73

EDUKADO

Nia ĉefa tasko. . . . . . . . . . . . . . . . . . . 75
Ĉu ni obeu tradicion aŭ racion? . . . . . . . . . . . 78
Kio estas burĝo? . . . . . . . . . . . . . . . . . 80
Fonto de ideoj. . . . . . . . . . . . . . . . . . . 81
Subjektivaj kaŭzoj de la sukceso de SAT . . . . . . . 83
Laborismo. — Praktikismo. — Liberismo. — Idealismo.
Ateistoj estas malmultaj . . . . . . . . . . . . . . 85
Ni ne diigu la racion . . . . . . . . . . . . . . . 87
For, pastreca maniero! . . . . . . . . . . . . . . 88
Al ĉiu sia tasko . . . . . . . . . . . . . . . . . 89
Idealo estas necesa . . . . . . . . . . . . . . . . 91
Edukejo, ne agitejo . . . . . . . . . . . . . . . . 92
Kio estas animo? . . . . . . . . . . . . . . . . . 93
Dogmo — Dogmiĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . 95
Edukado — Agitado. . . . . . . . . . . . . . . . . 96
Kulturi la simplan saĝon . . . . . . . . . . . . . 98
Intelektulo? — Manlaborulo? . . . . . . . . . . . . 100
Dubemo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 103
Denove pri dubemo . . . . . . . . . . . . . . . . . 105
Forto de ideoj. . . . . . . . . . . . . . . . . . . 107
Kiel naskiĝas ideoj . . . . . . . . . . . . . . . . 109

SENNACIISMO

Venis anarkisto... . . . . . . . . . . . . . . . . 111
Internaciismo — Sennaciismo. . . . . . . . . . . . . 115
Ne dum la domo forbrulas. . . . . . . . . . . . . . 116
Neantaŭvidita rezulto . . . . . . . . . . . . . . . 118
Sennaciismo je praktika vidpunkto . . . . . . . . . . 119
Viduloj povas sin direkti aliel ol blinduloj . . . . . . 122
Pri la « interna ideo » . . . . . . . . . . . . . . . 124
Kiuj devus sidi en frenezulejo?. . . . . . . . . . . . 125
Ĉu ili estas sennaciistoj?. . . . . . . . . . . . . . 126
Krei al si sennaciecan animon . . . . . . . . . . . . 130

Paĝoj

## SOCIPOLITIKO

Publika letero de francia SAT-ano al lia dolaro moŝto Kuliĝ (Coolidge) . . . . . . . . . . . . . . . . . . 133
Ekrigardeto sur la historion de l' Unua de Majo . . . . 136
Oni petas volontulojn . . . . . . . . . . . . . . . . . 140
La eksterleĝigo de l' milito. . . . . . . . . . . . . . . 142
Pri la morto de araba SAT-ano . . . . . . . . . . . . 144
Denove pri la morto de araba SAT-ano . . . . . . . . 146
La Kamentubo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 148
Ĉu la Ligo de Nacioj konsistigas ion novan ?. . . . . . 150

## PACISMO

Ĉagrene parolis Pacisto... . . . . . . . . . . . . . . . 155
Pri Pacismo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 158

## PRISKRIBOJ

Ĉe la lando de la « Nigraĉemizuloj ». — Romo . . . . . 163
Leteroj el Turkio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 166
Kontrastoj. — Okcidento venkas. — Monaĥejoj k maŭzoleoj estas fermitaj. — La dervIŝoj.

## POLEMIKO

La unua devo... . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 173
Kiu estis honorata ? . . . . . . . . . . . . . . . . . 175
Preferu agojn ol belsonajn frazojn . . . . . . . . . . 176
La vojoj de dio estas nediveneblaj . . . . . . . . . . 177
Ne ĉiu kapablas herezumi . . . . . . . . . . . . . . 179
Eltomba parolo de Marks . . . . . . . . . . . . . . 180

PENSOJ. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 183

---

*Originalaj desegnoj de R. BARTELMES*

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

CENTRA PRESEJO ESPERANTISTA
V. POLGAR, 33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
1586 I

D. S.